LA KRONIKO DE ESPERANTO EN PRAGO

Jiří Patera
(kompilanto ĝis 2002)

Tomáš Břicháček
(kompilanto ekde 2014)

Aktualigita la 30-an de junio 2025

Enhavo / obsah

Enhavo / obsah 2
La kroniko de Jiří Patera 3
Listo de prezidantoj 26
2003–2013 27
2014 30
2015 41
2016 47
2017 53
2018 58
2019 71
2020 87
2021 95
2022 99
2023 113
2024 122
2025 132

La kroniko de Jiří Patera

1889 La 17 jara František Vladimír Lorenz, la ĝistiama propagandisto de volapuko, renkontiĝis kun Esperanto kaj prelegis pri ĝi en la socialista kultura rondeto en la gastejo „U Pštrosů“ (strato Pštrossova n-ro 189/16, Praha 1) kaj poste instruis la lingvon tie.

1890 Fr. V. Lorenz verkis kaj proprakoste eldonis ĉe la presisto F. Hoblík en Pardubice la unuan ĉeĥan lernolibron de Esperanto (Úplná učebnice mezinarodní řeči dra Esperanta. – Napsal Fr. V. L. – Plena lernolibro de la lingvo intemacia de d-ro Esperanto. – Por Bohemoj skribis Fr. V. L.). Sed en 1893 li elmigris en Brazilon.

1891 La elstara ĉeĥa ĵurnalisto, verkisto kaj poeto Jan Neruda publikigis en majo 1891 felietonon „Může vůbec někdo vynalézt nějakou řeč?“ (Ĉu entute iu povas inventi ian lingvon?), en kiu per moka maniero li priskribas la historion de provoj pri artefarita lingvo kaj konstatas, ke la patrinan lingvon ne povas anstataŭi artefarita lingvo. Kvankam la teksto estas negativa, tamen ĝi enhavas informojn pri volapuko, pri la transiro de la Nurnberga klubo de volapuko al Esperanto, pri Zamenhof k. s. Neruda estis bone informita pri la naskiĝo de la E-movado kaj lia teksto estis eble la unua tiutempa informo por ĉeĥaj legantoj. Bedaŭrinde Jan Neruda mortis post tri monatoj (la 22-an de aŭgusto 1891) kaj ni povas nur konjekti, ĉu li interesiĝus plu pri la Internacia Lingvo.

1902 En Prago komenciĝis la priesperanta informa kampanjo en ĵurnaloj Pražský deník (Praga ĵurnalo) fare de Xaver Menhard kaj Najemník (Loĝluanto) fare de Kriegelstein-Vojnar.

1902/06/20 okazis prepara kunveno en la restoracio Konvikt en la strato Bartolomějská. Oni akceptis statuton kaj decidis sendi ĝin al la landa oficejo por aprobo. La fondan kunvenon oni decidis kunvoki nur en aŭtuno, post la oficiala aprobo de la statuto. Laŭ esploroj de D-ro Bohumil Baďura, laboranto de la Instituto de Historio ĉe la Akademio de Sciencoj en Praha tiu sinjoro studis la vivon kaj verkon de F. V. Lorenz), en la Ŝtata Centra Arĥivo troviĝas dokumento pri aprobo de la statuto de la klubo fare de imperiestra kaj reĝa guberniestra ofico kun la dato de la 23-a de oktobro 1902.

1902/11/09 je la 20-a horo okazis la fonda kunveno de nia klubo en restoracio „U Štajgrů“ en la strato Vodičkova (nun la domo U Novaků). Kunvenis 15 homoj, oni elektis la unuan komitaton, kiu estis jena:

prezidanto: Eduard Weinfurter, librovendisto kaj eldonisto
vicprezidanto: František Kühnl
sekretario: František Barth
kasisto: Josef Görner
protokolisto: Eduard Kühnl
invertaristo: Stanislav Kostka Neumann, poeto
bibliotekisto: František Vaníček
anstataŭanto: f-ino Hainthalová

La sidejo de la klubo fariĝis la kafejo Union.

1903/06/17 estis elektita nova komitato, la nova prezidanto de la klubo fariĝis Vojtěch Kraus, estis ŝanĝita la sidejo de la klubo, ĝi estis la kafejo Tůmovka en la strato Lazarská.

1904/01/21 ŝanĝo de la kluba statuto, ke la klubo povu krei lokajn grupojn ekter la ĉefurbo (virina grupo en Praha, grupoj en Plzeň, České Budějovice kaj Prosek)

1904/03/21 okazis la unua publika prelego en Prago en Ženský klub (Virina Klubo), tiam tre laŭmoda. La prelegon prezentis D-ro Kamarýt. La salono estis plena, regis entuziasmo, multaj promesis aliĝi al kurso aŭtune. En tri ĵumaloj aperis raportoj pri la prelego.

1904 en aprilo estis fondita Esperantista Rondeto de Blinduloj en la Instituto de Klar, kie Esperanton instruis Karel Emanuel Macan, muzik-komponisto kaj instruisto de blinduloj.

1904/12/12 konstituiĝis ĉe la Muzeo de Náprstek Unua Virina Grupo Esperantista (První dámský spolek esperantský), fare de s-ino Josefa Náprstková, la unua organizantino de la E-movado inter ĉeĥaj virinoj; prezidantino fariĝis Božena Studničková, ĉeĥa kaj Esperanta poetino. Kursojn gvidis f-ino Tesařová kaj s-ino Krausová.

1905 la klubo transmigris el Tomůvka en la restoracion „Donátů“ en la strato Spálená. La urbestraro de Praha donis je dispono de la klubo unu ĉambron en burĝa lernejo „Nejsvětější Trojice“ (Ĉe la Plej Sankta Triunuo), tiam ekde decembro estis malfermitaj publikaj kursoj ĉiusabate de la 6-a ĝis la 8-a horo vespere, instruis St. Balík, Jos. Barvíř, St. Kamarýt, Ed. Kühnl.

1906 la Klubo ricevis Honoran Ateston de Ekspozicia komitato de la ĉeĥa sekcio en aŭstria ekspozicio en Londono, *Earl's Court* 1906, sub la protektorato de urbestraro de la reĝa ĉefurbo Praha, pro valoraj servoj prezentitaj al la ĉeĥa ekspozicio en Londono 1906. Baldaŭ poste venis letero kun jena teksto:
„En la nomo de Ĉeĥa Nacia Konsilantaro ni permesas al ni informi vian gloran klubon, ke la Ĉeĥa Nacia Konsiantaro disponigis inter aliaj fakaj ĉeĥaj korporacioj al la Esperantista Klubo en Praha la rajton proponi. . . unu membr(in)on de la eksterlanda fako de Ĉeĥa Nacia Konsilantaro sub konvinko, ke ankaŭ per kunlaboro de la ĉeĥaj esperantistaj rondoj estos eble sukcese plenumadi la strebojn de nia eksterlanda fako en la intereso de la ĝusta informado de eksterlando pri la ĉeĥa nacio. . . „

1907 En la Istituto por blinduloj de Klar estis komencita nova kurso. Instruis prof. K. E. Macan, blindulo, instruisto kaj muzik-komponisto.
En majo vizitis la klubon inĝ. N. Evstifeieff kun edzino el Rusujo. Rondeto de studentoj-esperantistoj estis fondita de „Unio de ĉeĥslava studentaro“ kun la celo disvastigi Esperanton inter ĉeĥaj studentoj kaj ligi kontaktojn kun eksterlandaj studentoj.
Firmo F. Topič eldonis katalogon de Esperantaj libroj.
En ĉeĥaj ĵurnaloj komenciĝis pli ofte aperadi priesperantaj artikoloj. La plej diligenta kontribuanto al multaj ĉeĥaj gazetoj estis Hynek Karel Bouška; dank' al li en la j. 1907 oni povis legi pri Esperanto en la ĉeĥa gazetaro ĉiutage.

1907/06/30 kunvenis ĉeĥaj esperantistoj en Praha kaj traktis pri la baldaŭ fondota Bohema Unio Esperantista.

1907/12/01 estis fondita Bohema Unio Esperantista, la unua prezidanto estis Jan Hradil, sekretario Karel Procházka; Časopis českých esperantistů eldonata de Eduard Kühnl ekde januaro 1907 fariĝis ĝia organo.

1908/01/01 pragaj esperantistoj eksigitaj el la Klubo kaj opoziciantaj al la ĵus fondita Bohema Unio Esperantista fondis novan klubon en Prago „Bohema Societo Esperantista en Praba“ (Česká společnost esperantistů v Praze), prezidanto fariĝis Josef B. Novák, sekretario Josef Barvíř.

1908/09/27 okazis fonda kunveno de nova organizaĵo Bohemia Asocio Esperantista (Svaz českých esperantistů), prezidanto estis D-ro Alexander Sommer Batěk, vicprezidanto Jozef Kožíšek (lernejestro kaj poeto) kaj Vojtech Kraus, ĝen. sekretario D-ro Stan. Kamarýt. Organo estis Český esperantista (Bohema esperantisto), redaktata de K. H. Bouška.

1909/01/26 en la kafejo Edison okazis fonda kunveno de la germana klubo Esperanto-Verein Verda Stelo Prag, kun la ĉeesto de proks. 50 personoj. Prezidanto estis elektita prof. D-ro Siegfried Lederer, sekretario Julius Boschan. La kunvenon partoprenis ankaŭ la delegitoj el la Bobema Unio Esperantista kaj el la Bohema Asocio Esperantista.

1909/06/29 Grandan amuzan feston aranĝis la Esperantista klubo en Praha en ĝardeno de restoracio „U Labutě“. La feston vizitis 400 personoj, kiuj vive partoprenis ĉiujn distraĵojn: teatro, tombolo, kegloj, poŝto, rado de fortuno kaj danco.
Premiojn por la tombolo donacis ĉeĥaj firmaoj ne nur el Prago, sed ankaŭ el Kolín kaj Prostějov.

1909 la prezidanto de Bohema Asocio Esperantista fariĝis D-ro Kamarýt
Bohema Unio Esperantista acanĝis en Prago tri kongresojn:
1909-09-26/29 kun 360 partoprenantoj
1910-19-24/25 kun 200 partoprenantoj
1911-09-8/10 kun 120 partoprenantoj, samtempe okazis la dua konferenco de aŭstriaj esperantistoj

1910 La Ĉeĥa Komerca Muzeo en Prago malfermis en la palaco „Merkur“ (Mikulášská str.) grandan publikan legejon de la ĉeĥa komercistaro, en kiu estis legeblaj apud gazetoj fakaj kaj pli gravaj en- kaj eksterlandaj politikaj ĵurnaloj ankaŭ gazetoj Esperantaj el diversaj landoj. La legejo estis malfermita labortage de la 5-9 h vespere, dimanĉe kaj festotage de la 10-12 h antaŭtagmeze. En la j. 1910 en Prago funkciis
Esperantista Klubo en Praha (la ĝen. kunveno 26. 1. 1910 elektis novan prezidanton prof. Dr. V. Rosický),
Stelo de Espero,
Akademia Eperanto-klubo,
Studenta rondeto Esperantista,
Klubo de Ĉeĥaj Kelneroj-Esperantistoj,
Laborista Klubo en Praha VII,
Studenta Rondeto Esperantista en Karlín,
Esperantista Grupo en Král. Vinohrady,
Klubo en Praha VIII,
Esperantista klubo Žižkov,
Esperantista Klubo en Smíchov,
krome okazis kvanto da kursoj, ekz. en Hlubočepy kaj Nusle.

1911/05/06 EKP okazigis amuzan vesperon en la salono de Ĉeĥslava Komerca Organizaĵo en Jerusalemská str. Estis prezentitaj du unuaktaj E-lingvaj komedioj en traduko de Fr. Dus: Balŝuetoj (ludis f-inoj Žabková kaj Vaněčková) kaj Du biletoj (ludis A. Wenzelova, Tobek kaj Dus), krome oni kantis, recitis poemojn ktp.

Pragon vizitis la ĉefurbestro de Londono Lord Mayor Sir T. Vezey Strong, amiko de Esperanto. En la dua tago de lia vizito vizitis lin en lia hotelo reprezentantoj de BUE prof. Dr. Rosický kaj red. Ed. Kühnl, kiuj prezentis al li salutojn de la ĉeĥa esperantistaro. Poste ili oficiale ĉeestis la solenan akcepton de la tuta angla deputacio en la urbodomo.

1911/09/08 En la kadro de la 3-a Bohemia Kongreso Esperantista en la salono de Ĉeĥslava Komerca Organizaĵo okazis teatra prezentado: unuakta orginala ŝerco Konkurantinoj de f-ino Studničková (ludis fratinoj A. kaj F. Žabková) kaj „All right“, unuakta komedio de Štolba, esperantigita de Q. Ardeni (prezentis Fr. Procházková, M. Vaněčková, A. Žabková, B. Davídek, Fr. Dus kaj Vl. Tobek).

1911/12/23–27 en la Nacia domo en Smíchov okazis la 10-a kongreso de la Ĉeĥoslava Socialdemokrata Partio Laborista; la 27-an de decembro la kongreso akceptis rezolucion proponitan de J. F. Chaloupecký, laŭ kiu „La 10-a kongreso de la ĈSDFD. . . rekonante la gravecon de la internacia mondlingvo por la intemacie organizita proletaro. . . rekomendas al la organizataj kamaradoj propagandon de Esperanto kaj postulas de kamaradaj institucioj kaj redakcioj, ke ili kondutu kompleze al tiu ĉi propagando.“

1912 komencis aperi „La Kulturo“, gazeto de „Laborista Unuiĝo Esperantista en Prago“

1914/01/27 Bohema Societo Esperantista en Praha havis ĝeneralan kunvenon, prezidanto fariĝis V. Kraus, sekretario R. Hromada

1914/03/17 Esperantista Klubo en Smíchov eksiĝinte el BUE elektis prezidanton prof. Aug. Pitlík, sekretarion Jan Mráz.

Estis inaŭgurita nova esperantista kunvenejo en Praha, la esperantistoj el la tuta Prago povis kunvenadi ĉiudimanĉe post la sesa vespere sur la balkono en la unuaranga kafejo de hotelo „Štěpán“ (Václavské nám.), kie ankaŭ troviĝas legejo de la plej novaj numeroj de 50 Esperantaj gazetoj. Unu kelnero parolas Esperanton.

1917 D-ro Kamarýt aranĝis kunvenon de la Bohema Societo Esperantista en la restoracio Kolář (en la strato Celetná) kaj prelegis pri la mortinta Zamenhof

1917/12/09 en la malgranda salono de restoracio Brejška en Praha okazis konferenco de ĉeĥaj esperantistoj. Ĝi estis iniciatita de la Laborista Societo Esperantista en Plzeň kaj venis preskaŭ 40 personoj. Ĝi iniciatis unuecigon de la ĉeĥa esperantistaro kaj aprobis eldonadon de neŭtrala gazeto La Progreso (redaktita de Bedřich Tittl el Plzeň).

1918/02/15 Esperantista Klubo en Praha okazigis en kafejo Union ĝeneralan kunvenon, kiu elektis prezidanton Josef Eiselt.

1918/02/22 Esperantista Fraŭlina Rondeto en Praha aranĝis en Ženský klub český (Ĉeĥa Virina Klubo) amuzan vespereton, kiun ĉeestis ankaŭ la poeto Stanislav Schulhof el Pardubice.

Fraŭlina Rondeto Esperantista, gvidata de fino Šupichová, aranĝis komune kun la Esperantista Klubo kaj Esperantista Societo brilan festvesperon, per kiu oni memoris la morton de D-ro Zamenhof. Tiu ĉi vespero helpis al la konkordiĝo de la esperantistoj en Praha.

1918/11/05 La kunveno de Bohema Societo Esperantista estis la unua en la libera Ĉeĥoslovaka ŝtato. Ĝi festis la 60-an naskiĝjaron de filozofo, univ. prof. , D-ro Fr. Krejčí, unu el honoraj prezidintoj de la Krakova kongreso. Pri lia vivo kaj laboro parolis S. Kamarýt.

Kroniko Patera

1918/11/12 Fraŭlina Rondeto aranĝis intiman vespereton por festi la konstituiĝon de la Ĉs. Respubliko. F-ino Šupichová parolis „Pri la devo de esperantistoj en la nova ŝtato“.

Esperanta flago (laboro de Fraŭlina Rondeto) flirtas sur la domo de kafejo „Union“. En la kafejo troviĝas oficejo por informa servo al esperantistoj, kie ĉiutage oficas f-ino Moudrá de la 2-a ĝis la 7-a horo posttagmeze.

1918/11/19 la kunvenon de BSE partoprenis la unuaj revenintoj el batalkampoj: prof. Pitlík, R. Šada, la redaktoro de la Kulturo M. Lukáš

1919/01/07 fondiĝis Rondeto de Esperantistinoj (pli frue Fraŭlina Rondeto) en Praha. Prezidantino J. Šupichová, vicprez. M. Moudrá, sekretario S. Dlouhá. La rondeto malfermis sabate la 18-an de januaro en Ženský klub (Jáma 5) kurson de Esperanto.

1914/01/29 Bohema Societo Esperantista aranĝis en sia klubejo, restoracio de s-ro Hoza, la ĝeneralan kunvenon.

1919/02/17 ĝenerala kunveno de Verda Stelo. Elektitaj prezidanto d-ro Ad. Bischitzky, vicprez. J. Boschan, sekretario f-ino E. Borges. Oni decidis aranĝi kursojn por komencantoj kaj por progresintoj en la nova hejmo „Künstlerinnen-Club“, Perštýn 6.

1919/02/21 ĝenerala kunveno de Esperantista Klubo en Praha (1-a parto)

1914/03/07 ĝen. kunveno (2-a parto) de EKP konstatis la unuiĝon de pragaj esperantistoj (Societo Esperantista disiĝis), prezidanto fariĝis reg. kons. Eiselt, sekretario R. Hromada. La klubo kunvenas en kafejo Union.

Rondeto de Esperantistinoj kunvenas ĉiam lunde je la 7-a vespere en Ženský klub (Jáma 5), ĝi eldonis propagandajn poŝtkartojn kun la surskribo „Učte se Esperantu“ (Lernu Esperanton!).

1920/02/01 unueciĝis Bohema Unio Esperantista kaj Bohema Asocio Esperantista kaj ekestis Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. La fonda kunveno de ĈAE okazis en la kafejo Louvre. Estis elektitaj: prezidanto Josef Eiselt, vicprezidanto D-ro Stan. Kamarýt, ĝen. sekretario Rudolf Hromada.

1920 La Ĉeĥa Blindula Preso komencis eldonadi brajle presitan gazeton Aŭroro, en formato 25 x 28 cm. En septembro Julie Šupichová komencis eldoni ĉeĥlingvan propagandan monatan revueton Esperantský zpravodaj, kiu aperis dum tri jaroj ĝis decembro 1923.

1921/07/31–08/06 okazis en Prago la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en Slava Insulo (Žofín) kun 2561 partoprenantoj el 35 landoj.
La kongreson alparolis honora prezidanto lerneja ministro Prof. D-ro J. Šusta kaj la reprezentanto de la urbestraro D-ro J. Rotnagl. Ĉeestis Klara Zamenhof, vidvino de la Majstro. Dek registaroj sendis reprezentantojn, krom tio la Laboroficejo en Ĝenevo kaj Ruĝa Kruco. Sekretario de la Ligo de Nacioj sendis sian observanton, unu el la tri vicsekretarioj, japanon D-ron Nitobe (li verkis favoran raporton pri Esperanto, prezentitan en 1922 al la Ligo de Nacioj). Prezidanto T. G. Masaryk respondis al salut-telegramo de UK en Prago telegrafe: „Capri la 4-an de aŭgusto 1921. Mi dankas pro salutoj al enlandaj kaj ekterlandaj kongresanoj. Mi deziras a1 via celado, servanta al progresema idealo sukceson. T. G. Masaryk.“
D-ro Edvard Beneš, eksterlanda ministro kaj poste prezidento de la Respubliko, en la salutletero al la UK en Prago, la 30-an de julio 1921: „La ideo de unu interkompreniga lingvo, kia estas Esperanto, estas grandvalora por ĉiuj sinceraj pacifistoj. Hodiaŭ ĝi ne plu estas utopio, sed problemo, pri kiu laboras interlektularo de la tuta mondo.“

Kroniko Patera

De la 1-a ĝis la 3-a de aŭgusto 1921 okazis fonda kunveno de Sennacieca Asocio Tutmonda sub la honora prezido de Henri Barbusse.
Okazis la 1-a kongreso de blinduloj-esperantistoj, aranĝita iniciate de K. E. Macan, sub la prezido de prof. Theophile Cart.
En la Teatro de Vinohrady estis prezentita la komedio „Nokto en Karlův Týn“ de Jar. Vrchlický en la traduko de M. Lukáš.
Dum la UK estis uzata prikongresa poŝtostampo, la unua en Ĉeĥoslovakio, la 6-a en la mondo.

1921 komercisto O. Adámek en Prago komencis eldoni kaj H. K. Bouška redakti monatan gazeton „Ĉeĥoslovaka gazeto“ kun aldono „Nova Eŭropo“. Ĝi intencis esti „Esperanta tribuno de malgrandaj nacioj“. La gazeto aperadis ĝis komenco de 1923, sume 14 numeroj.

1923 en Prago estis fondita la unua loka unuiĝo de katolikaj esperantistoj.

1923/06/27 Laŭ iniciato de d-ro Pitlík estis en Prago fondita Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto kun la celo prilabori la instruan kaj prelegan flankojn de la propagando. Ĝi posedis „Privatan lernejon por Esperanto“ laŭ permeso de lerneja ministerio kaj rajtis aranĝi ekzamenojn kaj doni atestojn pri scio de Esperanto.

En la sama jaro ekfunkciis lektorato de Esperanto en la Ĉeĥa Teknika Altlernejo (VUT) en Prago, ĝis la jaro 1951, laŭ ministeria dekreto 115. 445 de 13. 12. 1922. Lektoro fariĝis PhDr. A. Pitlík.

En novembro komencis en Prago aperi la gazeto „La Progreso“ sub redakto de Rud. Hromada.

1924/01/31 okazis la unua E-lingva prelego en la Ĉs. Radio. D-ro A. Pitlík parolis pri Ĉeĥoslovakio kiel turista lando.

1924/03/18 Rondeto de Esperantistinoj havis ĝeneralan kunvenon. Prezidantino fariĝis f-ino Klema Hlaváčová, sekretariino S. Zedníková.

1924/03/28 okazis la ĝenerala kunveno de EKP; prezidanto fariĝis Konst. Koutek, sekretario Mothejzlík. La klubo kunvenas ĉiun vendredon je la 20-a horo en 2-a etaĝo de la kafejo „Edison“ (angulo de Můstek kaj Příkopy). La klubanoj aranĝis ĉiudimanĉe ekskursojn.

1928 okazis radiokurso de Esperanto de radiostacio Praha, instruis J. Eiselt

1929 la 14-a Kongreso de IKUE okazis en Prago en la kadro de la miljarfestoj de s-ta Venceslao. Ĉeestis 211 kongresanoj el 16 landoj

1931/01/23 Jaroslav Šustr estis elektita prezidanto de la Esperantista Klubo en Praha. Tiun ĉi funkcion li plenumis 27 jarojn kaj 9 monatojn ĝis la 24-a de septembro 1958, kiam li rezignis.

1932 Laborista Grupo Esperantista aranĝis ĉiun unuan mardon en monato membran kunvenon en Odborový dům. Ĉeestis eĉ membroj kaj gastoj.

1932/08/11 Konferenco de Internacia Fedaracio de Esperantista Trafik- kaj Transportlaboristaro okazis en Prago en kadro de la 1-a kongreso de la Intemacia Transportista Federacio. Informis pri ĝi detale la socialdemokrata faka gazeto Zeleznič ář (Fervojisto)

1932/03/02 dum la ĝenerala kunveno de polica rondeto estis elektita nova komitato, prezidanto: distrikta inspektoro Em. Vaněček, delegito de la Internacia Polica Ligo s-ro J. Vávrovský. Kurson por 30 personoj gvidas prof. Řádek.

Kroniko Patera

1933/04/25 Rondeto de Eperantistinoj decidis disiĝi pro manko de aninoj. La restintaj membrinoj kunlaboras en Sdružení přátel esperanta (Societo de Amikoj de Esperanto).

1933/05/20 EKP aranĝis en la salono de Centra Urba Bibloteko lumbildan paroladon de negra s-ano Kola Ajayi antaŭ 200 ĉeestantoj. La tradukon prizorgis prezidanto Šustr. La 21-an de majo Radio Praha elsendis intervjuon kun Kola Ajayi, kiun faris d-ro Pitlík.

1933/06/30–07/02 en Praha okazis landa kongreso de katolikaj esperantistoj

1934 La datoj de ĝeneralaj kunvenoj de Esperanto-grupoj en Praha:
25.1. Klub malostranských esperantistů (Klubo de E-istoj de Malgranda Urbo)
22.2. Katolika Klubo
23.2. Esperantista Klubo
1. 3. Verda Stelo
24. 3. Societo de Ĉs. Nevidantaj Esperantistoj
5. 4. Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto
EKP dum 1a Propaganda semajno aperigis 300 grandajn afiŝojn pri kursoj.

1935/03/05 Švandovo divadlo (Teatro de Švanda) ludis teatraĵon „Mistero en la dua etaĝo“ profite al SOĈNE (Societo de Ĉs. Nevidantaj Esperantistoj)

1935/03/08 en Prago estis malfermita Tutmonda Ekspozicio por la Blindula Gazetaro. Partoprenis reprezentantoj el diversaj socialaj institutoj, ambasadoraj oficistoj de diversaj ŝtatoj kaj ĵumalistoj. La alvenintaj salutleteroj estis plejparte en Esperanto. La ekspozicio troviĝas en du salonoj kaj enhavas ankaŭ E-angulon. La bela afiŝo de la ekspozicio enhavas E-tekston.

Malfermiĝis kurso de la E-rondeto Nova Vivo en la ĉefepiskopa gimnazio en Bubeneč. Instruis Bohumil Čálek.

1935/36 Dum vintra sezono kunvenadis ĉiulunde inter 19-21 horo en privata loĝejo de f-ino Sidonie Dlouhá 15 lokaj esperantistoj por aŭskulti prelegojn de Julie Šupichová pri la tutmonda literaturo kaj pri E-novaĵoj.

1936/02/05 EKP Národní třída, kafejo Louvre, aranĝas E-kursojn sub protekto de Ĉs. E-Instituto. La kurso por komencantoj okazas ĉiumerkrede ekde 5. 2. en la lemejo „U sv. Havla“, Uhelný trh. Konversacia kurso por progresintoj okazas ĉiuvendrede de 20-a ĝis 21-a horo en la klubejo, kafejo Louvre.
Aprila programo de Verda Stelo:
2. 4. 1936 D-ro Goldberger: Maria Magdalena de Hebbel. I-a akto.
9. 4. Zamenhofsolenaĵo okaze de la mortotago de nia majstro. R. Bloch.
16. 4. Maria Magdalena. II-a akto.
23. 4. Weleminsky: Kial la folioj estas verdaj?
30. 4. Maria Magdalena. III-a akto.

1936/05/08 okaze de la rumana ŝtatfesto de la 10-a de majo la EKP aranĝis Rumanan Vesperon (prelegoj pri Rumanio, e-igitaj rumanaj literaturaĵoj, rumanaj popolkantoj kantitaj de kantistinoj en rumanaj naciaj kostumoj). La rumana ambasadoro sendis salutleteron. Ankaŭ la Rumana E-ista Societo gratulis la klubon.

Konstanta rendevuejo de esperantistoj en Praha troviĝas en la restoracio „Na Tetíně“, Nusle, Palackého tř. l, ĉiudimanĉe post la 17-a horo koncerto kaj dancado. Esperanto parolata.

1937/01/09 EKP aranĝis en la Urba Bibloteko paroladon kun lumbildoj de s-ro Scherer pri la temoj: Romantika Hollywod kaj tra Usono per Weekendaŭtomobilo.

1937/07/02 la societo „Klub Ženské národní rady“ (Klubo de Virina Nacia Konsilantaro) en Praha aranĝis vesperon dediĉitan al Esperanto-propagando. Paroladis faka instruistino Julie Šupichová: „Ĉs. virinoj kaj Esperanto“ kaj poste sekvis provleciono laŭ Cseh-metodo de diplomita Cseh-instruisto s-ino M. Adámková. La vesperon ĉeestis senatanino F. F. Plamínková, kiu favoras E-on.

1937/08/05–06 Antaŭkongreson de la 29-a UK en Varsovio partoprenis ĉirkaŭ 200 kongresanoj el 12 landoj.

1937/09/06–20 Cseh-metoda kurso de Sigismundo Pragano okazis en ejo de la Ĉeĥa Teknika Altlemejo por 45 partoprenantoj.

1937/12/03 la klubon vizitis la negra s-ano Kola Ajayi kaj rakontis pri sia vivo. 4. 12. li publike parolis prezentante lumbildojn kaj negrajn kantojn en la Urba bibloteko.

1938/05/13 en la klubo prelegis hungara verkisto Fr. Szilágyi.

Internacia Poŝtmarka Ekspozicio 1938 eldonis propagandan broŝuron kun tekstoj en lingvoj ĉeĥa, germana, franca, angla kaj Esperanto.

1940/06/14 la lasta ĝenerala kunveno de la Klubo dum la Protektorato; prezidanto Jar. Šustr, vicprezidanto K. Koutek, sekretario Fr. Svitak, kasistino Bárochová, biblotekisto Slanina, revuistino Hořínová, arĥivisto Bároch, protokolistino Boháčová.

Pro la germana subpremado iom malaperis la publika agado de la klubo, la kunvenoj ĉesis kaj sole en la kafejo kunvenadis malgranda areto de esperantistoj kun la prezidanto, malofte dek, iam sole du-tri homoj.

Tamen la gestapo venis en fino de la j. 1943 spionadi, ĉu esperantistoj kunvenas kaj kun akuzo de la prezidanto, kial la klubo ne likvidiĝis, kiam tamen Esperanto estas malpermesita. Tiam prezidanto Šustr anoncis al la polico likvidiĝon de la klubo la 20-an de februaro 1944 kaj prezentis al la gestapo nomaron de bibloteko kaj konfirmon, ke la mona havaĵo de la klubo estis laŭ la statuto sendita al Ústřední matice školská (Centra Lerneja Ofico). La nomaro de la bibloteko estis nekompleta, la plej gravaj libroj estis donitaj al kelkaj klubanoj por konservi ilin. La kunvenoj de la fidela areto ne ĉesis. La gestapo trankviliĝis kaj ne plu malkvietigis la lastajn fidelulojn. Apartan dankon meritas s-ano Šustr, kiu pro persona saĝo kaj kuraĝo ebligis konservon de la klubaj havaĵo kaj tradicio.

1945/06/20 okazis la unua kluba kunveno post la milito kaj depost tiam ili okazis ĉiun merkredon en la tradicia klubejo de la kafejo Louvre, Národní tř. En la jaro 1945 estis 30 kunvenoj, kiujn vizitis sume 1126 membroj, 111 gastoj, 29 fremduloj.

Dum la milito en koncentrejoj pereis: Bunzl, Weisskopf, Waldstein, Robert Bloch kun edzino, Leopold Flajšr, Lederer kun edzino, f-ino Nasová, Peter Ginz k. s.

El koncentrejoj revenis: Otto Ginz, Rudolf Hromada, Frant. Buhr, Jos. Drlík, Hirsch (Hanak).

Ĉeĥoslovaka radio komencis elsendi E-lingvajn programojn.

1945/09/17 komenciĝis mezondaj elsendoj (2-foje semajne, partoprenis pragaj esperantistoj, sed ankaŭ Forge kaj Szilagyi)

Kroniko Patera

1945/09/24 komenciĝis ĉiutagaj kurtondaj elsendoj (15-minutaj, red. J. Mařík).

1945/11/22 provleciono de E-kurso en Laborlernejo de ÚRO (sindikatoj), partoprenis 300 personoj, instruis Jean Forge, poste la kurson partoprenis 200 personoj, instruis Ant. Slanina kaj Václav Král

1946/01/16 jarkunveno de la klubo, ĉeestis 73 personoj. La klubo havis je tiu dato 360 membrojn, el ili 180 el Prago kaj 180 ekster Prago. Prezidanto denove fariĝis Jar. Šustr, sekretario Fr. Sviták.

1946/01/19 je la 20-a horo okazis amika kunesto de 85 kongresanoj en klubejo de kafejo Louvre kaj la 20-an de januaro 1946 je la 10-a horo komenciĝis la unua Ĉs. postmilita kongreso de AE ĈSR en la salono de kafejo Louvre kun ĉeesto de 105 personoj.

1947 EKP kunvenas regule ĉiun merkredon je la 20-a horo en kafejo Louvre, Praha II, Národní 20. La programoj de la kunvenoj estas por ĉiu monato antaŭe fiksitaj kaj havas ĝenerale altan nivelon.

En oktobro oni fondis „Junularan rondeton“, en kiu kolektiĝas junaj klubanoj kaj disvolvas ĝojigan agadon. Estro de la „Junularo“ estas s-ano Josef Forman.

Kursoj de Esperanto okazas daŭre en Laborlernejo de ÚRO.

Konversacia kurso antaŭ ĉiu kunveno de la klubo, de la 19-a horo, instruas Ant. Slanina kaj Pavel Šlechta.

El la kunvenoj: 16.7. S-ino Anna Alamo: Prelego pri travivaĵoj kaj impresoj en ĈSR. 13. 8. S-ano I. Dratwer: Salutparolo en la nomo de polaj esperantistoj. 20. 8. D-ro Baur: Prelego pri Svislando, kun tri filmoj. En la granda salono de kafejo Louvre ĉeestis ĉ. 100 personoj, inter ili 9 eksterlandanoj.

1947/11/22 je la 20-a horo en granda salonego de Virina Klubo Ve Smečkách 26 – Solena vespero kun arta programo honore al la 60 jaroj de Esperanto kaj 45 jaroj de la klubo

1947/12/13 je la 20-a horo en granda salonego de Aeroklub, Ve Smečkách 22 – Gaja Nikolaa Vespero kun abunda programo, Nikolaaj donacoj kaj danco

1948/12/15 je la 19.30 h en granda salonego de Slava domo, Na Příkope, solena vespero okaze de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof. Partoprenis pragaj geaktoroj kaj membroj de Verda Stacio Praha.

1949 pro kelkfoja translokiĝo de la klubo la agado iom malvigliĝis.

La kunvenoj okazis en sep diversaj lokoj en Prago.

1949/02/11 nova kunvenejo en Národní kaváma, Národní třída č. 11, ĉiuvendrede je la 20-a horo

1949/03/02 nova kunvenejo en Kulturdomo de la Ĉs. Poŝto en Třída Politických vězňů n-ro 16, kunvenoj ĉiumerkrede je la 20-a horo. En la programo estis prelego de J. Vítek: Danlando post la lasta milito – kun koloraj lumbildoj

1949/07/06 kultura vespero kun Reto Rosseti kaj lia edzino

Kroniko Patera

1949/08/02 kunveno kun nederlandaj, belgaj kaj francaj gesamideanoj, kiuj per aŭtobuso venis en Pragon – en aparta salono de restoracio sur Slava insulo, je la 20-a horo.

Kursoj por poŝtistoj okazis de novembro 1949 ĝis aprilo 1950 en Kultura Domo Poŝtista (Tř. Politických vězňů 16), komencula lunde, progresinta ĵaŭde, gvidata de Julia Bendová por 6 -12 partoprenantoj.

1950 EKP kunvenas regule ĉiun merkredon je la 20-a horo en Kulturklubo de la personaro de CNK (Kulturní klub zaměstnanců ÚNV, Praha I, Příkopy 17, I-a etaĝo).

En la industria lernejo Praha I. prof. Jos. Kochman instruas Esperanton laŭ tekstoj de inĝ. Krajíc en du interesrondoj. Partoprenas 35 lernantoj en du duhoraj lecionoj ĉiusemajne.

La kluba junularo reorganiziĝis sub gvidado de Jan Neuman kaj kunvenas ĉiuĵaŭde je la 18. 30 h. en la klubejo.

Dum la aŭtuna sezono EKP, en kadro de ONV 2, kleriga departamento, iniciatis kaj aranĝis poresperantan porkursan kampanjon per afiŝoj kaj flugfolioj. Krom 30 000 flugfolioj, aldonitaj al la manĝokuponaroj en distrikto Praha 2, mil trikoloraj afiŝoj estis fiksitaj sur la strataj porafiŝaj tabuloj tra la tuta Prago. La 2-an de oktobro estis malfermitaj tri kursoj, por komencantoj laŭ Ĉe-metodo, por mezprogresintaj kaj por plej progresintaj, entute 140 lernantoj. Instruas J. Bendová, J. Vítek kaj A. Slanina.

1950/12/13 „La majstro vivas“ – sentoplena radiofilmo de Miloš Nývlt prezentita de kolektivo (Balda, Bárochová, Lorenz, Mank, Nývlt, Nývltová) kun muzik-kulisoj. Iluminita la busto de Zamenhof

Fine de 1950 la klubo havis 426 membrojn (en 1949 511 membrojn). Rudolf Hromada, okaze de lia 60-a vivojaro, estis elektita honora membro de la klubo.

1951 la klubo fariĝis ano de OB 2 (Kleriga institucio en Praha 2) kaj samtempe perdis sian kunvenejon kaj lokon por sia libraro. S-ano Šustr akceptis ĝin kaj serĉis ejon por ĝi.

La kunvenoj okazis regule ĉiumerkrede en la restoracio U Šumavy, Štěpánská 3. De la 6-a de oktobro ĝis la 8-a de decembco okazis Esperanta seminario en Virina klubo, ve Smečkách 26, ĉiusabate de la 18.30 h kun priesperantaj sciencteknikaj prelegoj.

1951/12/01 prelegvespero en Zenger-aŭskultejo de la Ĉeĥa Teknika Altlernejo, Resslova 9, je la 18.30 h: Rudolf Hromada: la Ĉs. E-movado, RNDr. Miloslav Pulchart: Atomenergio dum paco kaj en milito

1951/12/08 gaja Nikolaa vespero, aranĝata de la Junularo de la Klubo, en malgranda salono sur Slava insulo, de la 19-a horo.

La kluba Junularo akiris propran klubejon, registris 100 membrojn, eldonas cirkuleron Vokas vin Praha kaj prizorgas varbkestojn. Gvidanto Jan Neumann

1952/01/30 Arta vespero en la klubo, reĝisoris Eva Suchardová

1952/03/12 Ĉeĥa-Esperanta arta vespero kun prezento de teatraĵo Námluvy Pelopovy de J. Vrchlický, kun muzika akompano. Ludis: Eva Nývltová, Eva Suchardová, Soňa Živná, Jan Neumann, Pravoslav Sádlo kaj D-ro Jar. Sucharda.

Kroniko Patera

1952/04/23 Solena programo por la 35-a datreveno de la mortotago de D-ro L. L. Zamenhof kun deklamo de poemoj, pianludado, prelego de R. Hromada „La verko de Zamenhof vivas kaj vivos“ kaj tetraĵo de J. Baghy „Granda Ludo“.

1952/09/06 okazis en Prago la lasta kunveno de la komitato de EA ĈSR; oni submetiĝis al la ministeria postulo de likvido de la Asocio kaj subiĝis al la desupra politika premo (voĉdonis por 23, kontraŭ 3, sindetenoj 15). La Asocio ĉesis ekzisti. Sed la esperantista vivo ne ĉesis. Plu laboris kluboj kaj ĉefe la junularo, kiu aktivis jam ekde la 1950-a jaro.

1952/12/13 okaze de la 50 jara jubileo de la klubo okazis solena vespero en la halo de Virina Klubo Ve Smečkách kun arta programo kaj muziko. Okaze de la naskiĝo de D-ro Zamenhof oni prezentis unuaktan teatraĵon speciale verkitan por tiu vespero de J. Baghy.

1953 en marto komencis aperadi Bulteno de Esperantista Klubo Ĉe Osvětová beseda en Praha 2 en eldonkvanto 1000-1800 ekzempleroj; redaktoro: Josef Vítek, ekspedicio Anĉi Bárochová.

1953/04/08 en la klubejo – restoracio U Šumavy – okazis Varietea Jozefa Vespero, reĝisorata de Ant. Slanina.

1953/06/05 artisma vespero, en kiu poemojn de E. Privat, K. Kalocsay kaj J. Baghy muzikigitaj de Št. Urban kantis Marta Ledková, Bapton de caro Vladimir de K. Havlíček-Borovský en traduko de T. Pumpr deklamis Št. Urban, poemojn deklamis Eli Urbanová. La artisma vespero ripetiĝis 1953-10-07

1953/10/25 Vespero de Fráňa Šrámek, prezentis Eva Suchardová kaj A. Seemann

1953-11-04 Gaja Vespero – aranĝis Ant. Slanina + Junularo

1954/01/13 depost tiu ĉi tago la kunvenoj de la klubo okazis ĉiumerkrede en Virina Klubo (Malgranda Scenejo), Ve Smečkách

1954/02/03 Gloraj momentoj – artisma vespero, rolis Eva Suchardová kaj la kolektivo

1954/05/25 bunta vespero „Kantoj kaj ama poezio“, partoprenis Josef Heriban, solisto de opero de Nacia teatro, Eva Suchardová, Ant. Seemann k. a.

1954/12/16 Vespero de premiitaj konkursaĵoj. Estis prezentitaj orginalaj verkaĵoj, premiitaj en la Internacia Beletra Konkurso de UK 1954: komedieto de Ant. Semann: „Korespondu!“ (ludis la aŭtoro, E. Suchardová, D-ro J. Sucharda kaj L. Rejtharková), unuakta dramo de Ant. Semann „Mi esperas“ el la vivo de D-ro L. L. Zamenhof (ludis D-ro Sucharda la ĉefrolon, Suchardová, Semann, Rejtharková kaj Ant. Slanina), poemojn de E. Urbanová kaj E. Suchardová recitis E. Suchardová. Tiuvespere estis anoncita la ekfunkcio de artisma kolektivo de EKP „Verda Ĉaro de Julio Baghy“ kaj legita aproba letero de J. Baghy, kies dorlotata revo estis tiamaniere plenumita.

En decembro denove eklaboris la E-Junularo en Praha (V. Novobilský, V. Novotný.)

1955/04/13 artvespero honore al L. L. Zamenhof, aranĝita de VĈJB en granda salono de Malgranda scenejo.

Dum junio estis aranĝita Somera Filma Popola Universitato de EKP en la klubejo, Esperantaj komentoj al ĉiu filmo preparis Josef Vítek en kunlaboro kun Osvětová beseda ONV 2 kaj popoleduka filmagentejo de KNV en Praha. La prezentadoj okazis la 1-an, 8-an, l5-an, 22-an kaj 29-an de junio 1955.

Kroniko Patera

1955/07/13 en Tutŝtata Konferenco en Otrokovice VĈJB prezentis artan programon, en kiu la du teatraĵetojn de Ant. Seemann „Korespondu“ kaj „Mi esperas“. La saman programon prezentis VĈJB ankaŭ en la Somera kolegio de Esperanto en Doksy.

1955/11/27 Nikolaa vespero de la Ejunularo en la palco Blaník (Fénix), Václavské nám. 56. Matene 1955-11-28 okazis Regiona konferenco de la Esperanto-Junularo.

1955/12/14 en Malgranda Scenejo okazis solena artvespero de VĈJB honore al nia Majstro kun jena programo:

1. La 75-a poemo el la kolekto „La vagabondo kantas“ de J. Baghy
2. H. Sudermann: La hejmo. Laŭ la orginala dramo reverkis kaj e-igis A. Seemann
3. K. Havlíček- Borovský: Bapto de caro Vladimír
4. J. Baghy: Ni deksepjaraj. Ni sepdekjaraj.
5. K. Ĉapek: Patrino. Muntaĵo el la dramo, tradukis R. Hromada.

Ĉe Osvětová beseda ONV 2 (Kleriga instituto de Praha 2) daŭras tri kursoj de Esperanto, instruas E. Riháčková, A. Slanina kaj E. Suchardová.

1956 en januaro komenciĝis porblindula kurso en *Deylův ústav*, gvidis Vl. Novotný

1956/03/14 klubvespero dediĉita al adiaŭo al gesamideanoj Ginz, kiuj forvojaĝos al Israelio. Poemojn deklamis Suchardová, prelegis Pumpr, Kamarýt kaj Šustr. La 24-an de marto 30-kapa amaseto adiaŭis la geedzojn en la fervoja stacidomo.

1956/04/11 Artvespero de VĈJB honore al la majstro: Maryša – 4-akta teatra dramo de fratoj Mrštík, por VĈJB akomodis A. Seemann, esperantigis E. Suchardová. La teatraĵo prezentita duafoje 1956-05-07, ankaŭ en Malgranda Scenejo

1956/06/04 premiero de E-prezento de „Pigmaliono“ de G. B. Shaw, en Malgranda Scenejo, E-a traduko de E. Suchardová.

1956/07/18 Jean Forge prelegis en la kluba kunveno pri siaj novaj verkoj

1956/07/25 Jerzy Uspieński parolis pri la pola movado.

1956/08/16 revenvoje el la UK en Kopenhago la klubkunvenon partoprenis hungaraj s-anoj: Baghy, Balkanyi, Domokos, Marton kaj d-ro Matéffy

1956/08/15 prelegis prezidanto de Bulgara E-ista Asocio Georgi Dolapĉiev

1956/10/02 malfermitaj kursoj: por infanoj (Eva Řiháčková), tri por komencantoj (Ant. Slanina, Jul. Bendová, Lad. Kynčl), por progresintoj (Eva Seemannová)

1956/10/22 Hungara-Ĉeĥoslovaka Vespero en Malgranda Scenejo, kun ĉeesto de Julio Baghy kaj kun reprezentantoj de Bulgario (Georgi Dolpaĉiev), Kroatio (Lucia Borĉic), Pollando (s-ino Gniazdovska), Ĉinio (Yeh Ĉun Ĉjen), kultur-ataŝeo de hungara ambasadorejo.

1956/12/12 Solena vespero honore al L. L. Zamenhof en la granda salono de Malgranda Scenejo. VĈJB prezentis du orginalajn teatraĵojn:

Marjorie Boulton: Ĉe l' akvo de forgeso (drameto en versoj)

J. Baghy: Dum tondras kanonoj, verkita por la VĈJB kaj dediĉita al Eva Seemannová

Kroniko Patera

1957/14/20–24 Esperantista Klubo ĉe Kleriga Instituto de ONV Praha 2 kunlabore kun Tutŝtata Konsulta Esperanto-komitato aranĝis seminarion por Esperanto-funkciuloj, en kies kadro la 20-an de aprilo je la 19-a horo en Malgranda Scenejo VĈJB prezentis „Nora“ (Hejmo de ludiloj) de H. Ibsen, trad. Eva Seemannová.

1957/11/09 Solena Vespero okaze de Granda Oktobra Socialista Revolucio kun artisma programo kaj kun prezento de fragmento el tetraĵo „Patrino“ de Karel Čapek, en traduko de R. Hromada, aranĝo kaj reĝio Antoni Seemann.

1958/05/15 Verda Ĉaro de Julio Baghy prezentis en Malgranda Scenejo fabelon de Nazim Hikmet „Legendo pri amo“, tradukitan de Eva Seemannová, kiu kreis la rolon de la reĝino Mahmene Banu.

1958/06/07 duafoje prezentita la teatrajo „Legendo pri amo“ antaŭ 150 spektantoj, inter ili la aŭtoro Nazim Hikmet, kiu esprimis sin favore pri la Intemacia Lingvo.

1958/10/15 okazis elekto de nova kluba komitato kaj de nova kluba prezidanto s-ano Jaroslav Mařík.

1959 Dum la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio prezentis Verda Ĉaro de Julio Baghy la teatraĵon „Pigmaliono“ de G. B. Shaw.

1959/10/10 en la Malgranda Scenejo okazis ripeto de „Pigmaliono“, sukcesinta en Varsovio. Ĝi estis la lasta prezentado de VĈJB.

1959/11/20 mortigis sin (kun sia familio) membro de nia klubo Jožka Staněk, ĵurnalisto, tradukanto de poezio en Esperanton (pseŭdonime kata kano) post esplorado fare de la sekreta ŝtata polico.

1960/04/30 je la 19-a horo la komitato de EKP solene malfermis novan propran bibliotekon en str. Týnská 3 en Malnova Urbo. S-ino Brotánková deĵoris en la biblioteko ĉiuvendrede de la 16-a ĝis la 18-a horo. Dum tiuj horoj klubanoj povis pruntepreni librojn.

1961/07/06 okazis la unua 5-minuta E-lingva elsendaĵo en kadro de disaŭdigo por Aŭstrio (partoprenis Zajíček/Hasprunár, Cíchová, Jermář).

Tiuj programoj okazis unufoje monate ĝis oktobro 1966.

1962 EKP estis fakrondo de Regiona Kultura Domo en Praha 1, ĝi havis 240 anojn. Efektiviĝis 51 klubaj kunvenoj kun entute 1376 ĉeestintoj, el eksterlando venis 57 gastoj. Kunvenejo estis en Praha 1, Ve Smečkách 26, kunvenoj ĉiumerkrede kaj tie ankaŭ okazis kursoj por komencantoj kaj por progresintoj.

1962/12/05 rezignis la ĝisnuna prezidanto Mařík kaj ĝis jarfino gvidis klubajn aferojn s-ano Slanina.

1963/01/09 estis elektita nova prezidanto s-ano Miloš Rudolf

1963/02/22 la kunvenoj okazas ĉiuvendrede en nova klubejo en Řeznická str. 17 (inter 19.30 – 22.00 h). La klubejo estas modeme meblita, eblas projekcii filmojn, lumbildojn, aŭskulti radion aŭ magnetofonajn sonbendojn.

1964/02/10 vizitis la klubon la 1-a sekretacio de la Reĝa Dana Ambasadorejo en Praha s-ro Eskil Svane, eminenta esperantisto, kiu rakontis pri kulturaj kaj historiaj belaĵoj de sia patrujo.

Kroniko Patera

1964/02/14 ĝenerala kunveno de la klubo, ĝi komenciĝis je la 20.15 h. kaj finiĝis je la 23.30 h. Pri la kluba laboro dum pasinta jaro kaj pri la laborplano 1964 raportis la kluba prezidanto M. Rudolf. S-ano Nevan fondis malgrandan, sed viglan junularan E-rondeton ĉe Ĉs. Junulara Asocio (SĈM).

1964/06/26 la ĉefurbestro de Praha akceptis reprezentantojn de EKP, sekretarion Vl. Pražák kaj kulturan referenton J. Ondráček, kiuj transdonis al li leteron kaj donacojn de urbestro de Bourmemouth s-ro Harold Alfred Benvell.

1964/08/07 la kulturdomo de Praha 1, kies interesrondeto la klubo tiam estis, disponigis al la klubo ejon en la Komunuma domo por la kluba biblioteko.

1964/09/19 la bibloteko estis parte transigita el Týnská str. en la ejon en la strato U Obecního domu. Sed la klubanoj kaj precipe la junularo de la klubo ne estis kontentaj pri tio kaj kunvenis plu en la bibloteko en Týnská-str.

1965/02/18–22 vizitis Ĉeĥoslovakion la ĉefurbestro de Vieno s-ro Franz Jonas. La 14-an de februaro delegitaro de la klubo estis invitita de aŭstra ambasadoro en Prago partopreni feston honore al s-ro Jonas en la aŭstra ambasaro. En ĉeesto de la aŭstra ambasadoro la kluba delegitaro transdonis al s-ro Jonas klubajn kaj personajn donacojn kaj salutadreson.

1965/04/02 la klubo fariĝis rondeto de Parko de Kulturo kaj Ripozo de J. Fučík

1965/04/25 en la teatro S. K. Neumann prezentis La Ŝtata Teatro Popular el Lodž teatraĵon „Kataki signifas malamiko“ de Shinon Wincelberg en Esperanto.

1965/09/10 elektita nova komitato, nova prezidanto fariĝis Jindřich Ondráček. Estis rekomendite la kluban biblotekon komplete instali en la Týnská strato, sed la administrado de PKFJF.

1968/08/12 Esperantista Klubo en Praha estis rekonita de la urbaj aŭtoritatoj kiel memstara organizaĵo, do ne plu interesrondeto de la Parko de Kulturo kaj Ripozo de Julius Fučík

1968/09/27 la plenkunsido de la Klubo elektis novan estraron kun D-ro Rudolf Horský kiel prezidanto

1968/11/21–24 okazis en Prago fakseminario organizita de la junulara sekcio kun celo ellabori novan koncepton de kreado kaj eldonado de Ĉeĥaj E-lernolibroj. Partoprenis 20 elektitaj esperantologoj kaj pedagogoj, laborantoj de la ĉeĥa E-movado

1968 en la junulara gazeto „Pionýrská štafeta“ estis publikigita E-kurso de Eli Urbanová

„Demonstra“, ĉeĥoslovaka bulteno por demografio kaj statistiko, eldonata de Ŝtata statistika oficejo en Prago en kvar mondlingvoj, enhavis tabelojn en Esperanto!

1969/09/08 mortis la iama longtempa prezidanto de la klubo Jar. Šustr post grava malsano; la morto-anoncon subskribis Ant. Slanina, la vicprezidanto de la klubo

1969/09/22 en la klubo prelegis J. C. Wells, la prezidanto de la londona klubo

1969/09/26 eksterordinara kunveno; parolis s-ro Eizo Itoo, reprezentanto de Oomoto

1969 ekde oktobro estis du kursoj por komencantoj en Prago: per aŭdvida metodo INTER instruis A. Slanina en elementa lernejo en Sázavská str. kaj Prof. D-ro R. Horský en la Fakultato de Hus – en Prago estis fondita E-sekcio de Asocio de Ĉs. Filatelistoj

Kroniko Patera

1970/03/23 elektita nova komitato kun prezidanto Prof. D-ro R. Horský

1970/12/20 forpasis en Prago post mallonga malsano instruistino Julie Šupichová, honora membro de UEA, de EAĈSR kaj de ĈEA, en aĝo de 86 jaroj

1970 dum la tuta jaro la klubkunvenojn vizitis entute 3142 personoj, el ili 91 eksterlandanoj el 22 landoj

1971/03/16 la klubo kunvenas en nova klubejo en restoracio „Zámeček“ (Kasteleto) en Praha 7, Letenské sady, ĉiumarde je la 19-a horo; en jarkunveno elektita nova komitato: prezidanto D-ro R. Horský, vicprezidantoj A. Slanina kaj A. Bartošík

1971/06/01 la regulaj mardaj kunvenoj okazas en nova klubejo en ZK Strojexport, Praha 1, Venceslaa placo 56 (en pasejo Blaník)

1971/06/08 tie okazis artisma vespero pri Petr Bezruč; lian verkon prezentis D-ro Novobilský, liajn poemojn deklamis kaj kantis kantojn de Beethoven, Dvořák kaj Schubert s-ano M. Smyčka, pianludis V. Novobilský

1972/02/29 en la Vjetnama Kultura kaj Informa Centro en Prago la reprezentanto de la vjetnama ambasado Phan Duong akceptis la reprezentantoj de ĈEA, EKP kaj 23 infanojn el lernejo en Bubeneč, per kio kulminis la kampanjo por helpi al la batalanta vjetnama popolo. En la kampanjo partoprenis 86 esperantistaj kaj 72 neesperantistaj organizaĵoj, lernejoj, kulturcentroj, biblotekoj kaj muzeoj, kiuj okazigis 237 prelegojn, ekspoziciojn, filmprezentandojn kaj kolektis 22 mil paperfoliojn kaj 3010 kajerojn por vjetnamaj lernantoj, infanludilojn kaj aparte sumon de 18 530 Kčs. La kampanjo daŭris plu, ĝis majo 1972

1972/03/26 nova komitato de EKP kun prezidanto Arĥ. J. Drlík kaj vicprezidantoj A. Bartošík, A. Slanina kaj D-ro Horský

1972/06/06 instruistino M. Juřenová prezentis sian modelan laboron kun infanoj; ŝi instruas Esperanton en lernejo en Bubeneč

1972/06/27 vizitis la klubon la redaktorino de Heroldo de Esperanto A. Sikorska kun sia edzo G. C. Fighiera, kaj japana e-isto Sumija

1972/09/10 en aĝo de 66 jaroj mortis JUDr. Tomáš Pumpr, honora membro de ĈEA kaj membro de Akademio de Esperanto, elstara lingvisto kaj poezi-tradukisto

1972/10/03 solena vespero honore al la forpasinta D-ro Pumpr

1972/11/25 solenaĵoj de 70 jaroj de la klubo en Kulturcentro Gong en Vysočany

1972 la klubo komencis entrepreni aŭtobusajn ekskursojn, el kiuj la plej sukcesa estis „Per Esperanto tra Balkano“ – tra Hungarujo, Rumanujo kaj Bulgarujo. En ĉiuj ĉi landoj estis aranĝitaj renkontiĝoj kun esperantistoj.

1974/12/16 solena vespero okaze de la 115-a nasiĝdatreveno de L. L. Zamenhof kaj okaze de finiĝo de la „Jubilea jaro de la Pacmovado“. Prelegis pri Zamenhof O. Kníchal – MEM-sekciestro de ĈEA, ĉeestis vicprezidanto de la Regiona Packonsilantaro en Praha Jiří Wolt kaj raportisto de ČTK. Ĉeestis ankaŭ J. Vítek kaj Z. Křimský. D-ro P. Sádlo-Páv kun studento prezentis violonĉelan koncerton.

Kroniko Patera

1975/01/20 la muzik-emsemblo Collegium di flauti prezentis al nia klubo koncerton el komponaĵoj de Haendel, A. Corelli, L. Sluka, J. Hubert, A. Parch kaj M. Štědroň. Prof. Václav Žilka ludis je fluto, prof. Jar. Fantyš je gitaro, prof. D-ro P. Sádlo-Páv je violonĉelo kaj Jana Petzová je fluto. La programerojn anoncis kaj du E-lingvajn rakontadojn enmetis P. Sádlo (1. Kiel mi fariĝis esperantisto, 2. Travivaĵoj el la „Verda Ĉaro“).

1976/01/06 la jarkunveno elektis nova prezidanto Ladislav Kynčl

1976/02/07–08 en salono de restoracio Skalka en Praha 10 okazis la II-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto Asocio.

Omaĝe al la II-a kongreso de ĈEA s-anino Eli Urbanová en februaro aranĝis ekspozicion pri Esperanto en la Muzika Teatro Karlín; la ekspozicion spektis multnobraj vizitantoj.

Ekde la 16-a de marto la kunvenoj de nia klubo okazis en restoracio Skalka.

1977/03/05 la solenaĵoj de la 90 jaroj de Esperanto, 75 jaroj de la Esperantista Klubo en Praha kaj 60 jaroj ekde la morto de d-ro Zarnenhof komenciĝis en la salonego de la Urba Bibloteko en Prago je la 13.30 h. Parolis Ladislav Kynčl, d-ro Nývlt, Josef Vítek kaj Drahomír Kočvara. En la kultura parto deklamis poemojn Eva Seemannová, D-ro P. Sádlo-Páv prezentis suiton por violonĉelo de J. S. Bach kaj M. Smyčka prezentis en Esperanto perlojn de la opera kaj kanta trezorejo.

1979 En Prago okazis la III-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

1979/04/17 vepero de poezio de Jiří Karen okazis en la klubejo en restoracio Skalka. Ĉeestis 80 klubanoj kaj 32 gastoj, inter ili poeto Josef Rumler kaj verkisto d-ro Fr. Kožík. La versojn de Karen prezentis E. Seemannová.

En la jaro 1979 la klubanoj aktive partoprenis en la kolektado de uzitaj krudaĵoj kaj tiamaniere helpis al la nacia ekonomio. Ili kolektis 2 168 kg da malnova papero, 127 kg da fero, 100 kg de tekstilo, 25 kg da plumbaĵoj kaj 8 kg da zinko, sume 2 428 kg da krudaĵoj.

1980/01/17 la kunvenoj okazas nun en restoracio Rezeda en Praha 10 – Strašnice, Průběžná str. Sed ekde komenco de julio la kunvenoj okazis en Vinohrady, en agitcentro en Baranova str.

Nia klubo estis devigata ofte ŝanĝi siajn kunvenejojn. Post la kunvenejo en Řeznická str. , kiu tre plaĉis al ni, ni kunvenis en la salono en la palaco Fénix, kie estas kinejo Blaník, tio estis dank' al s-anino Míčová. Sed post du jaroj la klubo devis translokiĝi al aliaj lokoj: kafejo Družba, OKD Lucema, kafejo U Brumbrlíčků, kafejo Savarin, restoracio Zámeček en parko Letná, restoracio Nigra Bierfabriko (Černý pivovar), restoracio Na Skalce en Praha 10, restoracio Rezeda en Praha 10, agitcentrejo en Žižkov, Baranova str., agitcentro en Praha 10 – Ĝardena Urbo, Malinová str.

Dank‘ al s-ano Brandejs la klubo akiris malgrandan propran ejon en Praha 1, Vejvodova str. , do en la centro de la urbo, proksime al la Asocia oficejo en Jilská str. La ejo estis komence unuĉambra kun necesejo, sed poste duĉambra kun antaŭĉambro.

1981 estis aranĝitaj 28 prelegoj, plejparte kun diapozitivoj; antaŭ la prelegoj s-anino Bendová legis serion da prelegetoj pri la historio de Esperanto, pri Zamenbof kaj pri la unuaj E-kongresoj. Dum la somera sezono vizitis la klubon 26 eksterlandaj geesperantistoj.

Okazis tri kursoj por komencantoj (D-ro Horský 2x, Kynčl) kaj du por progresantoj (S. Kníchalová, D-ro Horský).

Kroniko Patera

Pri niaj montrofenestroj tre diligente zorgis kaj ilian enhavon regule interŝanĝis s-anoj Kukačka kaj Brandejs.

Klubanoj regule helpis al la nacia ekonomio per kolektado de malnova papero; ĉijare oni kolektis pli ol 1200 kilogramojn.

La kunvenoj okazis en Klubejo de pensiuloj en Praha 10 – Ĝardena Urbo, Malinová str. 25. Kiel prezidanto estis reelektita J. Ondráček.

Disvolviĝis bona kunlaboro inter du ĝemelaj E-kluboj Praha – Berlin. Fine de somero vizitis berlinanoj nian klubon kaj dum novembro venis delegacio de la praga klubo al Berlin por prelegi pri nia ĉefurbo.

1982/05/03 Foir-kantojn en Esperanto prezentis E-trio (E. Seemannová + geedzoj Budínský)

1982/10/23 okazis solena kunveno okaze de la 80-a datreveno de la Klubo en la kulturdomo Gong, en Praha 9, Sokolovská str., kun posttagmeza kultura programo (prof. Sádlo, E-trio, s-ano Deke el GDR, M. Smyčka, Spořilov-kvarteto, infanĥoro).

1982/11/29 Eva Seemannová prezentis: Ota Dub – Ĉu mi estas bestio? – kun persona ĉeesto de la verkisto

La junulara sekcio de la klubo kunvenas regule ĉiun lastan lundon de monato, gvidas Ing. Jan Pečený.

1983/05/01 esperantistoj unuafoje partoprenis en la unumaja manifestacio kun la flagoj Ĉeĥoslovaka kaj Esperanta kaj kun devizo „Esperantem za mír“ (Per Esperanto por paco)

1983 okazis en Prago „Monda Asembleo por Paco kaj Vivo“ (Monda Pac-Kongreso), en kiu ĈEA kunlaboris pri „Problemoj de internacia komunikado“

1983/10/26 je la 19.30 h. en klubo de lernejoj kaj scienco ROH, Praha 1, Na Příkope 10 (Savarin) „Bezručův kraj v Praze“ prezentis vesperon de fabeloj kaj mitoj de Fr. Lázecký, membro de literatura sekcio de ĈEA; la fabelojn ĉeĥlingve prezentis Eva Seemannová

1984/02/20 En la jarkunveno estis elektita nova prezidanto de la klubo – s-anino Helena Štruncová

1984/05/01 la verda flago denove flagris dum la unumaja manifestacio, dank' al la praga E-junularo kaj precipe al s-anino Pavla Jodasová

1985/05/01 denova partopreno en unumaja manifestacio.

1986/01/27 surbendigita kompilaĵo de meditemaj versoj de Eli Urbanová voĉe de Eva Seemannová.

1986/02/24 la jarkunveno de la klubo elektis s-anon Jaroslav Mařík honora prezidanto de la klubo

1986/04/16 nia membrino, la mondkonata E-poetino Eli Urbanová estis elektita membro de Akademio de Esperanto

1986/05/15 en la matena programo „. . . a léta běží“ (kaj la jaroj pasas) la Ĉs. radio elsendis rakontadon de RNDr. Vlastislav Zázvorka, CSc., 83-jara laboranto de Nacia Muzeo kaj dum

multaj jaroj direktoro de Nacia Muzeo, membro de nia klubo. Li diris, ke por siaj fakaj kontaktoj kun eksterlandaj sciencistoj li uzis ankaŭ Esperanton

1986 en aŭgusto gvidaj agantoj de Agado E, (Esperantistoj esperigas esperantojn) fruntloke kun s-ro J. A. Tuinder vizitis nian klubon kaj informis pri la Agado E. Oni funkciigis tri optikajn laborejojn en Ganao kaj pluan en Kamecunio, kiuj povas fari sian laboron dank‘ al la helpo de diverslandaj esperantistoj, kiuj kolektis kaj forsendis kvantojn de malnovaj sed uzeblaj okulvitroj al Ganao. Grandan meriton pri tio havis nia membro Prof. D-ro Rudolf Horský.

1987/03/02 la kunvenoj okazas ĉiulunde en nova klubejo en Kodanská str, en Praha – Vršovice

1987/06/01 rememoron pri Pigmaliono de Shaw en Esperanto kun elektitaj scenejoj dum nia klubkunveno prezentis: E. Seemannova, P. Sádlo kaj J. Ondráček

1987/09/23 solena koncerto okaze de la Centjariĝo de Esperanto kaj la 85-ajariĝo de nia klubo en salonego de Klubo de lernejoj kaj sciencoj en Praha 1, Na Příkopě 10 – „Savarin“. Mallongan bonvenigan paroladon prezentis la prezidantino de la klubo Helena Štruncová, la pluan programon profesie prezentis artistino Libuše Erbsová, kantis operkantistoj de la Nacia Teatro en Prago, ges-roj Dalibor kaj Sona Janotovi, Ludmila Greinerová, Luďa Dvořáková kaj Karel kaj Jindřiška Zemanovi, per piano akompanis ilin la direktanto de opero de Nacia Teatro s-ro B. Váchal. Ili kantis du bibliajn kantojn E-lingve (unu en traduko de Josef Vích), ariojn kaj duetojn el ĉeĥaj kaj mondaj operoj kaj operetoj, ĉeĥajn popolajn kaj artajn kantojn E-lingve kaj ĉeĥlingve. Prof. Pravoslav Sádlo-Páv ludis la duan parton de la violonĉela koncerto de Dvořák kaj la eniran monologon de Ifigenio sur Taŭrido de J. W. Goethe, tradukitan de Zamenhof, recitis la dramatistino Eva Seemannová.

1987/11/16 en parko en kvartalo Vršovice estis plantita Esperanta memorarbo tilio je la 15-a horo kun ĉeesto de multaj geesperantistoj ne nur el Prago, sed ankaŭ el aliaj lokoj de nia lando.

1987/11/22 de la 13.30 h. en la klubejo en Kodaňská-str. estis aranĝita fulmrapida ŝak-turneo.

1987/11/23–29 en la klubejo en Vejvodova-str. estis aranĝita ekspozicio de manlaboraĵoj (slojdoj), ekz. belaj kolore harmoniaj brodaĵoj, kroĉtrikaĵoj, braceletoj kaj kolieroj el ledo, modernaj trikvestaĵoj kaj diversaj etaĵoj. Sendis ilin 16 gee-istoj el Bohumín, Olomouc, Pardubice, Slavičín, Trutnov, Hradec Králové kaj Praha. La ekspozicion vizitis pli ol 350 homoj, kiuj aŭdis E-kantojn el bendoj kaj ricevis informojn kaj diversajn inform-materialojn.

1988/02/22 jarkunveno elektis novan komitaton, la nova prezidanto fariĝis Ing. Ludvík Veselý

1988/05/12 en la granda salono de la agit-centro en Kodanská str. okazis la Unua Publika Kunveno de nia klubo. Kunvenis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ neesperantistoj, invititaj per grandaj afiŝoj. Pro tio la tuta programo estis ĉeĥlingva. Ĉiujn bonvenigis s-anino H. Štruncová, kiu koncize informis pri Esperanto kaj pri la aktivecoj de niaj klubanoj. Poste sekvis teatra prezentado de Eva Seemannová. Speciale por ŝi poeto Čestmír Vidman verkis teatraĵon „Kvindek jarojn sub la masko“, en kiu la aktorino revenis en sian junaĝon, kiam ŝi unuafoje staris sur la scenejo kaj popaŝe prezentis al ni la plej ŝatatajn rolojn de la monda kaj ĉeĥa repertuaro, kiujn ŝi iam ludis. Ne mankis mencioj pri Esperanto kaj pri la iama Verda Ĉaro.

1988/06/20–26 ekspozicio de infandesegnaĵoj en la klubejo en Vejvodova str.

1988/10/06 en la agitcentro en Kodanská-str. okazis plua informkunveno por la neesperanta publiko kun prelego pri Turkio kun lumbildoj fare de Ing. A. Saxl kaj kun ĉeĥaj popolaj kantoj en Esperanto kantataj de Ing. Jan Pečený

Kroniko Patera

1988/10/26 KEP kune kun la nacia entrepreno Výstavnictví Praha aranĝis Danc-vaporŝipon. La ŝipo ekvojaĝis je la 17.30 h. de Palacký-ponto, revenis ĉirkaŭ la 23-a horo. Ludis la E-grupo Barbuloj.

1988/12/02 esperantistoj partoprenis la grandan societan vesperon kun kultura programo kaj dancamuzo, kiun aranĝis ĈEA en la Kulturdomo Na Vartě.

Dum la vespero laborantoj de la ŝtata filmo filmis scenojn por prepara mallonga filmo pri Esperanto

1989/01/16 la klubkunvenon en Kodaňská-str. vizitis la iama junularestro de la klubo Mikuláš Nevan el Usono

1989/02/20 la jarkunveno elektis novan komitaton, nova prezidanto fariĝis Ing. Zbyněk Khail

En la lernojaro 1988/89 estis tri kursoj por komencantoj kun entute 68 lernantoj (instruis Ing. Veselý, s. Křesinová kaj Ing. Dvořák) kaj du kursoj por progresintoj kun 39 lernantoj (instruis H. Štruncová).

1989/06/20 en la ŝtata film-institucio Krátký flm oni provprojekciis la ĵus finitan mallongan koloran filmon Esperanto znamená naději (Esperanto signifas esperon)

1989/10/09 starigita memorŝtono ĉe la tilio en la parko Vršovice

1991/02/18 jarkunveno elektis novan komitaton, nova prezidantino fariĝis s-anino Květa Hubnová. Ĉar la agitcentro en Kodanská estis privatigita, la kunvenoj de la klubo okazas de nun en malgranda kluba kunvenejo en Vejvodova str.

1992 kelkaj klubanoj praktikas ĉiumonatajn sabatajn ekskursojn: 25.4. al Arbaro de Kunratice, 30.5. al Průhonice, 13.6. al Kobylisy (san-arealo, observejo, pafejo), somere okazis kunvenoj tra Prago: 27.6. Petřín. 11.7. somerkasteleto Hvězda (Stelo), 25.7. Šárka-valo, 8.8. Kastelo Troja, 22.8. Valdŝtejn-palaco + Komenio-muzeo.

1992 somere okazis en Prago la Antaŭkongreso de la 77-a Universala Kongreso en Vieno. Origine la UK estis planita por Prago, okaze de la solenaĵoj de 400-a datreveno de naskiĝo de J. A. Komenský, la antaŭvidinto de artefarita internacia lingvo. Sed pro la okazintaj politikaj kaj precipe ekonomiaj ŝanĝoj la UK ne povis okazi en Prago, pro tio okazigi ĝin akceptis aŭstraj esperantistoj. Por Prago simbole restis la Antaŭkongreso.

1992/07/19–25 La Antaŭkongreso de la 77-a UK en Vieno okazis sub la aŭspicio de ministro de kulturo Milan Uhde

1992/07/22 en la kadro de la Antaŭkongreso okazis „Internacia seminario pri Komenio“ en la Kavalira salonego de la Palaco Valdŝtejn.

La saman tagon okazis Esperanta geedziĝo de japanaj geesperantistoj f-ino Miyuki Arai kaj s-ro Kazua Hayadaki en Malnovurba Urbodomo

1992/10 klubanoj okazigis ekskurson al Hrusice, al ekspozicio pri pentristo Josef Lada. Tie estis videblaj la kanaria kaj praga Esperantaj eldonoj de Bapto de caro Vladimir kun ilustraĵoj de Josef Lada.

1992/11/06–08 la solenaĵojn de 90-a jariĝo de nia klubo ĉeestis cento da gesamideanoj en la restoracio Na Zvonařce

Kroniko Patera

1992/11/08 la Ĉs. televido elsendis popularan amuzan konkursprogramon Videostop kun ĉeesto de esperantistoj (ĉeestis 43 ges-anoj, la programgvidanto J. Rosák diris, ke lia edzino lernis Esperanton – konkursis D. Kočvara, M. Severa kaj K. Hubnová, kiu venkis kaj instigis J. Rosák lasis sin foti kun ŝi)

1994/02/21 la jarkunveno elektis novan komitaton: prezidanto – Jiří Patera, vicprezidanto Květa Hubnová, mastrumado Jindřich Ondráček, kasisto Jar. Šindler, instruisto kaj propagandisto Ing. Blažková, prezidantino de kontrolkomisino Anna Kubová, membro Josef Sojka.

La klubo estis devigita likvidi la klubejon en Vejvodova strato. La granda biblioteko de la klubo estis transportita al la Esperanto-Muzeo en Česká Třebová.

1994/07/07–14 okazis simpozio de la Akademio de Esperanto, kiun aranĝis la Kongresa kaj Kleriga Entrepreno KAVA-PECH. La prelegoj aperis en libro „La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto“ – por la simpozianoj kaj partoprenantoj de la SAT kaj handikapula kongreso en Kladno okazis solena koncerto en la Nacia domo en Smíchov (kantis Kudlíková el Nacia Teatro, Smyčka el la operejo en Ustí n. L. , J. Vích el Nacia teatro).

1994/07/09–14 en Prago okazis la Antaŭkongreso de la 67-a SAT-kongreso en Strážnice

1994/10/07–09 en Praha 4 – Kunratice en Dioceza centro de junularo Nazaret okazis renkontiĝo de IKUE-anoj el Pollando, Germanio kaj Ĉeĥio. La 8-an de oktobro celebris Sanktan Meson en Esperanto la ĉefepiskopo Miloslav Vlk kaj kuncelebris la pola gasto sac. Karol Mozor.

1995/02/24 „Korean vesperon“ prezentis en la klubo tri junaj gekoreoj, kun rakontado kaj popolaj kantoj. Unu el ili, junulo leminta ĉe s-anino Chrdlová en Seulo, parolis plejparte ĉeĥe, fierante pri la rezulto de sia studado de la ĉeĥa lingvo

1995 EKP trovis novan kunvenejon en la klubo de pensiuloj en Smíchov. En la klubprogramoj partoprenis prof. Mráz, Ing. Pluhař, Ing. Trojan, ges-roj Chrdle, s-ano Mařík, s-anino Maudrová k. a. La klubkunvenejojn ofte vizitis eksterlandaj geesperantistoj. Por pensiuloj en la Klubo de pensiuloj Eva Seemannová kelkfoje prezentis unuaktorajn teatraĵojn el sia ĉeĥlingva repertuaro.

1996 la memorŝtono el Vrŝovice estis transigita antaŭ la Kongresan Centron, pro la riparoj de la parko en Vršovice kaj pro la okazonta UK en la Kongresa Centro

1996/07/13–20 okazis en Prago, en hotelo Vltava, la 62-a internacia Kongreso de nevidantaj esperantistoj, kun partopreno de 95 personoj el 18 landoj

1996/07/20–28 en la kongres-centro en Prago okazis la 81-a Universala Kongreso de Esperanto; post 75 jaroj la dua UK en Prago. Partoprenis ĝin 2971 personoj el 62 landoj, sub egido de la prezidento de Ĉeĥa Respubliko Václav Havel. Inter la prestiĝaj partoprenintoj estis prof. Reinhard Selten, Nobel-premiito pri ekonomiko, kaj Kei Kurisu, la japana fakulo pri la ĉeĥa lingvo kaj tradukanto de la ĉeĥa literaturo en la japanan. La kongreso akceptis Pragan Manifeston, per kiu la UK-anoj turnis sin al registaroj kaj la neesperantaj societoj koncerne la lingvan problemon.

1996/07/20–23 en la kadro de la 81-a UK okazis por reprezentantoj de neesperantaj organizaĵoj Nitobe-simpozio pri la monda lingva problemo.

Dum la UK multaj kongresanoj vizitis nian klubon en Smíchov. La kunvenoj sukcese daŭris ankaŭ en aŭtuno kun varia programo, ekz. prelegoj de prof. Mráz pri astronomio, pri Ĉeĥa Paradizo, pri vidindaĵoj de Šumava, mineralogia prelego de D-ro Kavka, gramatikaj ripetadoj

de E. Seemannová, prelegoj kaj muzik-programoj de geedzoj Stanjo kaj Petro Chrdle, Kant-kunvenoj de H. Maudrová k. a.

1997/01/27 Mgr. Bohumil Bouzek prelegis en nia klubo pri sia ĉeesto en unusemajna Seminario de Germana E junularo.

1997/04/05 mortis poeto František Kožík, honora membro de ĈEA

1997/05/05 forpasis Jaroslav Mařík, honora membro de UEA kaj ĈEA

1997/11/28–30 konferenco de ĈEA en Prago, en la domo de kristana junularo en la Franca strato, okaze de la 95 jariĝo de nia klubo. En la kultura programo prezentis sin Pavla Zemanová, Eva Seemannová, S. Šrutová el Kralupy, Josef Vích el Nacia Teatro k. a.

1997/11/30 vizito de ekspozicio „De Komenio ĝis ZamenhoF“ en la Praga kastelo en la prelega salono de Lobkovic-palaco. La espozicion preparis Muzeo de Komenio en Přerov, origine por Varsovio.

1998 ekde januaro la kunvenoj de EKP okazis en Rybná str. 24 en ĉambro de handikapuloj

1998/03/06–08 okazis kunveno de ILEI-estraro en Prago. Ĉeestis entute 17 membroj, inter ili ankaŭ niaj ktubanoj. Vesperon ili pasigis en amika rondo en bierkelo.

1998/11/13–15 en Prago, en konstruaĵo de Karola Universitato, okazis Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, organizita de ĈEA kunlabore kun la Kongresa kaj Kleriga Entrepreno KAVA-PECH kiel kontribuaĵo ak Kampanjo 2000 sub aŭspicioj de UEA kaj ISAE. La prelegojn eldonis KAVA-PECH libroforme: Modernaj rimedoj de komunikado.

1998/11/19 en Praga PEN-klubo okazis aŭtora vespero de poezio pro dulingva eldono de poemaro „Ekaŭdi la animon „ de Věra Ludiková kun paralelaj tradukoj en Esperanton fare de Miroslav Malovec kaj Jaroslav Mráz. La vesperon inaŭguris kaj Esperanton prezentis Petro Crhrdle, E-lingve kantis kaj la versojn deklamis Josef Vích, en la ĉeĥa deklamis alterne la aŭtorino kaj Jan Hrubeš, flutludis Kristina Maltová.

1999/01/28 sepulto de Eva Seemannová, honora membro de UEA kaj de ĈEA, aktiva membro de nia klubo, kiu forpasis la 21-an de januaro post grava malsano, en aĝo de 79 jaroj.

1999/02/17 jarkunveno de EKP en la Domo de infanoj kaj junularo en Opatov. Ĉeestis ankaŭ s-anino Elena Puĥova el Rusio.

Poemon honore al Eva Seemannová deklamis Čestmír Vidman. Estis reelektita la ĝisnuna komitato.

1999/03/05–07 „Paroliga kurso“ organizita de ILEI-sekcio de ĈEA en la registara salono de la ĉefa fervoja stacio en Prago.

1999 post someraj ferioj ekde septembro la kunvenoj de la klubo okazis ĉiuvendrede en Malnova Urbo en Rybná str. 25. Tie kunvenis precipe la nelaborantaj membroj inter la 14-a kaj 17-a horo.

Denove post jardeko, kiam ne okazis kursoj de Esperanto, EKP intencis malfermi novan kurson, komenciĝantan la 17-an de septembro. Estis gluitaj afiŝoj tra la urbo, en metroo disdonitaj flugfolioj – kaj aliĝis du kursaninoj. Pro tio la kurso ne okazis.

1999/11/01 forpasis poeto Josef Rumler, honora membro de ĈEA

Kroniko Patera

2000/02/11 en la preĝejo de Sankta Nikolao ĉe la Malnovurba placo okazis la lasta adiaŭo al la forpasinta (28. 1. 2000) Stanjo Chrdlová, la ĉefdelegito de UEA kaj membro de nia klubo.

2000/03/24 la jarkunvenon en Rybná str. n-ro 25 ĉeestis poetino Zdenka Bergrová kun sia edzo; pri la kunveno ŝi aperigis raporton en Zemské noviny

2000/05/11 okazis la poezia vespero de Jiří Karen honore al la 80-jariĝo de la poeto; sed la poeto mortis la 30-an de aprilo, pro tio la vespero fariĝis paniĥido por la forpasinta poeto; liajn poeziaĵojn deklamis Rudolf Pellar kaj Táňa Fischerova

2000/11/10–12 Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) aranĝita en la Ĉeĥa Teknika Altlernejo fare de ĈEA kunlabore kun la Kongresa kaj Kleriga entrepreno KAVA-PECH sub aŭspicioj de UEA. La prelegoj estis eldonitaj libroforme: Fakaj aplikoj de Esperanto.

2001/03/19 jarkunveno de EKP okazis en ejo en Revoluční strato. Estis reelektita la malnova komitato. La ejo en Revoluční estis bela kaj vasta, en la centro de la urbo. Sed estis tie granda strat-bruo, tial ekde septembro la klubo kunvenis en alia kunvenejo, en str. Ve Smečkách n-ro 25.

2001/08/18 Somera renkontiĝo de pragaj kaj alilokaj geesperantistoj en la domo de s-anino H. Maudrová en Karlštejn. Post unu jaro ĝi estis jam dua tia renkontiĝo, kie oni manĝis, trinkis, babilis kaj kantis.

2001/07/19 La 14-a Internacia E-konferenco en Strážnice atribuis la OSIEK -premion al la poetino kaj verkistino Eli Urbanová pro ŝia aŭtobiografa romano „Hetajro dancas“

2001/10/30 solenaĵo honore al Čestmír Vidman, ĉeĥa kaj Esperanta poeto, membro de nia klubo. La 31-an de oktobro li fariĝis 80-jara kaj pro tio en la kulturdomo Vltavská en la kadro de „Klubo de la aktiva maljuniĝo“ geaktoroj Gabriela Vránova kaj Rudolf Pellar prezentis lian vivon kaj verkaron. La tutan programon estris D-ro Jan Pixa.

2001 La membrino de nia klubo kaj hundo-ŝatantino Pavla Zemanová, eldonanto de cirkulejo „La bojado“, partoprenis la Literaturan konkurson pri orginala E-poezio kaj humuraĵoj EXRA-2001, organizita de Esperantista domo de kulturo „D-ro Ivan Kirĉev“ en Razgrad, Bulgario, sub la aŭspicio de Kooperativo de Literatura Foiro. Ŝi sukcesis kaj ricevis la trian premion por humuraĵo „Granda hundo“.

2001/10/04 kaj **2001/11/01** nia membrino St. Kníchalová prelegis pri sia vojaĝo al Ĉinio kaj montris fotografaĵojn

2001/12/13 okazis Zamenhofa kaj Kristnaska vespero kun kantado, frandado kaj kaftrinkado kun ĉeesto de eksterpragaj kaj eksterlandaj gastoj.

2002/02/07 en la registara salono de la ĉefa fervoja stacio en Prago okazis solenaĵo honore al la 80-jariĝo de nia membrino, la honora membro de ĈEA kaj de UEA, la poetino Eli Urbanová. La solenaĵon aranĝis ĈEA kaj partoprenis ĝin kvindeko da geesperantistoj ne nur el Prago, sed el la tuta lando. En la arta programo partoprenis krom la poetino Elena Puchova kaj M. Smyčka.

2002/11/09 Inaŭguro de ekspozicio „Esperanto – la internacia lingvo“ en kulturcentro Zahrada en Prago – Suda urbo.

Kroniko Patera

Vorto de la prezidanto okaze de la solenaĵo de la 100-jariĝo de EKP

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj, karaj amikoj,
mi salutas vin kaj bonvenigas vin en Prago okaze de la solenaĵo de la 100-jariĝo de Esperantista Klubo en Praha.
Dum la cent jaroj, kiuj pasis ek de la jaro 1902, kiam nia klubo estis fondita, okazis grandaj ŝanĝoj en la mondo. Malaperis malnovaj regnoj kaj aperis modernaj ŝtatoj, la homaro transvivis du grandajn mondmilitojn kaj longan malvarman militon, aperis kaj bonŝance malaperis du grandaj diktaturoj, la faŝista kaj la komunista. Sed okazis ankaŭ grandaj disvolviĝoj de sciencoj kaj teĥnikoj, la homoj unuan fojon ekstaris sur la luno. Post la radio ekfunkciis la televido kaj dum la lastaj jaroj la Interreto. La mondo fariĝis granda vilaĝo.

Ĉio-ĉi respeguliĝas ankaŭ en la Esperanto-komunumo, ankaŭ en nia klubo. La internacia lingvo Esperanto evoluis kaj maturiĝis kvalite kaj kvante. La fakto, ke ĝi trapasis ĉiujn persekutojn kaj malamojn, pruvas ĝian utilecon kaj bezonatecon. Kaj la fakto, ke ĝi ankoraŭ ne fariĝis la ĝenerala tutmonda komunikilo, ŝuldiĝas al la nematureco kaj impotenco de la homa socio.
En tiu-ĉi broŝuro mi prezentas mozaikon de eventoj, kiuj okazis en nia klubo dum la jarcento. Ili ne estas kompletaj, multaj aktivecoj de pragaj esperantistoj ne konserviĝis en la Esperanta gazetaro, bedaŭrinde ankaŭ niaj kronikoj ne konserviĝis, tial restis nur fragmentaj eroj el la vivo de la klubo. Ili do prezentu almenaŭ partan bildon pri la centjara vivo de la Esperantista Klubo en Praha.

Kun samideanaj salutoj
Jiří Patera
Prezidanto de la klubo

Rimarko:
La kroniko de Jiří Patera (origine *La kroniko de Esperanto en Praha*) same kiel lia vorto de la prezidanto aperis en la broŝuro *Centjariĝo de la Esperantista Klubo en Praha* (2002).

Listo de prezidantoj

Listo de prezidantoj de la Esperantista klubo en Prago

1902–1903	Eduard Weinfurter
1903–1907	Vojtěch Kraus
1907	Jan Hofman
1907–1909	Gustav Ctibor
1909–1914	Václav Rosický
1914–1918	Vojtěch Kraus
1918–1924	Josef Eiselt
1924–1926	Konstantin Koutek
1926–1931	Rudolf Hromada
1931–1958	Jaroslav Šustr
1958–1963	Jaroslav Mařík
1963–1965	Miloš Rudolf
1965–1966	Jindřich Ondráček
1966–1968	Josef Drlík
1968–1969	Rudolf Horský
1969–1970	Vladimír Kalivoda
1970–1972	Rudolf Horský
1972–1975	Josef Drlík
1975–1978	Ladislav Kynčl
1978–1979	Jaromír Jermář
1979–1984	Jindřich Ondráček
1984–1988	Helena Štruncová
1988–1989	Ludvík Veselý
1989–1991	Zbyněk Khail
1991–1994	Květa Hubnová
1994–2003	Jiří Patera
2003–2010	Josef Trojan
2010–2012	Jiří Patera
2012–2014	Josef Trojan
2014–	Tomáš Břicháček

2003–2013

2007/01/21 La klubo havas sian unuan interretan paĝon

V roce 2008 ve Vlastivědném sborníku Muzejního spolku v Moravských Budějovicích byla vzpomínka na stoleté výročí založení esperantského kroužku v Moravských Budějovicích[1]. Esperanto vyučoval učitel Jos. Krumpholz z Bystřice. Jedním ze žáků byl učitel František Goldhammer, zakladatel menšinových českých škol na znojemsku[2], advokát, archeolog evropského významu, Jaroslav Palliardi[3] s manželkou a aktivní esperantista řídící učitel František Vildomec[4].

Přibližně v roce 2009 byly Viktorem Dvořákem předány texty o památkách v Moravských Budějovicích v angličtině, němčině, češtině a esperantu pro stránky města Moravské Budějovice (www.mbudejovice.cz) a o dva roky později předán esperantský překlad o přidružených obcích v „Mikroregion*u* Moravské Budějovice“.

V období 2010 až 2012 byla výuka esperanta v Moravských Budějovicích podle učebnice Stana Marčeka „Esperanto per rekta metodo[5]. Na pozvání senátora RNDr. Miloše Vystrčila navštívili členové kroužku a příznivci jazyka esperanto Senát Parlamentu České republiky v Praze. Setkání se uskutečnilo 17. června 2014 dopoledne a průvodcem byl senátor Miloš Vystrčil.

Viktor Dvořák uspořádal několik výstav zaměřených na esperantské hnutí s vernisáží při zahájení muzejní sezony v Moravských Budějovicích: Za zmínku stojí skutečnost, že mj. byla na nich zmínka o Březinovi, Komenském a Evropské unii, tedy témata, o kterých se předpokládalo, že budou zmíněny při maturitách. To vysvětluje, že poslední ročníky gymnázia v Moravských Budějovicích navštívily výstavu v rámci vyučování. Dokumenty pro výstavy zhotovil Viktor Dvořák.

Viktor Dvořák začal spolupracovat s redemptoristy[6] v Tasovicích, kde se narodil zakladatel řádu redemptoristů v Rakousko-Uhersku sv. Maria Klement Hofbauer (Dvořák), patron Varšavy a Vídně a jeho následovníci jsou v mnoha státech světa. Proto by bylo esperanto vhodným komunikačním jazykem. Pro výstavní účely vyhotovil osm panelů (formátu cca A2), na kterých mj. ukázal výhody jazyka esperanto pro mezinárodní komunikaci. Bylo uspořádáno

---

[1] Dvořák Viktor: Sto let esperanta v Moravských Budějovicích, Vlastivědný sborník Moravskobudějovicka, II/2008, s.506, vydal Muzejní spolek v Moravských Budějovicích 2008

[2] Dvořák Viktor: František Goldhammer osobnost českého školství na znojemsku, , Sborník Státního okresního archivu Znojmo, *Historický a vlastivědný sborník Znojemska a Moravskokrumlovska,* s. 218-224, vydal Moravský zemský archiv v Brně, Státní okresní archiv Znojmo, 2016

[3] Dvořák Viktor: Marie Palliardi a Vlasta Golvelová, Sborník Státního okresního archivu Znojmo, *Historický a vlastivědný sborník Znojemska a Moravskokrumlovska,* s. 122-138, vydal Moravský zemský archiv v Brně, 2021

[4] Podborský Vladimmír: František Vildomec (1878-1975), Vědomil Vildomec (1921-1998). 1. Vyd. Ústav archeologické památkové péče v Brně, Ústav archeologiea muzeologie FF MU v Brně, Brno 2005

[5] Marček Stano: Esperanto per rekta metodo, *Internacia ilustrita lernolibro“* vydal Stano Marček,Martin, Slovensko 2006

[6]Kongregace Nejsvětějšího Vykupitele (lat. *Congregatio Sanctissimi Redemptoris*), jejíž členové jsou nazýváni redemptoristé, je katolická řeholní kongregace, která si klade za poslání následovat Krista, hlásat Boží slovo chudým a žít podle evangelních rad chudoby, čistoty a poslušnosti

několik výstav a z technických důvodů V. Dvořák ukončil jejich rozvoz. Výstava měla odezvu ve Vídni[7], kam si ji redemptoristé odvezli a české texty přeložili do němčiny.
Výstavy:
Muzeum řemesel Moravské Budějovice, květen 2010
Klášter redemptoristů v Tasovicích (u Znojma) 2011
Klášter redemptoristů v Tasovicích 17.3. 2012
Klášter sv. Antonína v Moravských Budějovicích 9.4-30.5. 2013
Kostel sv. Jiljí v Moravských Budějovicích červen-září 2013

Na 26. kongresu ruských esperantistů, který se konal 27. – 31. května 2010 v Petrohradu, Viktor Dvořák přednesl referát „Esperanto-instruo per rekta metodo, miaj spertoj"[8]

Jedním z výsledků zabývajícím se komunikací v Evropské unii je dokument Komise Evropských společenství ze dne 18. 9. 2008 „Sdělení Komise Evropských společenství Evropskému parlamentu, Radě Evropy, Evropskému hospodářskému a sociálnímu výboru a výboru regionů – Mnohojazyčnost: přínos pro Evropu i společný závazek." V něm jsou vytýčeny úkoly a cíle, aby se mnohojazyčnost stala základem dialogu mezi kulturami. Komise vyzývá členské státy, aby vyvinuly úsilí v jazykové výchově obyvatel, vytvořily pro ni podmínky a uvádí, co pro to Komise učiní. Stručně řečeno má být naplněn tzv. Barcelonský cíl, což znamená, aby každý obyvatel se, vedle mateřského jazyka, domluvil ještě dvěma jazyky. V České republice byla schválena výuka angličtiny jako prvého cizího jazyka. Volba druhého jazyka je většinou dána možnostmi školy, doporučuje se upřednostňovat jazyky příhraničních států.
V roce 2013, 25. března, byla podána žádost[9] na Ministerstvo školství, mládeže a tělovýchovy *(k rukám pí. Pead. Dr. Jiřiny Tiché, ředitelky odboru 22 Karmelitská 529/7 PRAHA 1)* o zařazení esperanta mezi volitelné jazyky na Základních školách, tj. zda esperanto patří do skupiny mezi tzv. druhý jazyk. Odpovědí byl e-maile z 30. 5. 2013 kde bylo mj. sděleno: *„… Z výše uvedeného vyplývá, že i esperanto se může vyučovat na základních školách jako vzdělávací obor Další cizí jazyk, pokud si jej škola zvolí."* (Poznámka: Se souhlasem ředitele školy může další cizí jazyk zvolit i jeden žák, např. latinu, ale ředitel školy odsouhlasí, který pověřený lektor jej přezkouší a bude garantovat znalosti žáka odpovídajícím kriteriím stanovenými MŠMT v roce 2013 a dalších. Pro esperanto v ČR v současné době je to polský lektor.) Na základě uvedeného Miroslav Malovec vyhotovil metodické pokyny výuky pro 7., 8., a 9. třídu nazvané „Standard – jazyk esperanto" zaměřené na učebnici St. Marček: Esperanto přímou metodou. Poznamenává se, že tento dokument je doporučenou osnovou výuky podle učebnice Marčeka. Vyučující může si zvolit podle vlastní zkušenosti jak osnovu výuky, tak vhodnou učebnici v tištěném či elektronickém provedení. Podstatné je, aby úroveň žáků na konci každé třídy splňovala požadavky uvedené v Standard – jazyk esperanto.

Při přípravě výstavy „Pocta Komenskému aneb Jak se domluvíme v EU?", konané v Jaroměřicích nad Rokytnou v dubnu až říjnu 2010 (následně i v Moravských Budějovicích a ve Znojmě), byly v muzeu Otokara Březiny pro esperantisty „objeveny" rukopisy třiceti básní Otokara Březiny včetně korespondence mezi Jaroslavou Míčovou, Jiřím Kořínkem a Tomášem Pumprem. Viktor Dvořák každou z těchto básní doplnili dostupným překladem do dalšího cizího jazyka a s Miroslavem Malovcem uspořádali pro knižní vydání publikace Otokar

[7] ST. KLEMENS HOFBAUER-KOMITEE, Salvatorgasse 12, 1010 Wien, Sekretariat: Redemptoristenkolleg Wichtelgasse 74. A-1170 wien (lorenz.voith@cssr.at w.prokop@gmx.net)
[8] KONGRESA LIB RO, Rusia Esperantista Kongreso, Sankt-Peterburgo, la 27-31 de majo 2010, s. 29
[9] Jans Melichárková, Viktor Dvořák, Josef Vojáček: Zařazení esperanta mezi volitelné jazyky na základních školách,

Březina: „Tajemství bolesti – Mistero de Doloro“. Vázané překlady byly autory, nebo dědici autorských práv povoleny pro zveřejnění. Nezanedbatelným příspěvkem veřejnosti byly neznámé informace o překladatelích uvedeny ve Wikipedii a předány Referenčnímu centru Národní knihovny. Knížka byla zveřejněna v rámci mezinárodního sympozia „Březina 2014“ konaného na Filozofické fakultě UK září roku 2014 a doplněna přednáškou Miroslava Malovce a Viktora Dvořáka.

Podle poznámek Viktora Dvořáka, září 2022

2003–2013

2014

29/01/2014 – Aperis la unua Bulteno (n-ro 1/2014, 200) editorita de la nova redaktoro Tomáš Břicháček. La Bulteno aperis ne nur en presita formo, sed ankaŭ elektronike en la paĝaro http://bulteno.cs-retromusic.net/.

10/02/2014 – En la sidejo de Unuiĝo de interpretistoj kaj tradukistoj, Senovážné náměstí 23, Praha 1 okazis bapto de la ĉeĥa versio de la libro *Maskerado ĉirkaŭ la morto* de Tivadar Soros eldonita de KAVA-PECH. Ĝin ĉeestis krom la tradukintino Jindřiška Drahotová ankaŭ la redaktoro de la verko Humphrey Tonkin, profesoro kaj eksa prezidanto de la Hartford-Universitato en Usono kaj eksa prezidanto de UEA.

27/02/2014 – Esperantista klubo en Praha elektis sian novan estraron. Novaj komitatanoj estiĝis Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Pištíková, Pavla Zemanová, Jiří Patera, Jan Šebetovský, Vít Guglielmo Mišurec. La nova komitato de EKP decidis pri la ŝanĝo de la kunvenhoroj. Ili devis okazi plue ĵaŭde, sed nur ĉiun duan semajnon kaj ekde la 17-a ĝis la 19-a horo, por ke ankaŭ gelaborantoj kaj gestudentoj povu partopreni. La kunvenoj devus havi antaŭdifinitan programon (temon).

01/03/2014 – En la praga bestĝardeno okazis la tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental' kun festo de „adoptotago" kaj granda konkursa pikniko.

27/03/2014 – En la kunvenejo de EKP okazis la unua kunveno kun antaŭe difinita programo. Estis prelego de Vlasta Pištíková pri la itala regiono Kampanio kun prezentado de fotoj.

29/03/2014 – La klubo E-mental' kunlaborante kun dresdenaj esperantistoj organizis aranĝon *Granda pikniko en Meissen*.

En aprilo 2014 la Bultena paĝaro http://bulteno.cs-retromusic.net/ fariĝis paĝaro de EKP. Ekatingeblis aktualaj informoj pri la agado de la klubo kaj ĝenerale pri la agado de ĉiuj geesperantistoj en Prago, programo de la kunvenoj, informojn pri la laboro de la komitato, revuo Bulteno en elektronika formo kaj listo de interretaj ligoj.

En aprilo 2014 la oficiala adreso de la EKP estis ŝanĝita al la adreso: c/o Jiří Mišurec, Jirečkova 5, 170 00 Praha 7.

En aprilo kaj majo 2014 EKP havis problemojn kun la kunvenejo en la strato Ve Smečkách 25. La kvartalestrejo de Prago 1 portempe malpermesis la uzadon de siaj kunvenejoj laŭdire pro tio, ke en unu el ili foje renkontiĝis iuj ekstremistoj. La prezidanto Tomáš Břicháček turnis sin perletere al la kvartalestro de Praha 1. La kvartalestro plenumis la peton kaj ekde la komenco de junio la klubo denove povas kunveni en la ejo.

04-06/04/2014 – La klubo E-mental' organizis en Havlíčkův Brod la *5-a Brilan Internacian Esperanto-Renkontiĝon (BIERo).*

24-25/05/2014 – La klubo E-mental' organizis en Chocerady edukan aranĝon *SELE – Semajnfina lernado*.

01/05/2014 – La klubo E-mental' organizis socian aranĝon *Unumaja kisado sub floranta ĉerizarbo* kun plezurvojaĝo al Roztoky kaj Levý Hradec.

27/05/2014 – Aperis Bulteno n-ro 2/2014, 201.

19/06/2014 – En la kunvenejo de EKP okazis la svinga vespero. Tomáš Břicháček havis prelegon pri la ĉeĥa svinga dancmuziko de 1930-aj kaj 1940-aj jaroj kun aŭskulto de la plej famaj „ŝlagroj“ kaj montro de tiutempaj muzikaj presitaj materialoj.

27-29/06/2014 – Okazis la tradicia E-mentala gastronomia aranĝo *Viando* – ĉi- foje en Chotýčany.

19/08/2014 la parko en la strato Na Třebešíně en Prago 10 ekportis la nomon de Jiří Karen (*park Jiřího Karena*).

09/08/2014 – Okazis la *2-a E-mentala pikniko* en Saksa Svislando en Zirkelstein kaj Kaiserkrone.

06/09/2014 – Okazis la *3-a E-mentala pikniko* en Saksa Svislando en Brand.

25/09/2014 – En la kunvenejo de EKP okazis prelego de Jiří Galuška pri sia vojaĝo en Israelon dum la luktoj en la Gaza Sektoro.

26-28/09/2014 – Okazis la tradicia E-mentala gastronomia aranĝo *Vinkelo* – ĉi- foje en Valtice.

09/10/2014 – En la kunvenejo de EKP okazis prelego de Tomáš Břicháček dediĉita al la genealogio kaj genealogiaj produktoj.

23/10/2014 – En la kunvenejo de EKP okazis prelego de Petr Chrdle pri la fratoj Karel kaj Josef Čapek.

09-11/11/2014 – La klubo E-mental' organizis en Poděbrady la *6-a Brilan Internacian Esperanto-Renkontiĝon (BIERo)*. Inter programeroj estis trarigardo de la urbo, vizito de la bierfabriko en Nymburk, ludoj, testo kaj bunta kutima matenmanĝegado.

23/11/2014 – Volontuloj de EKP kaj de la klubo E-mental' gviditaj de la pentristo Stanislav Krajíček renovigis la Esperantan monumenton apud la Kongresa centro. Oni ankaŭ ordigis la herbejon en la ĉirkaŭaĵo.

28-30/11/2014 – La klubo E-mental' organizis sian tradician socian aranĝon *(E-mentala) Kristnasko*.

04/12/2014 – Aperis Bulteno n-ro 3/2014, 202.

04/12/2014 – En la kunvenejo de EKP okazis prelego de Vlasta Pištíková pri la hispana regiono Katalunio.

06/12/2014 – La klubo E-mental' organizis en Freital socian kaj gastronomian aranĝon *Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio*.

15/12/2014 – La praga klubo de la Ĉeĥa Esperanto-Junularo organizis feston okaze de la Zamenhofa tago.

18/12/2014 – En la kunvenejo de EKP okazis la Antaŭkristnaska kunveno.

19/12/2014 – Český rozhlas Plus dediĉis sian programeron *Radiofórum* (19:10-19:40) al Esperanto. La subtitolo de la programero estis: *Má esperanto smysl, když je všude angličtina?* La ĉefa gasto estis Tomáš Břicháček.

20/12/2014 – La klubo E-mental' kun slovakaj esperantistoj organizis en Bratislavo socian aranĝon *Granda „lokŝumado"*. Estis renkontiĝo meze de Bratislavo kun vizito de antaŭkristnaska foiro, gustumado de slovaka specialaĵo „lokŝoj" kaj kristnaska grogo.

2014

Historio de la Bulteno

Jiří Patera

Nia Bulteno komencis aperi en la jaro 1953. Pli frue informoj pri la klubo aperadis en la presita revuo Esperantista, organo de la tiama tutŝtata organizaĵo de ĉeĥaj esperantistoj. Sed en la jaro 1950 ĉiuj tiamaj E-gazetoj estis malpermesitaj kaj la kluba komitato povis kontakti siajn membrojn nur perpoŝte. La klubo tiam havis kelkcent membrojn, eble 200 – 300, sed la kunvenojn partoprenis nur 40 – 50 membroj. Estis do necese la ceterajn membrojn informi pri diversaj aktivecoj de la klubo, pri programo de kunvenoj, pri kotizoj ktp., kaj tion oni faris per leteretoj, flugfolioj, informiloj, ĝis fine aperis la ideo eldonadi Bultenon kun ĉiuj necesaj informoj kaj eĉ kun literaturaj tekstoj. Tiu Bulteno estis stencilita, du- aŭ kvar-paĝa, signita kiel Presaĵo kaj por tio sufiĉis 50- helera poŝtmarko. La bultenon redaktis fama esperantisto Josef Vítek kaj ĝi havis baldaŭ abonantojn en la tuta lando, sekve ĝi estis ne nur praga informilo, sed tutlanda. Ĝi aperadis eĉ en eldonkvanto de 800 ekzempleroj kaj kontribuis al ĝi la pragaj geesperantistoj, kiel S. Kamarýt, Eli Urbanová, T. Pumpr, J. Mařík kaj aliaj.

La bulteno aperis neregule ĉiumonate, sed iam pli ofte, iam kun pli longaj paŭzoj. Okazis, ke ĝi ne aperis eĉ dum du-tri jaroj. Tion ĉi mi aŭdis pli poste, ĉar mi origine ne estis pragano. Mi loĝis en nordbohemia urbo Most kaj en Pragon mi transloĝiĝis fine de la jaro 1977. Mi ricevis postenon en ministerio de financoj kaj mia edzino en la ĉefa kont-oficejo de ŝparbanko. Kaj mi tuj fariĝis membro de la praga klubo kaj eĉ ricevis funkcion en la kluba komitato kiel kultur-referento. Mia tasko estis prepari programojn de kunvenoj kaj ankaŭ iom kontribui al la bulteno. La bulteno tiam ne havis redaktoron, ĝi estis simple eldonata de la klubo. Kaj bonŝance estis tiam bonaj kontribuantoj, ekz. la kluba prezidantino H. Štruncová, J. Mařík, L. Kynčl, A. Slanina, E. Urbanová, J. Ondráček, E. Seemannová, R. Horský, J. Vích, J. Cíchová, Z. Khail kaj multaj aliaj.

Mia unua ĉefartikolo en la bulteno aperis sur la unua paĝo de la novembra numero 1978 kaj havis titolon „Sesdek jaroj de Ĉeĥoslovakio“. Poste mi jam skribis regule artikolojn ŝajne politikajn, sed fakte „pacmovadajn“, ĉar tio estis por Esperanto tre grava en la tiama politika situacio. Tre sukcesa estis ekzemple la artikolo el novembro 1984 „Novembro – monato de Esperantaj amaskomunikiloj“, ĉar ĝi estis komplete elsendita en la E-programo de Radio Polonia la 27-an de novembro kaj ripete la 28-an de novembro 1984. Oficiala redaktoro de la bulteno mi fariĝis nur en la j. 1989, kiam por tiu funkcio min nomumis la kluba jarkunveno en aprilo 1989.

En tiu jaro okazis grandaj politikaj ŝanĝoj en nia lando kaj en la tuta Eŭropo, la komunismo bankrotis kaj la renovigitan demokration post la komenca entuziasmo ekis influi negativaĵoj de kapitalismo. En la tiamaj numeroj de la 9 bulteno la nova demokratio neniel manifestiĝis kaj eĉ okazis, ke la bulteno en la jaro 1994 ĉesis tute aperi. Dum la komunismo la kontaktoj kun la Okcidento estis malfacilaj, oni ne povis vojaĝi tien, nek aboni kaj aĉeti libere gazetojn kaj librojn, tiam Esperanto funkciis kiel iaspeca anstataŭanto, ĉar pere de ĝi oni povis almenaŭ korespondi kaj partopreni esperantajn aranĝojn en la Oriento. Sed post la politikaj ŝanĝoj, kiujn iuj nomas „revolucio“, okazis ŝanĝoj ankaŭ en nia Esperantujo: oni povis libere vojaĝi, aboni kaj aĉeti kion ajn, tiam oni prefere komunikis per la angla, germana kaj aliaj lingvoj, kaj Esperanton oni subite ne bezonis. Tio respeguliĝis ankaŭ en la praga klubo: la nombro de partoprenantoj de kunvenoj sufiĉe falis, falis entute la nombro de klubanoj kaj malaperis ankaŭ la bulteno.

Kiam mi partoprenis konferencojn kaj kongresojn de ĈEA, ĉiam mi aŭdis, ke la praga klubo stagnas, kvankam stagnis la E-kluboj ankaŭ en aliaj urboj. Do, kion fari? Plifortigi la klubon, fari kursojn kaj tiel pligrandigi la klubon montriĝis neebla, ĉar nur malmultaj aliĝis al kursoj kaj baldaŭ forfalis, dum la nombro de klubanoj plu malkreskis. Bonan efikon havis la Universala Kongreso en 1996, ĉar ĝi vekis kaj laborigis kelkajn dormantojn, sed poste la

malbona stato daŭris plu. Estis klare, ke necesas fari ion videblan, ekzemple renovigi la bultenon. Tio okazis nur en la jaro 2000, post kelkaj provoj en 1998 kaj 1999. Do en la jaro 2000 komencis denove aperi nia Bulteno post kelkjara paŭzo, kvar numeroj jare. Kaj en la konferencoj kaj kongresoj de ĈEA estis klare videbla la nova stato de la klubo: ho, la Praga klubo reviviĝis, ĝi eĉ eldonas Bultenon, kia progreso!
Ĉar la esperantaj gazetoj estas kutime tre seriozaj, tro gravmienaj, mi volis, ke nia Bulteno estu male amuza gazeto, kun amuzaj rakontoj, gajaj poemetoj kaj kantetoj, kun multaj anekdotoj por ke la legantoj ĝoje atendu ĉiun novan numeron. Tiam mi komencis aperigi miajn tradukojn de amuzaj rakontoj de Jaroslav Hašek, la aŭtoro de brava soldato Ŝvejk. Sed iuj maljunaj klubaninoj ne ŝatis la rakontojn de Hašek kaj mi devis cedi tiurilate. Kaj aperis alia afero. Venis simpatia virino, montriĝis, ke ŝi estas poetino Věra Ludíková; ŝia poemaro Uslyšet duši (Ekaŭdi la animon) ĵus aperis dulingve esperante-ĉeĥe en traduko de Jaroslav Mráz kaj Miroslav Malovec. Kaj ŝi esprimis la deziron, ke ŝiaj pluaj poemoj kaj tekstoj aperu en Esperanto. Tiel ŝiaj verkoj komencis aperadi en la bulteno. Kaj tuj sekvis ŝin alia ĉeĥa poetino Zdenka Bergrová, kies verkoj ankaŭ plenigis paĝojn de Bulteno. Mi ne kapablas traduki poemojn, mi do tradukadis prozajn tekstojn, kaj poemojn esperantigadis Jaroslav Mráz kaj post lia frua morto Jaroslav Krolupper, kiu subite aperis kiel kompetenta poemverkanto kaj tradukanto. Kaj estis postuloj aperigi en Bulteno la verkojn de Čestmír Vidman, leterojn de Jiří Karen, rakontojn de Kamila Bártlová, tekstojn de nia klubano Jindřich Ondráček k. a. Krome pro financaj kialoj la kluba komitato decidis eldonadi ĉiujare nur tri numerojn de la bulteno, tiam miaj redaktoraj eblecoj estis tre limigitaj kaj mia ideo pri amuza gazeto forvaporiĝis. Ĉar la oficiala organo de ĈEA Starto fariĝis nura movada informilo sen iaj ajn literaturaĵoj, tian literaturan rolon komencis parte transpreni nia bulteno. La bulteno estis origine nura kluba informilo. Ĉar la klubaj aktivecoj estas tre 10 malmultaj kaj malgrandaj, estas necese la bultenon plenigi per literaturaĵoj. Tamen la bulteno ĉiam restas kluba informilo, malgrandformata kaj amatora, eldonata en la nombro de 120 ekzempleroj, do tute neniu tutlanda literatura gazeto.
Lastatempe forpasis iuj gravaj klubanoj, kiel Eli Urbanová kaj Jindřich Ondráček, antaŭ nelonge ankaŭ Čestmír Vidman, kaj tiam aperis neceso ĝustatempe trovi ankaŭ novan kaj ĉefe junan redaktoron de la bulteno. Post mia 35-jara laboro por la bulteno estis jam urĝa tempo havi junan kaj kleran redaktoron kun novaj ideoj kaj kapabloj. Kaj tia persono en Prago bonŝance ekzistas.
Li estas iama estro de la praga E-junularo, do kapabla kaj sperta esperantisto, finstudinto de du fakultatoj de Karola universitato en Prago kaj sekve duobla doktoro (JUDr. + PhDr.), studinto en la universitato en Parizo, instruanto en la Tuteŭropa altlernejo en Prago, redakciano de gazeto Revuo Politiko, kiam restas al li tempo, do ankaŭ oficisto en ministerio de justeco. Li do estas oficiale juristo kaj publicisto, li estas fakulo pri la ĉeĥa dancmuziko de duono de la 20-a jc., li prizorgas kelkajn ret-paĝojn kaj publikigas tie (ĉeĥlingve) siajn blogojn. Sed li havas ankaŭ familiajn devojn, ĉar antaŭ nelonge naskiĝis lia dua filo, sekve redakti la bultenon estos por li plua tempbezona laboro. Lia nomo estas Tomáš Břicháček kaj ankaŭ mi estas preta ankoraŭ iom helpi al li kaj precipe daŭrigi la esperantigon de leteroj el la milita tempo de Jiří Karen kaj ankaŭ la artikolojn de la verkistino V. Ludíková. Kaj Tomáš certe trovos kunlaborantojn inter junaj pragaj geesperantistoj, kiel ekz. Daniel Mrázek, kiu en Literatura Foiro aperigis jam kelkajn recenzojn pri moderna Esperanta muziko.
Mi estas konvinkita, ke la Bulteno de Esperantista klubo en Prago havas antaŭ si bonan estontecon kaj ĝi apartenos ne nur al bonaj kaj kvalitaj klubaj eldonaĵoj, sed estos laborejo kaj lernejo por pluaj novaj Esperanto publicistoj, verkistoj kaj tradukistoj.

Bulteno, n-ro 1/2014

Antaŭparolo de la nova redaktoro

2014

Tomáš Břicháček

Karaj geamikoj, vi estas legantaj la unuan numeron de la praga Bulteno en la nova jaro 2014, kiu estas ankaŭ la unua preparita de la nova redaktoro. Permesu al mi saluti vin ĉiujn kaj prezenti mian vizion de la estonteco de nia revuo.
Neniuj vortoj povas sufiĉi por danki al Jiří Patera, kiu senlace laboris por la Bulteno 35 jarojn. Li lasis malantaŭ si profundan spuron. Mi estas ege honorata, ke li elektis min kiel sian sekvanton. Mi akceptas tiun taskon kun humileco kaj respondeco.
Kiel tutviva konservemulo mi nature ne volas fari iujn dramajn ŝanĝojn. Mi volas konservi la bazan formon kaj naturon de la revuo. Ĝi devas resti informilo de la praga klubo kaj samtempe literatura kaj kultura forumo. Tamen kiel junulo alkutimiĝinta labori kun moderna komputoteĥniko kaj vivanta en juna kolektivo mi povas doni al la revuo novajn impulsojn.
Jen la unua novaĵo: La Bulteno estos eldonata ne nur en presita formo sed ankaŭ elektronike en la interreto sur la paĝo bulteno.cs-retromusic.net (parto de la portalo CS Retro Music) kaj do estos atingebla en la tuta mondo. Sur la paĝo oni povos ne nur elŝuti la elektronikan formon de la numeroj de la revuo, sed ankaŭ legi aktualaĵon el la vivo de la pragaj esperantistoj, kiuj estos sinsekve aldonataj.
Mi ne volas paroli longe pri mi. Mi estas juristo kaj publicisto, kiu okupiĝas pri la juro de la Eŭropa Unio kaj pri la politikaj problemoj de la eŭropa integrado. Ĉion gravan pri mi vi trovos sur mia persona paĝo http://www.cs-retromusic.net/brichacek.htm.
Mi deziras al ĉiuj agrablan legadon kaj ĉefe multe da sano kaj energio en la nova jaro!

Bulteno, n-ro 1/2014

Eldono de grava traduko el Esperanto

Petr Chrdle

La unua libro de KAVA-PECH eldonota en januaro 2014 estas tre grava el socia vidpunkto, sed ĝi ankaŭ havas intiman rilaton al Esperanto. Temas pri la ĉeĥa eldono de „Maskerado ĉirkaŭ la morto“ fare de Tidavar Soros, patro de la famkonata usona filantropo kaj hungardevena judo Georgo Soros, verko skribita origine en Esperanto. Ĝia redaktoro, kaj por la Esperanto-eldono, kaj por la angla eldono, estis prof. Humphrey Tonkin, eksa prezidanto de UEA. Li estas ankaŭ redaktoro de la ĉeĥa eldono, por kiu li iom modifis sian ampleksan klarigan postparolon. La verkon ĉeĥigis el la Esperanto-originalo Jindřiška Drahotová.
Mi konfesas, ke estas malmultaj libroj, kiuj postlasis ĉe mi tiom profundan impreson kaj kiuj pensigis min same kiel ĉi tiu libro. Ĝi estas skribita vive, do mi legis ĝin unuspire, tamen ĝi ankaŭ riĉigis min pri multaj scioj, kiuj restis por mi ĝis tiam nekonataj.
[...]

Bulteno, n-ro 1/2014

Pri la agado de nia klubo de post la jarkunveno la 4-an de oktobro 2012

Jiří Patera

La jarkunveno elektis novan komitaton de la klubo, kaj nome la prezidanton Ing. Trojan, la vicprezidanton Ing. Krolupper, la kasiston J. Patera, la komitataninon P. Zemanová kaj la revizorinon Ing. Turková.

La 8-an de novembro 2012 ni havis solenan kunvenon okaze de la 110-a datreveno de la fondo de nia klubo. La klubo estis fondita la 9-an de novembro 1902 kaj post la klubo en Brno ĝi estis la dua esperantista klubo sur nia teritorio. Okaze de tiu jubileo ni ricevis salut-leteron de la komitato de ĈEA.

Nia tradicia Zamenhof-vespero kaj samtempe Kristnaska vespero okazis la 13- an de decembro 2012. Venis ne nur niaj klubanoj, sed ankaŭ iuj E-Mentalanoj kaj esperantistaj junuloj. Ĉeestis ankaŭ kaj prelegis aŭstra e-isto Anton Oberndorfer, la posedanto kaj praktikanto de Esperanta Retradio. La kunvenon filmis Petro Chrdle kaj ni poste povis vidi la filmon en la Retradio de A. Oberndorfer. Cetere tiu ĉi aŭstra esperantisto vizitis nian klubon kaj prelegis ankaŭ la 21-an de februaro 2013 kaj la 16-an de majo, kiam li rakontis pri sia 3 vizito en Andaluzio. Cetere pri sia vizito en Italio prelegis kaj fotojn montris V. Pištíková la 25-an de aprilo 2013.

Nia komitatano Ing. Jar. Krolupper estas ne nur originala E-poeto, sed ankaŭ tradukanto de ĉeĥa poezio en esperanton. Sed li esperantigas ankaŭ la ruslingvan poezion de la rusa poetino Ljubov Vondroušková, vivanta en Moravio. Aperis jam tri volumetoj de ŝiaj lirikaĵoj. La 5-an de januaro okazis en Brno la 3-a internacia rusa konferenco de la Sudmoravia regiono, por kiu estis invititaj ankaŭ esperantistoj, do ĉeestis ankaŭ M. Turková. Pri tiu ĉi grava literatura aranĝo ŝi poste rakontis en nia klubo.

La 16-an de majo M. Turková prelegis pri malvualigo de nova monumento de J. Hašek en Lipnice, kiun faris la skulptisto Radek Dvořák. La monumento konsistas el dek partoj, sur kiuj estas citaĵo el Švejk en dek lingvoj, inter ili ankaŭ en esperanto. Ĉi-kaze estas necese aldoni, ke por gravurado de la E-teksto de la monumento financan donacon liveris gee-istoj M. Turková kaj V. Kaprál.

La 22-an de junio 2013 kelkaj klubanoj partoprenis la esperantan prezenton de RUR de K. Čapek en Teatro Na Prádle, en la kadro de festivalo“Teatro de lingvoj“. Post jardekoj ni havis denove E-lingvan teatron en Prago.

Post la somera libertempo en nia kunveno la 12-an de septembro nia prezidanto J. Trojan, kiu partoprenis la UK en Rejkjaviko, prelegis pri la kongreso kaj pri Islando. La 3-an de oktobro li daŭrigis la prelegon kune kun M. Turková, kiu ankaŭ estis en Rejkjaviko.

La 17-an de oktobro ĉeestis nian kunvenon M. Smyčka kaj riĉigis la kunvenon per sia kantado. Li venis ankaŭ la 21-an de novembro kaj denove la 12-an de decembro, okaze de nia Kristnaska vespero, kiam li deklamis kaj kantis Elingve.

La kunveno la 31-an de oktobro estis dediĉita al la rezultoj de la asocia konferenco en Nymburk, en la kunveno la 21-an de novembro ges-anoj Dvořák prezentis al ni la poemaron de O. Březina „Mia patrino“.

La 23-an de januaro 2014 vizitis nin la ĉeĥa poetino Delicie Nerková, disdonis al ni siajn poemarojn kaj esprimis la esperon, ke ŝiaj verkoj aperados E-lingve en nia Bulteno. J. Patera esperantigos ŝiajn prozaĵojn. Samokaze M. Turková rakontis pri la nova rusista konferenco en Brno, kiun ŝi partoprenis.

Tre grava estis por ni la 10-a de februaro 2014, ĉar tiam okazis la bapto de la ĉeĥa traduko de libro de Tivadar Soros „Maskerado ĉirkaŭ la morto“ en salono de Unuiĝo de Interpretistoj kaj Tradukistoj en Prago. La solenaĵon ĉeestis multaj geesperantistoj ne nur el Prago, sed ankaŭ el aliaj urboj, kaj ĉefe la tradukistino Jindřiška Drahotová, la redaktoro de la libro Humphrey Tonkin kaj la eldonisto Petr Chrdle. La libro pri la persekutado de judoj en Budapeŝto fare de gestapo certe estos interesa legaĵo pri la vivo de familio Soros kaj precipe de la juna George

Soros, la nuntempa mondkonata usona miliardulo kaj filantropo. La verko estas esperanta kontribuo al la monda literaturo.
Post la solenaĵo okazis vespere en salono de Masaryk-stacidomo kunveno de pragaj esperantistoj sub gvido de s-anino Pavla Dvořáková el Písek. Nia Esperantista Klubo en Praha, malgraŭ sia 112-jara historio, troviĝas nun en malbona stato, ĉar la ĝisnunaj membroj maljuniĝas kaj ankaŭ bedaŭrinde 4 forpasas. Tial estas necese, ke la pli junaj geesperantistoj en Prago, agantaj ekster la klubo, enviciĝu en la klubon kaj tiel vivigu kaj disvastigu ties aktivecojn. Pri tio devus decidi la hodiaŭa kunveno.
Bonŝance la unua tiudirekta paŝo jam okazis. La Bulteno de nia klubo jam havas novan redaktoron Tomáš Břicháček kaj la jarkunveno de la klubo, okazinta la 27-an de februaro, elektis novan komitaton de la klubo. La nova prezidanto de nia klubo fariĝis Tomáš Břicháček, sekve li estas kaj la prezidanto de la klubo, kaj la redaktoro de la Bulteno. La vicprezidanto de la klubo kaj samtempe la ekonomo fariĝis Jiří Mišurec, la aliaj komitatanoj estas Vlasta Pištíková, Vít Guiglielmo Mišurec, Jan Šebetovský, Pavla Zemanová kaj Jiří Patera. La grava ŝanĝo estos en tio, ke la kunvenoj de la klubo ne plu okazos ĉiusemajne, sed ĉiun duan ĵaŭdon ekde la 17-a horo, en la kunvenejo en la strato Ve Smečkách n-ro 25. Tial la kunvenojn povos viziti ne nur la pensiuloj, kiel ĝis nun, sed ankaŭ la laborantaj kaj studantaj klubanoj. La kunvenoj havos laŭplanan antaŭpreparitan programon, kio plibonigos la vivon de la klubo.

Bulteno, n-ro 2/2014

Parko en la praga kvartalo Strašnice portos la nomon de Jiří Karen

Jiří Patera

Jiří Karen (1920 – 2000) estis ĉeĥa kaj esperanta poeto. Kiel junulo li lernis Esperanton. Dum la dua mondmilito li devige laboris en Germanio; de tie devenas liaj korespondaĵoj el Germanio el la milita tempo. Post la milito lia amiko konvinkis lin, ke la lingvo Interlingua estas pli bona ol Esperanto kaj de tiam li okupiĝis pri tiu ĉi „moderna“ lingvo. Sed post dudek jaroj li konstatis, ke Interlingua tute ne progresas, dum en Esperanto ekzistas literaturo, gazetoj, diversaj aranĝoj, konferencoj, kongresoj kaj ekspozicioj, kaj tiam li revenis al la lingvo Esperanto.
Jiří Karen estas aŭtoro de 20 eldonitaj ĉeĥlingvaj poemaroj, plue de 50 neeldonitaj – samizdataj – multobligitaj kajeroj kun poemoj kaj aliaj tekstoj, kaj kelkaj poemaroj en la germana kaj Esperanto. La esperantaj poemaroj estas tradukitaj de Rikardo Ŝulco, Jiří Kořínek kaj Jaroslav Mráz, du esperantaj poemaroj „Eternaj revuloj“ kaj „Kantoj de vaganto sur planedo Ĝoja Ĝojmalo“ estas liaj originalaĵoj.
La parkon, kiu portos lian nomon, ĉirkaŭas la strato Na Třebešíně. La nomon de Jiří Karen por la parko elektis la estraro de Prago 10.

Bulteno, n-ro 3/2014

La nestoro de pragaj esperantistoj retrospektas

Tomáš Břicháček

En februaro 2014 Inĝ. Josef Trojan post multaj jaroj forlasis la estraron de nia klubo. Li estis nia prezidanto kvazaŭ naŭ jarojn (2003–2010, 2012–2014) kaj estrarano eĉ pli longe.
La nestoro de pragaj geesperantistoj membriĝis antaŭ pli ol kvindek jaroj en la epoko de la fama prezidanto Šustr. Li restas aktivulo kaj ofta partoprenanto de klubaj aranĝoj. Nun li bonvole akceptis inviton de la Bulteno por fari intervjuon por ni.
[...]

Inĝ. Josef Trojan (* 1931)
Origine ŝumavano el vilaĝeto proksime de Stachy. Post la dua mondmilito la sorto alportis lin al Tachov, Pilseno, Mariánské Lázně kaj fine en malfruaj 50-aj jaroj li ankris en Prago. Li finstudis la fakon *inĝenieraj konstruoj* en la Ĉeĥa Alta Teĥnika Lernejo (ČVUT). Kiel konstrua inĝeniero li laboris en diversaj ŝtataj entreprenoj, kiuj sinsekve reorganiziĝis kaj ŝanĝis nomojn. En la komenco de la 90-aj jaroj, jam kiel pensiulo li iĝis memstara aŭtorizita specialisto pri statiko. Li estis prezidanto de Esperantista klubo en Praha ekde la 27-a de marto 2003 ĝis la 18-a de marto 2010 kaj ekde la 4-a de oktobro 2012 ĝis la 27-a de februaro 2014.

Ni renkontiĝis la 23-an de oktobro 2014 en la Teatra restoracio en la strato Ve Smečkách kontraŭ nia kluba kunvenejo. Parolante kaj trinkante kapuĉinon ni pasigis unu agrablan horon.

Kiam kaj kiel vi iĝis esperantisto?
Estis post la milito ĉirkaŭ la jaro 1947, kiam mi studis mezlernejon – teĥnikumon – en Pilseno. Esperanton sugestis al mi mia bona amiko el infanaj jaroj – kun kiu mi parenteze interrilatas ĝis nun – kaj kiu estis granda entuziasmulo por Esperanto. La pilsena esperantista klubo tiam organizis kurson, do mi alskribiĝis. Partoprenis proksimume tridek homoj – tiam Esperanto estis populara.
Mi trapasis tiun kurson kaj mi ankaŭ aĉetis lernolibron de sinjorino Šupichová, kie estis tuta gramatiko kaj malantaŭe riĉa vortaro, kiun mi ellernis. Baldaŭ, eble post unu jaro estis esperantista kongreso en Brno, kie mi jam bone interkompreniĝis.

Do vi estis unue klubano en Pilseno…
Jes. Ĝuste en la klubo, kiu organizis tiun kurson. Tio estis interesa periodo. Post la februaro 1948 baldaŭ ekestis iuj politikaj problemoj kun la nova reĝimo, sed sinjoro Burda, kluba aktivulo kaj samtempe komunisto, ĉiam solvis ilin.
Finstudinte la mezlernejon mi laboris unue en unu lignomastruma entrepreno en Tachov. Kaj tie mi organizis kurson de Esperanto por proksimume dudek homoj. Ni varbis lernontojn ankaŭ en la ĉefa placo eksponante la poŝtkartojn de niaj eksterlandaj korespondantoj por montri kiel Esperanto ebligas komuniki kun la tuta mondo – mi ĝis nun havas hejme multegajn poŝtkartojn. Sed tio ne plaĉis al la loka polico, kiu ordonis al ni forigi ĉion. Komprenu, ĉiuj rilatoj kun eksterlando estis suspektaj tiatempe.

Kaj kiam vi venis en Pragon kaj iĝis loka aktivulo?
Mi venis en Pragon iam ĉirkaŭ en la dua duono de la 50-aj jaroj por studi en altlernejo. Mi studis la fakon *inĝenieraj konstruoj* en la Ĉeĥa Alta Teĥnika Lernejo. Poste mi jam restis en Prago kaj edziĝis ĉi tie.

Jam dum miaj studoj mi komencis viziti la pragan esperantistan klubon. Tiam la prezidanto estis la legenda Jaroslav Šustr. Li estis tre simpatia, afabla homo, kiu strebis helpi al aliaj. Ankoraŭ dum lia epoko mi iĝis delegito de UEA, kiu mi estas ĝis nun.
La tempo pasis kaj la klubo transloĝiĝis multfoje. Ni estis en la strato Revoluční, en Smíchov, en Malnova Urbo... Ve Smečkách oni ankris en la naŭdekaj jaroj.

Ĉu vi multe vojaĝis kun Esperanto?
Jes multe. Mi partoprenis en kelkaj universalaj kongresoj de UEA. Mi estis en Varsovio, Brajtono, Rejkjaviko, Hanojo... Mi ĉefe ŝatis la kongreson en Brajtono, kien oni organizis grandan ĉeĥan karavanon. Tio estis ankoraŭ dum la socialismo kun aŭtobuso de Čedok.
Esperanto faciligis al mi vojaĝi ankaŭ alimaniere. Mi povis ĉiam kalkuli pri esperantistoj, kiuj helpis al mi kaj ĉe kiuj mi povis tranokti. Tiel mi estis ekzemple en Usono aŭ tri monatojn en Suda Ameriko – en Argentino, Ĉilio, Bolivio, en Brazilo laŭlonge de Amazona rivero. Miaj vojaĝoj ofte rilatis kun mia granda hobio, kiu estas la mineralogio. Mi aĉetis ŝtonojn, kolektis trilobitojn, ktp.

Mi supozas, ke vi partoprenis la UK-on en Prago en 1996? Pri kio vi memoras?
Nature. Tio estis bonega kongreso. Ĉiuj el nia klubo strebis helpi. Mi mem havis diversajn taskojn. Mi asistis al la eksterlandaj kongresanoj en hotelo, kie loĝis plimulto da ili.

Kaj kiel vi iĝis prezidanto de nia klubo?
Mi transprenis la funkcion post Jiří Patera en la jaro 2003, kiam li transloĝiĝis en Most. Ne estis tiam aliaj aspirantoj. Ne estis alia solvo.
Post kelkaj jaroj Patera denove iĝis prezidanto por mallonga periodo kaj poste denove revenis mi.

Kaj kiuj estas viaj ples ŝatataj rememoroj el la prezidantaj jaroj?
Estis multaj belaj prelegoj, kunvenoj, ekskursoj. Ĉiam estis io interesa. Mia hobio estas ŝtonoj – mineralogio, kiel mi jam diris. Mi organizis plurajn aranĝojn kun tiu temo kaj ankaŭ kun teĥnikaj temoj.

Vi loĝas en Prago 6 proksime de la lasta loĝloko de Eli Urbanová. Ĉu vi havas iujn interesajn rememorojn pri ŝi?
Do, jes, ni ofte renkontiĝis tie proksime en la magazenoj ktp.

Sinjoro prezidanto, koran dankon pro via tempo kaj viaj respondoj.

Bulteno, n-ro 3/2014

Esperanto v pořadu ČRo Plus Radiofórum

19. prosince 2014 Český rozhlas Plus věnoval svůj pravidelný pořad Radiofórum tématu esperanta. Hostem ve studiu byl předseda našeho klubu právník a publicista Tomáš Břicháček, hosty na telefonu byl David Gruber, lektor v oblasti technik duševní práce, a Marek Blahuš, činovník České esperantské mládeže a člen Mezinárodní akademie esperanta z Centra jazykového vzdělávání Masarykovy univerzity v Brně. Pořad moderoval Petr Schwarz, kterému patří dík za celkově velmi přívětivé vyznění vůči esperantu.
[...]

Úryvky z rozhovoru Petra Schwarze s Tomášem Břicháčkem:

Co na esperantu považujete za nejcennější?
Lidé mají poměrně jasné představy o tom, co by měl ten mezinárodní jazyk, který se učí, splňovat. Tak asi chtějí, aby se jim zvýšily vyhlídky na dobré zaměstnání, aby se dokázali domluvit v hotelích, v restauracích, zeptat se na cestu na ulici a tak dále. Je pravda, že toto všechno esperanto nabídnout nemůže. Nicméně je stejně jako angličtina a jako jiné jazyky prostředkem komunikace. Má tu zvláštnost, že pokud chcete s někým mluvit, tak ho musíte v tom kterém státě vyhledat, což ovšem nebývá zas takový problém. Esperantisté jsou na internetu na různých seznamkách, na různých kontaktních listech, popřípadě můžete kontaktovat místní sdružení v tom městě, kam cestujete. A má to tedy tu výhodu, že už v tom cizím městě hned máte přátele, protože esperantisté jsou většinou velice rádi, když vidí jiné esperantisty z jiného státu, takže v tomto je to rozhodně přínosné. Já vidím ten základní smysl esperanta v tom, že je to prostředek k získávání kontaktů, přátel… V mnoha případech esperanto pomohlo i k navázání partnerských vztahů. Je velice mnoho manželství či partnerství, co vzniklo díky znalosti tohoto jazyka. Takže myslím si, že tady v tom to ten svůj smysl má.

Dá se říci, že do značné míry nejde o jazyk, ale o komunitu?
Je to jazyk, který se lidé učí dobrovolně, a tím se dá říct, že vytváří určitou komunitu, i když řekl bych, že je velice volná, protože řada lidí se pouze ten jazyk z nějakého zájmu naučí a není ani nikde organizovaná. Prostě nějak ho pak používají, nepoužívají. Někdy se opravdu stane, že na ně narazíte náhodou. Rozhodně to není nějaká sekta, jak si někdy někteří myslí. To může snad být případ některých nejradikálnějších, nezapálenějších esperantistů, ale to jsou v každé oblasti lidské činnosti nějací nadšení…

Esperanto mělo za cíl stát se světovým jazykem, zajistit mír mezi národy. Spojujete si s ním také takové cíle? A mají šanci se uskutečnit?
Tak tady v tom případě záleží na každém esperantistovi, co si s tím za ty cíle spojuje. Já osobně jsem nikdy nebyl natolik ambiciózní. Já jsem si s tím spojoval asi to, co jsem před chvílí říkal. Po pravdě řečeno, když jsem se začínal učit, tak jsem ani jasnou představu neměl. Mě vždycky bavily jazyky, tak jsem se ho naučil jenom z toho důvodu. A pak jsem se sám divil, kde všude se dá uplatnit a kolik zajímavých zážitků s ním můžete mít, kolik kontaktů, cestování…

Říká se, že esperanto je mnohem jednodušší než běžné jazyky. Je to pravda?
Tak to je rozhodně pravda. Člověk znalý několika základních, nejrozšířenějších jazyků se ho dokáže naučit i v řádech týdnů, což třeba byl můj případ. A nejznámější učebnice dnes se jmenuje „Esperantem za tři měsíce“ a s ní se opravdu dá ten jazyk za tu dobu naučit.
Záleží na schopnostech každého člověka, jestli je jazykově nadaný a jestli má už znalost nějakého jiného jazyka, tak těm to jde samozřejmě nejlépe, nejrychleji. Pro ostatní je to třeba trochu více práce, ale stejně je to nesrovnatelně jednodušší proti jakémukoli národnímu jazyku, protože všechno je tam pravidelné, žádné výjimky, všechno je velice jednoduché.

Existuje esperantská literatura?
Existuje poměrně rozšířená literatura i přímo psaná v esperantu. Překladové samozřejmě je většina, ale je řada titulů přímo napsaných v esperantu. Z našeho prostředí třeba bych mohl připomenout básnířku Eli Urbanovou životopisný román v esperantu a napsala také velice krásný životopisný román v esperantu. Bohužel tedy ty plody její práce nejsou přístupné neesperantistům.

Pozval byste něčím lidi, aby se učili esperanto?

I lidé bez velkých jazykových schopností mají díky esperantu možnost naučit se cizí jazyk a komunikovat s příslušníky jiných národů, možnost získávat známé, přátelé – dokonce, jak říkám, najít si i životního partnera. To všechno to jsou krásné možnosti a myslím si, že esperanto především nikomu neškodí a je užitečné tomu, kdo ho umí nějak využít, ať už k těmhle věcem nebo třeba i k pouhé zábavě…

Diskusní příspěvek dr. Maxe Kašparů k uvedenému pořadu:
Samotná otázka mi v základním pojetí nedává smysl. Je obsahově podobná otázkám typu „…má smysl kupovat si jízdní kolo, když se všude dostaneš veřejnou dopravou?“ nebo „… má smysl pěstovat si na zahrádce vlastní zeleninu, když si všechno můžeš koupit v supermarketu?“ Eventuálně „…má smysl chovat poštovní holuby, když existuje pošta a internet?“
Ona otázka odpovídá duchu silně zmaterializované doby. Pěstuj ten jazyk, který ti umožní byznys, věnuj se jazyku, který ti pomůže společensky vystoupat výš, dělej to, co ti umožní prosperovat. Pokud budeme takto materialisticky uvažovat, je naše esperanto vskutku zbytečné. Ale ono je více než jazyk.
Vraťme se k onomu porovnání s bicyklem, zeleninou a poštovními holuby. Nevím o tom, že existují kluby a společenství lidí, kteří cestují autobusem, ale společenství cyklistů existují. Nevím, že by existovaly kluby přátel kupujících zeleninu v supermarketech, ale svazy a spolky zahrádkářů existují. Nevím o žádné společenské organizaci lidí, kteří fandí České poště, ale kluby chovatelů poštovních holubů jsou početné.
Při propagaci esperanta bychom měli hovořit především o oné, pro svět sekundární rovině. Vždyť právě ona je ve skutečnosti primární.

Bulteno, n-ro 1/2015

2015

15/01/2015 – prelego de Margit Turková pri František V. Lorenz kaj Stanislav Schulhof, esperantistoj el Orienta Bohemio *(kunvenejo de EKP)*

29/01/2015 – prelego de Petr Chrdle pri Přemysl Pitter *(kunvenejo de EKP)*

12/02/2015 – prelego de Petr Chrdle pri la temo „Falsaj amikoj kaj vortoparoj por ĉeĥlingvaj esperantistoj“ *(kunvenejo de EKP)*

28/02/2015 – tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental’ en la praga bestĝardeno kun festo de la „adoptotago“ kaj granda konkursa pikniko

12/03/2015 – prezentado de Tomáš Břicháček pri tri novaj libroj: Rajko Doleček: *Inventura v 89 letech*, Marek Skřipský: *Případy inspektora Rádla* kaj Petr Fiala: *Na konci bezstarostnosti (kunvenejo de EKP)*

20-22/03/2015 – 7-a BIERo (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) en Pelhřimov. Inter la programeroj estis trarigardo de la urbo, la muzeo de rekordoj, vizito de bierfabriko, ludoj, testo, bunta kutima matenmanĝegado.

Aprilo kaj majo 2015 – En nia klubo okazis la agado „Traduka printempo“. Kelkaj volontuloj de nia klubo kaj aliaj esperantistoj (eĉ unu eksterlanda) tradukis por la Bulteno diversajn tekstojn, por ke niaj legantoj havu somere interesan kaj agrablan legadon.

08/04/2015 – Aperis Bulteno n-ro 1/2015.

04/06/2015 – prelego de Pavla Dvořáková pri la projektoj de ĈEA „Ciferecigado“ kaj „Fonoteko“ *(kunvenejo de EKP)*

30/05/2015 – Helena Štruncová, eksa prezidantino de nia klubo, iĝis 90-jaraĝa.

06/06/2015 – Mortis Jiří Patera, longjara aktivulo de nia klubo.

18/06/2015 – vizito kaj prelego de sudkoreaj esperantistoj en nia klubo (gviditaj de la instruistino Ana Sonĝanta) / Aperis Bulteno n-ro 2/2015.

19/06/2015 – E-mental’ partoprenis la karitatan agadon „Akce cihla“. Dank’ al tio en la centro de Prago estis granda enskribo Esperanto dum100 tagoj

26-28/06/2015 – E-mentala gastronomia aranĝo Viando en Chotýčany

24/09/2015 – prelego de Tomáš Břicháček pri la principo de subsidiareco en la eŭropa juro *(kafejo Bílá Vrána, Ve Smečkách 5)*

16-18/10/2015 – 8-a BIERo (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) en Nová Paka

05/11/2015 – prelego de Margit Turková pri Jan Hus *(kunvenejo de EKP)*

19/11/2015 – diskuto kun la artisto Jan Nevan pri lia frato Mikuláš Nevan *(kunvenejo de EKP)*

01/12/2015 – Aperis Bulteno n-ro 3/2015.

Zemřel Jiří Patera

Se smutkem oznamujeme, že 6. června 2015 ve věku 79 let zemřel dlouholetý předseda a činovník našeho klubu a čestný člen ČES Jiří Patera.
Jiří Patera se narodil 18. srpna 1935. Dlouhá léta žil v Mostě. Do Prahy se přistěhoval roku 1977 a od počátku se angažoval v našem klubu. V letech 1994 až 2003 a 2010 až 2012 byl jeho předsedou. V letech 2000 až 2013 byl pilným redaktorem klubového časopisu Bulteno.
Pohřeb se konal dne 11. června ve strašnickém krematoriu za účasti řady esperantistů. Jejich jménem zde promluvila paní Ing. Margit Turková, která přečetla slova Věry Ludíkové:
„S lítostí jsem přijala zprávu o úmrtí pana Jiřího Patery a mohu říci, že mě zaskočila. Právě jemu jsem velmi vděčná za překlady mých básní a textů do esperanta, které poté zařazoval do Bultena. Ráda jsem vídala jeho tvář jako návštěvníka autorských čtení mých knížek, zvláště těch, při nichž zaznívalo esperanto.
Lidé, kterých jsme si velmi vážili, nás opouštějí a nechávají po sobě prázdné místo, avšak jen zdánlivě… Zlomená lodyha jejich života se skláněla níž a níž, až úplně splyne se zemí. Jejich duše však bude obývat prostor někde vysoko nad zemí, bude přebývat ve sférách duchovních, aby mohla chránit své blízké, aby mohla být oporou svým přátelům, aby mohla být stále s námi…“
Přítomní esperantisté křesťané v tichosti pronesli modlitbu „Patro nia“.
[…]

Bulteno, n-ro 2/2015

Ankoraŭ pri Jiří Patera

Miroslav Malovec

La 6-an de junio 2015 forpasis Jiří Patera, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, konata internacie pro siaj tradukoj kaj artikoloj. Ankaŭ en La Gazeto aperis trideko da liaj kontribuaĵoj. Jiří Patera naskiĝis la 18-an de aŭgusto 1935. Ĝis 1977 li membris en la nord-bohemia urbo Most, sed poste li fariĝis grava membro de la esperantista klubo en Prago. Dum pluraj jaroj li estis membro de la asocia estraro kaj redaktoro de la asocia organo Starto, ankaŭ en la klubo li plenumis plurajn funkciojn inkluzive tiun de prezidanto (1994-2003 kaj 2010-2012). Li ankaŭ prilaboris la historion de la klubo (*Centjariĝo de la esperantista klubo en Prago*) kaj eĉ de la urbo mem (*Prago*). La kluba bulteno sub lia redakto (2000-2013) fariĝis literatura almanako.
Literaturo estis lia amo, al kiu li dediĉis multe da tempo. En 1983 li venkis en la literatura konkurso de Esperantista Kultura Festivalo en Opava per traduko de bonhumora rakonto *Inter bibliofiloj* de Jaroslav Hašek (1883-1923). Hašek estis lia plej amata verkisto, de kiu li tradukis sume 26 rakontojn. En 1993 li preparis kun Miroslav Malovec la libron *Ne nur soldato Ŝvejk*, kiun en 1994 eldonis la eldonejo KAVA-PECH. La tradukintoj elektis rakontojn verkitajn en la unua persono kaj kreis tiamaniere iom burleskan aŭtobiografion de Hašek, kiun ili kompletigis ankaŭ per kelkaj rakontoj alispecaj. En 2013 Jiří Patera reprezentis Esperanton kun Margit Turková en haŝekologia konferenco (2011), kie ili prezentis al internacia kolektivo de tradukistoj la esperantlingvajn tradukojn el Hašek, precipe la *Aventurojn de la brava soldato Ŝvejk*. Ties tradukinto Vladimír Váňa tion ne povis fari mem, ĉar li forpasis jam en la jaro 2000. Pri la partopreno de esperantistoj informis ankaŭ gazeto de ĉeĥaj kaj slovakaj tradukistoj.
Same li amis fabelojn de la klasika ĉeĥa verkistino Božena Němcová (1820-1862), dek tri fabelojn li publikigis en la kluba Bulteno. Simile li esperantigis fabelojn de la moderna ĉeĥa poetino Zdenka Bergrová (1923-2008) kaj poeziajn prozaĵojn de alia moderna poetino Věra

Ludíková (1943), kaj de poetoj Čestmír Vidman (1913-2013) kaj Jiří Karen (1920-2000). Karen postlasis siajn rememorojn pri la militaj jaroj, kiujn eldonis lia vidvino, kaj Jiří Patera dum kvin jaroj (2008-2013) aperigadis sian tradukon de tiuj rememoroj, ankaŭ en la kluba bulteno.
Libroforme estis eldonita lia traduko el Esperanto en la ĉeĥan de la libro *Zamenhof-strato* de Roman Dobrzyňski, kiun en 2005 eldonis KAVA-PECH.
Kiam aperis la libro *Osobní knihovna Karla Čapka* (Persona biblioteko de Karel Čapek, 2011), inter fremdlingvaj resumoj trovis lokon ankaŭ esperantlingva, tradukita de Jiří Patera. Li preparis similajn resumojn ankaŭ por personaj bibliotekoj de la pentristo Mikoláš Aleš (1852-1913) kaj de la Nobel-premiita sciencisto Jaroslav Heyrovský (1890-1967), sed tiuj ankoraŭ ne estis eldonitaj.
Grandan parton de lia verkaro formas sepdeko da liaj propraj artikoloj, per kiuj li esprimis siajn opiniojn pri aktualaj temoj kaj per kiuj li honoris famulojn (Petr Ginz, Francisko Valdomiro Lorenz, Eduard Kühnl, Václav Havel, William Auld k.a.).

Bulteno, n-ro 3/2015

Rozhovor s výtvarníkem Janem Nevanem

Tomáš Břicháček

Letos v létě zemřel dlouholetý člen UEA, někdejší výrazná osobnost života pražského Klubu esperantistů a vedoucí představitel hnutí české esperantské mládeže šedesátých let, Mikuláš Nevan. V této souvislosti zařazujeme rozhovor s jeho bratrem, výtvarníkem Janem Nevanem.

Nejdřív bych chtěl říci, že jako kluk a Váš žák výtvarného oboru základní umělecké školy, jsem se tehdy během práce na projektu „Babel“ dozvěděl o existenci mezinárodního jazyka. Pamatujete se na ten rok?
Ano, po letech vzájemného odloučení jsem se s bratrem setkal v Praze a mohli jsme se podílet na přípravě Kongresu, kde bratr externě vypomáhal s organizací. Vyzval mne, abych soubor dětských prací „Babel – zmatení jazyků“ instaloval na panelech foyeru Kongresového centra. Vzpomínám na ten velkolepý prostor se širokoúhlým panoramatem hlavního města. Bylo to v roce 1996, 81. světový kongres UEA.

Jak nyní vidíte, zájem o fenomén Esperanta mne přivedl až do pozice předsedy Klubu. Část jeho historie je spjata i se jménem Vašeho bratra. Vy, Jan Nevan, budete jistě vědět nejvíc o jeho životní pouti. Jak se odvíjela?
Jako starší bratr mne vtahoval do svých zálib už od dětství. Jeho stůl byl plný zeměpisných atlasů, alb a obálek s poštovními známkami z celého světa. Pěší trasy do centra města končily vždy v ulici Na Příkopě u výkladní skříně Pofisu. K hrám „země, město ...“ se později přidružily hry s papíry a „dokumenty“ – to jsme byli „jako“ důležití úředníci a bankéři, vypisovali jsme šeky, jezdili „jako“ výtahem z patra do patra vyřizovat úřední agendu. Vzpomínám si na letní tábor, na karneval. Bratr představoval cizince-cestovatele v tmavých brýlích, s doutníkem v puse a kufrem, který jsem polepil kreslenými nálepkami měst s palmami. Já jsem představoval jeho psíka. Vyhráli jsme první místo. Vybavuje se mi i film Milionová bankovka. Ten musel bratr vidět vícekrát.

A kdy přišlo na Esperanto?
Na střední škole se bratr učil angličtinu, ale vsadil se se spolužákem, kdo z nich se začne učit originálnější jazyk. On se zapsal v Klubu do jazykového kurzu, který končil na jaře 1963. Tehdy se vracel domů a z chodby volal: „Ĉu vi jam vespermanĝis?“ Nerozuměli jsme mu. O

prázdninách odjel na jazykový tábor Lančov, kde získal schopnost plynule konverzovat, vybaven slovní zásobou i pro pomůcky v kuchyni a vaření!
Následující roky se už aktivně zapojoval do života Klubu esperantistů v Praze, kde si osvojený jazyk mohl vyzkoušet při návštěvách cizinců. Nyní mu i korespondence se světem přinášela bohatou nadílku poštovních známek a roztáčela globus na jeho stole. K diakritickým znamínkům v psacím stroji přibyla i stříška. Také já jsem byl osloven myšlenkou L. L. Zamenhofa. Druhá polovina šedesátých let vzbuzovala naděje ke společenskému uvolnění, ovšem esperanto, jeho kosmopolitní povaha, nebylo příliš žádoucí. A tak právě jakási výjimečnost, téměř partyzánská, prostředí samideánů a kontakt se svobodným světem přitahoval stále víc mladých do jazykových kurzů, kde se vyučovalo přímou metodou.
Sílící aktivita se projevovala i v dalších městech republiky a bratr si uvědomoval potřebu součinnosti skupin a navázání vzájemných osobních kontaktů k posílení společné myšlenky. Tiskli jsme jednoduché jednobarevné oběžníky, časopisy.

Kromě času a úsilí to vyžadovalo i určitou odvahu.
Mikuláš měl schopnost zaujmout a získat řadu nadšenců, pochopitelně nemálo děvčat, pracovitých, obětavých, šikovných i za psacím strojem. Organizoval desítky setkání, sjezdy esperantské mládeže se zkratkou TAJE /Tutŝtata aktivo de junaj esperantistoj/ po celé republice, mezinárodní tábor IJES. Věděli jsme, že naše činnost byla bedlivě sledována a korigována. Doba uzrávala a jaro 1968 se na nás usmálo a vše ospravedlnilo. Otevřené hranice do demokratického světa; cesty opravdového přátelství bez jazykových bariér. Eufórie ze zcela nových prožitků. V kontrastu s tímto vhledem do života na západ od našich hranic bylo najednou pro mého bratra nepochopitelné, že jeho studium zahraničního obchodu na VŠE pokračuje dílenskou praxí ve strojírenské fabrice. A po směně ještě na něho čekají doma tlusté knihy Politická ekonomie a Dějiny marxismu-leninismu.
A tak si na výzvu UEA podal přihlášku na konkurs pro funkci KKS /Konstanta kongresa sekretario/. Uspěl a se služebním pasem Ministerstva kultury i s manželkou přesídlil do Rotterdamu.

Tím se mu definitivně začaly realizovat ty dětské sny – tužby.
Ano, denní život internacionálního prostředí úřadu UEA, agenda KKS, spolupráce s instituty UNESCO, publicita a styk s jazykovými kapacitami. Cesty mapování místních podmínek pro organizování budoucích světových kongresů, koordinace všech složek pro plynulý a úspěšný průběh setkání programových sekcí. Debutoval v Helsinkách 1969, po Vídni 1970 následoval Londýn a pak Portland v USA ve státě Oregon.
Přátelským vystupováním a schopností komunikovat si získal mnoho přátel ve světě. Rozevřel se mu svobodný prostor, v němž se našel a realizoval. To dokumentují dobová periodika slovem i fotografiemi na titulních stranách revue Esperanto, kde se objevuje s prezidenty, kosmonautem …
Po invazi 21. srpna 1968 se v Československu rychle redukovaly vztahy na mezinárodním poli. Bratr uprostřed období smlouvy s UEA měl být najednou odvolán ministerstvem z postu KKS. Rozhodl se plnit podmínky vůči úřadu v Rotterdamu a tedy zůstat za hranicemi. Holandsky se naučil rychle a dobře, takže po uplynutí funkčního období v Ústředí si mohl otevřít s manželkou Jaroslavou grafické studio. Tiskli bezchybné publikace dokonce i pro magistrát tohoto významného přístavního města. Po deseti letech opustil pršlavé Nizozemí a přesídlil s rodinou do Portlandu, který obdivoval už při organizování 57. Kongresu v roce 1972. V USA se dopracoval k vlastní cestovní agentuře, poznával nové destinace dalších kontinentů. Čas od času jsem od něho dostával barevné pohlednice frankované poštovními známkami s exotickými motivy. Ale jinak to bylo desetiletí bez možnosti osobního setkání, kontakt nebyl žádoucí. Roky plynuly, s přibývajícím věkem i zimy v Oregonu bývaly pro bratra nepřijemné. Potřebu života

v teplém klimatu mezi sluncem a mořem mu splňoval poloostrov Penang v Malajsii; kypící život Asie probarvený četnými etniky a jejich kulturou, náboženstvím s rituály i pestrou gastronomií. A nové země k poznávání, po souši i po moři. Doprovázel stále další a další skupiny turistů z Čech, Evropy i Ameriky. A tak měl blízko i do Vietnamu a účasti na Kongresu v Hanoji v roce 2012, podílel se na překladu učebnice esperanta v thajštině. Byl stále aktivní do doby, než ho postihlo vážné srdeční selhání. V oslabeném organismu se projevila brzy ještě komplikovanější a záludnější zhoubná nemoc. V minulém roce obdržel od UEA diplom za 50 let členství.

50 let? Přispívat 50 let, to znamená, že o užitečnosti Esperanta v současné době ani trochu nezapochyboval!
Mám tu průvodní text k diplomu, kde se mimo jiné píše: „*Diplomo, per kiu Universala Esperanto-Asocio rekonas vian 50-jaran seninterrompan membrecon en la Asocio. Mi elkore dankas vin pro via fideleco al UEA kaj gratulas vin! Mi esperas, ke la diplomo revenigos multajn belajn memorojn pri la tempo, dum kiu vi jam estas membro de UEA. Mi ankaŭ esperas, ke ĝi instigos viajn esperantistajn geamikojn, kiuj vidos ĝin, sekvi vian ekzemplon.*
Fideleco de membroj estas la plej valora trezoro de nia Asocio. Dank' al ĝi UEA transvivis plej malfacilajn tempojn kaj ŝtormojn jam dum 106 jaroj kaj nun forte staras kiel la ĉefa reprezentanto de la parolantoj de la Internacia Lingvo. Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA, 4. 12. 2014.“
Ještě v nemocnici lékařům navrhoval trasy pobytů pro dovolené v exotických destinacích. Zhoubná nemoc však kulminovala. Po následných čtyřech operacích jeho organismus podlehl 21. srpna 2015 na Floridě. Letos 28. října by se dožil 70 let. Jako by v jeho životě některá data sehrála významnou osudovou roli. Vždyť 21. srpen 1968 ho, obrazně řečeno, přiměl opustit hranice rodné země, letošní toto datum jej přeneslo za další hranici, hranici života.

Děkuji za rozhovor. Rád Vás, pane učiteli, uvidím při setkáních v našem klubu Ve Smečkách.

Nicholas (Mikuláš) Nevan (naskiĝis la 28-an de oktobro 1945, mortis la 21-an de aŭgusto 2015 en Florida, Usono) estis ĉeĥdevena esperantisto, en 1976 li iĝis nederlandano kaj poste usonano en 1995.
Nevan lernis Esperanton kiel gimnazia studento en Prago kaj baldaŭ komencis aktive agadi en la iama Ĉeĥoslovaka E-movado, precipe la junulara. Li entuziasme gvidis multajn kursojn kaj organizis plurajn landajn kaj internaciajn E-aranĝojn. En 1964 Nevan fondis malgrandan, sed viglan junularan E-rondeton ĉe Ĉs. Junulara Asocio (SĈM).
En julio 1965 estis fondita la junulara sekcio de ĈSEK kaj Mikuláš Nevan estis komisiita kiel ĝia gvidanto. Tiam li kun kunlaborantoj ekspedis 5600 leterojn por akiri informojn pri ĉeĥoslovakaj junaj esperantistoj. En Prago li iniciatis kvin novajn kursojn. En aprilo 1966 li organizis tutŝtatan junularan aktivular-kunvenon, kiun venis subteni Ivo Lapenna persone. Samjare Nevan edziĝis.
Nevan enoficiĝis kiel KKS de UEA en la jaro 1969. Dum Konstitua Kongreso de ĈEA en Brno (1969) Mikuláš Nevan jam kiel oficiala reprezentanto de UEA tralegis leteron de d-ro Ivo Lapenna, tiama prezidanto de UEA. En 1973 pro tiamaj politikaj cirkonstancoj kaj premoj li devis rezigni la postenon.
Post enmigro al Usono en 1978 li hejmiĝis en Portlando (Oregono), kie li vigle partoprenis en la loka movado. En 2005 li retiriĝis al Penango (Malajzio), kie li servis kiel D kaj FD de UEA pri monda turismo. Lia vojaĝemo kondukis lin al pli ol 80 landoj sur 4 kontinentoj. Membro de UEA ekde 1963. Li esperantistigis ankaŭ plurajn siajn familianojn.

El Vikipedio, la libera enciklopedio

2015

2016

11/02/2016 – ĝenerala kunveno de nia klubo – elektita nova estraro kaj ŝanĝita la nomo *(kunvenejo de EKP)*

15/02/2016 – publika prezentado de libroj *Esperanto od A do Z* kaj *Robinsoni na Sibiři* de KAVA-PECH

27/02/2016 – tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental en la praga bestĝardeno kun festo de la „adoptotago“ kaj granda konkursa pikniko

11-13/03/2016 – 9a-BIERo (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) en Jihlava

24/03/2016 – prezentado de Tomáš Břicháček pri „gravitaj montetoj“ *(kunvenejo)*

01/04/2016 – eldonita Bulteno, n-ro 1/2016

21/04/2016 – prelego de Jiří Galuška pri lia vojaĝado kun Esperanto en Ĉilio *(kunvenejo)*

23/04/2016 – aktualigitaj la indikoj pri nia klubo en la registro de asocioj

05/05/2016 – prelego de Petr Chrdle pri la reformacio en Ĉeĥio *(kunvenejo)*

21-22/05/2016 – SELE (Semajnfina lernado) – E-mentala socia kaj eduka aranĝo – en Chocerady

02/06/2016 – prezentado de Vlasta Pištíková pri Sicilio *(kunvenejo)*

Majo kaj junio – okazis denove la agado „Traduka printempo“: volontuloj havis okazon traduki interesajn literaturajn tekstojn por la somera Bulteno

06/06/2016 – 6-a E-mentala pikniko – en Bad Schandau

15/06/2016 – Helpu helpi 2016

15/06/2016 – eldonita Bulteno, n-ro 2/2016

16/06/2016 – prelego de Tomáš Břicháček pri Ivan Mládek *(kunvenejo)*

24-26/06/2016 – Viando – E-mentala gastronomia aranĝo – en Chotýčany

15-17/07/2016 – Praga somero – E-mentala socia aranĝo

13/08/2016 – 7-a E-mentala pikniko – en Krásná Lípa

01-04/09/2016 – 3-a junulara Centrejo en Prago

19/09/2016 – jubilea koncerto de Miroslav Smyčka en teatro U Valšů

19/09/2016 – vizito de rusaj esperantistoj el Kazano *(kunvenejo)*

06/10/2016 – prelego de Petr Chrdle pri Suda Koreio kaj venonta UK en Soulo *(kunvenejo)*

07-09/10/2016 – 10-a BIERo (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) – en Turnov

03/11/2016 – prelego de Tomáš Břicháček pri la eŭropa migra krizo *(kunvenejo)*

03/11/2016 – memoriga programo „Tam, kde skřivan zpívá na betonu“ en Malešica bierfarejo pri Jiří Karen

25–27/11/2016 – E-mentala Kristnasko

01/12/2016 – eldonita Bulteno, n-ro 3/2016

Členská schůze 11. února 2016 (úryvek ze zápisu)

Dne 11. února 2016 od 17 hod. se konalo v klubovně v ulici Ve Smečkách 25, Praha 1 zasedání členské schůze Klubu esperantistů v Praze […].

Účast
Dle stanov Českého esperantského svazu, z.s. platí, že členská schůze klubu (včetně klubu, který je pobočným spolkem) je schopna usnášet se při účasti alespoň 5 členů s hlasovacím právem. Tato podmínka byla splněna. Účastnilo se 11 členů s hlasovacím právem […].

Volba zapisovatele a ověřovatele
Členská schůze jednomyslně (11 hlasy) zvolila jako zapisovatelku Vlastu Pištíkovou a jako ověřovatele Víta Guiglielma Mišurce.

Zpráva předsedy
Předseda klubu Tomáš Břicháček přednesl zprávu o fungování klubu v období od posledních voleb výboru (27. 2. 2014).

Zpráva místopředsedy a pokladníka
Místopředseda a pokladník klubu Jiří Mišurec přednesl zprávu o členské základně a stavu financí.

Volba předsedy a dalších členů výboru
Členská schůze jednomyslně (11 hlasy) zvolila nový výbor v následujícím složení
- Tomáš Břicháček
- Jiří Mišurec
- Vlasta Pištíková
- Vít Guiglielmo Mišurec
- Jan Šebetovský

Členská schůze jednomyslně (11 hlasy) zvolila ze členů výboru předsedu, Tomáše Břicháčka. Předseda je v souladu se stanovami Českého esperantského svazu, z. s. statutárním orgánem pobočného spolku.
[…]

Změna názvu
Členská schůze se jednomyslně (11 hlasy) usnesla, že název klubu / pobočného spolku nově zní **Klub esperantistů v Praze, pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.**
Cílem změny bylo vyhovět požadavkům nového občanského zákoníku.

Potvrzení změny sídla
Členská schůze se jednomyslně (11 hlasy) usnesla na prohlášení, jímž potvrzuje, že pobočný spolek sídlí na adrese **Jirečkova 5, 170 00 Praha 7** v bytě manželů Jiřího Mišurce a Vlasty Pištíkové.
Ke změně došlo na základě rozhodnutí výboru již v roce 2014. Členská schůze změnu dodatečně potvrzuje pro účely zápisu sídla do rejstříku spolků.

Bulteno, n-ro 1/2016

Zápis aktuálních údajů o klubu do rejstříku spolků

23. dubna 2016 byl aktualizován záznam o našem klubu v rejstříku spolků. Byly zaneseny nové údaje – zejména název, sídlo a statutární orgán. Dostáli jsme tak požadavkům nového občanského zákoníku a dalších předpisů. Výpisem z rejstříku se nyní budeme moci prokazovat při právních jednáních s třetími osobami.

Bulteno, n-ro 2/2016

Viktor Dvořák přednášel v Nitře

Stoprvý Světový kongres esperanta se konal na Slovensku v Nitře v budovách Polnohospodářské Univerzity Konštantína Filozofa na téma „Sociální spravedlnost – jazyková spravedlnost“ pod záštitou prezidenta Slovenské republiky Andreje Kisky. Paralelně na Pedagogické fakultě nitranské univerzity probíhala mezinárodní konference na téma „Perspektiva jazykové komunikace v Evropské unii“ se zaměřením na jazyky států „Vyšehradské čtyřky“. Viktor Dvořák přednesl[10] informaci o již přijatých opatření ve výuce žáků základních škol v České republice, tj., výuka angličtiny jako prvého jazyka a z jazyků tzv. Druhé skupiny – podle možností školy – v souladu s dokumentem EU ze dne 18. 9. 2008 v konečném znění. Výstupem z této konference byl sborník referátů[11].

podle poznámek Viktora Dvořáka, září 2022

Junulara „Centrejo“ en Prago

Thomas Winkler

La aranĝo 3-a Centrejo okazis inter la 1-a kaj 4-a de septembro en Prago. Esperantistoj – ĉefe el Slovakio kaj Ĉeĥio, ĉar estis renkontiĝo organizita de SKEJ kaj ĈEJ, sed ankaŭ el Rusio, Hungario kaj Germanio – kunvenis vespere en la agrabla restoracio U Skřetů. Tiu kiel unua restoracio en Prago prezentas sian menuon ankaŭ en Esperanto! Amikajn babiladojn tie suplementis bongustaj ĉeĥaj kaj slovakaj manĝaĵoj.
Post vespermanĝo okazis la oficiala ĝenerala asembleo de ĈEJ en apuda bierejo. Eksterlandanoj, kiujn tio ne koncernis, dumtempe ĝuis vesperan promenon tra Prago, vizitante la urbolumojn spegulantan riveron Vultavo kaj vidante noktan urbosilueton.
Partoprenantoj ne el Prago havis la eblecon kune loĝi kontraŭ bona prezo en studenthejmo sur la monto Petřín. Tiu loko estas sufiĉe urbocentra kaj kvankam simple kaj malmoderne ekipita tute taŭga. Tiu malmoderneco havas eĉ apartan, socialisman ĉarmon, kiun la tuta kvartalo sekvas.
Vendrede matene eblis trankvile viziti la apudan vendejon, kiun la helpemaj organizantoj montris al ni vespere. Tiel eblis malmultekoste kaj laŭplaĉe kune kun esperantaj amikoj matenmanĝi, ekstere en bela vetero.

---

[10] Dvořák Viktor, Malovec Miroslav: Cxu Esperanto apartenas al la lingvoj nomataj “DUA LINGVO“ laux la dokumento COM (2008)0566, Fina – Bruselo 18. 9. 2008?
[11] Perspectives of Language Communication in the EU, Published by Constantine the Philosopher University in Nitra, Faculty of Central European Studies 2016

Finmanĝinte nin atendis interesa promenado tra Petřín – laŭirante montetajn vojojn, spektante telferon, trairante malsatan muron, laŭvole gustumante hejmfaritan limonadon kaj/aŭ vizitante Eiffel-stilan elrigardturon.
Post tagmanĝo en urba restoracio ni vizitis la monaĥejon Břevnov. Ĝi posedas ankaŭ tre modernan bierfarejeton. Bedaŭrinde ĝi ne ofertis tre ampleksan trarigardon, sed eblis aĉeti la lokajn bierojn por kunporti hejmen al siaj geamikoj. Krome la monaĥejo havas belegan parkon, tre indas promeni tra ĝi.
Akompanante vespermanĝon ni drinkis Absinth, tre fortan verdan brandon; oni spektakle bruligas per ĝi malsekigitan sukeron sur kulero, ĝis kiam ĝi karameliĝas, kaj per tio dolĉigas la drinkaĵon. Nur se oni ne atentas bone, la tuta drinkaĵo ekbrulas.
Pro nuba ĉielo bedaŭrinde ne povis okazi stelobservado, kiu tamen estis anstataŭigata per tre etosa sidado surplanke ĉe la rivero. Tiel nomata Náplavka estas tre bona loko por paroli, ĝui la vesperon, kune drinki lokaĵojn kaj/aŭ kunportitaĵojn. Longe ni sidis tie en esperanta cirklo, ĝis kiam ni pluiris ankoraŭ al diskejo, kie ni finis la vesperon dancante.
Sabate ni vizitis la kvartalon Vyšehrad kaj la apudan kongrescentron. Vyšehrad havas belajn historiajn tombejon kie estis sepultitaj famaj ĉeĥoj, preĝejon kaj rotondon – tio estas ronda preĝejeta konstruaĵo. Krome ĝi ofertas ravan elrigardon al la rivero kaj la urbo. Antaŭ 20 jaroj la kongrescentro gastigis la Universalan Kongreson, ni uzis la eblecon tosti kaj fotiĝi ĉe la memorŝtono.
Posttagmeze ni promenis de malantaŭ la ĉefa stacidomo al la verda kvartalo Vítkov, sekvante vojon, kiu iam estis fervojo. Ni vizitis nekredeble bonan kaj senpagan milithistorian muzeon, kie mi povintus resti ankoraŭ multe pli longe. ;) Post trairo de parko kaj paŭzo ĉe kafejo ial jam baldaŭ alproksimiĝis vespero. Do post fortiĝo en restoracio ni supreniris la televidan turon de Žižkov, kie ni ĝuis kune la sunsubiron kaj elrigardon al Prago al ĉiuj direktoj el granda alteco. La vespero finiĝis en kela bierejo, kie post lacigaj esperantaj, ĉeĥaj kaj slovakaj interparoloj (kaj bongustaj bieroj) la muro apud mi ekpluvis.
Dimanĉe ni ankoraŭ spertis la nevideblan ekspozicion, kie ni lernis en plena malhelo moviĝi kaj palpi aĵojn kaj meblojn de kuirejo, banĉambro, merkata strato en urbo, naturo kun ligna ponto, kaj finfine iris al trinkejo, kie ni povis mendi kaj ĝui trinkaĵojn kaj glaciaĵon. Mi lernis ke ne estas bona ideo en tiu situacio havi kaj eŭrajn kaj ĉeĥajn monerojn en monujo, ĉar nur malfacile distingeblas 2 €-monero de 10 Kč-monero. Sed la kelnerino tre honeste redonis la monerojn kontraŭ ĝustaj :)
La aranĝo finiĝis post lasta komuna tagmanĝo en kebabejo. Mi tre ĝojas ke mi partoprenis ĝin. La programo estis tre bone preparita, kun multe da diverseco kaj ankaŭ ne tro plenŝtopita, tiel ke restis multe da tempo por paroli kun la amikaj partoprenantoj. Finfine mi volas danki al ĈEJ kaj SKEJ, ke ili organizis ĉi tiun aranĝon!

Bulteno, n-ro 3/2016

Oslava devadesátin Miroslava Smyčky

Operní pěvec a esperantista Miroslav Smyčka oslavil 11. září 2016 devadesáté narozeniny. Jubilantovi dodatečně přejeme všechno nejlepší a hlavně pevné zdraví.
19. září se v pražském divadle *U Valšů* se konala oslava. O události jsme nalezli zprávu na stránkách městské části Praha 12, kterou níže v úplnosti citujeme:

Barytonista Miroslav Smyčka oslavil 90. narozeniny!
Toto významné životní jubileum oslavil emeritní operní sólista v divadle U Valšů v pondělí 19. 9. Oslavu pro něho přichystala jeho dcera, herečka divadla Semafor, paní Jolana Haan

Smyčková spolu se svým manželem, operním zpěvákem Richardem Haanem. K mnoha gratulantům z řad přátel, herců a pěveckých kolegů se připojil i místostarosta MČ Praha 12 Robert Králíček, který zároveň pana Smyčku uvítal do naší městské části jako jejího nového obyvatele.

Večerem plným krásných vzpomínek a neméně krásného zpěvu provázela PhDr. Radmila Hrdinová a klavírního doprovodu účinkujících se ujal hlavní sbormistr a dirigent Státní opery pan Adolf Melichar.

Miroslav Smyčka absolvoval reálné gymnázium v Brně, v letech 1945-1949 studoval filozofii a filologii na Masarykově univerzitě v Brně, ale před závěrečnými zkouškami byl vyloučen v rámci politických prověrek. Již v době univerzitních studií zároveň studoval zpěv na hudební škole a konzervatoři a v roce 1949 byl angažován ve sboru Státního divadla v Brně. Po ukončení základní vojenské služby pokračoval v operním sboru v Slezském divadle v Opavě a od roku 1953 započala jeho kariéra operního sólisty v divadlech v Liberci, Opavě, Českých Budějovicích a zejména v Ústí nad Labem.

Za jeho celoživotní uměleckou práci mu byla na návrh UNIE – Odborového svazu profesionálních zpěváků ČR a Společnosti koncertních umělců – v roce 2010 udělena cena SENIOR PRIX.

Dalšího významného ocenění se Miroslavu Smyčkovi dostalo v roce 2014, kdy převzal z rukou slavného basisty Luďka Veleho cenu Eduarda Hakena.

Bulteno, n-ro 3/2016

Vzpomínka na Jiřího Karena v Malešicích

3. listopadu 2016 se v Malešickém mikropivovaru konal poetický večer „Tam, kde skřivan zpívá na betonu“ v rámci festivalu Den poezie na připomínku básníka Jiřího Karena. Akce se účastnili i někteří členové našeho klubu. Dále zařazujeme text paní Margit Turkové o této události.

Enkadre de ĉiujaraj TAGOJ DE POEZIO en Prago okazis la vespero „Renkontiĝo kun la poeziverkaro de Jiří Karen“. Organizis ĝin kultur-prizorgantoj de la kvartalo Praha 10, kies estis Jiří Karen kaj lia edzino Zuzana longjaraj loĝantoj. Ĉar grava parto de la prezentado estis ankaŭ la esperantismo de Jiří Karen, mi estis petata tuŝi kaj klarigi la temon, kaj ĉefe deklami kelkajn poemojn, kiuj troviĝas en esperanta traduko (en la volumo "Flugilhava ŝtono", eld. FONTO, Brazilo). Ĝojiga afero por mi (por NI) estis, ke jena temo estis preparita kun klara simpatio flanke de organizantoj. Do, sur la ekrano troviĝis ne nur la verkoj de Jiří Karen, sed ankaŭ la nomoj de liaj, de niaj samideanoj – verkistoj: Eli Urbanová, Eva Seemannová, Josef Rumler, František Kožík... Tio igis min klarigi, ke kelkaj el ili same apartenis al la loĝantoj de la menciita kvartalo – hazarde ili vivis sur la sama strato kiel J.K. – Josef Rumler kaj František Kožík. Do, mi "instigis" la organizantojn laŭeble omaĝi ankaŭ tiujn ĉi famajn loĝantojn... "Ni ja intencas omaĝi František Kožík, kunlabore kun lia filino, sed ni ne sciis pri lia Esperanto-interesiĝo", ili diris. Do mi atentigis ilin, pri iama grava Esperanto-elsendado de la elsendejo BRNO, en kiu gravan rolon havis František Kožík. Tion ili kun ĝojo akceptis.
La tuta vespera programo estis registrita elektronike sur YouTube, laŭ la deziro de la edzino Zuzana, kiu loĝas en la pavilono por veteranoj, (Vojenské nemocnice, Praha) kaj liveris la materialojn pri Jiří el sia familia arkivo. Do, estas ĉefe ŝia merito de la sukcesplena omaĝo kaj ĉefe konservado de la afero. Je la 8-a de decembro ĉijare ŝi ĝisvivos sian 95-jariĝon. Okaze de la jubileo oni organizos similan vesperon, kiu enhavos la vivon de Zuzana kiel malliberulino en la prizonejo Terezín, kaj de Jiří, prizonulo por la devigaj milit-laboroj en Germanio. Pri tio li verkis memorlibron, kiu estas alte taksita pro liaj aŭtentaj sinceraj esprimoj. La libro estis tradukita en E-on de Jiří Patera, kaj poŝtupe publikigita en la Bulteno (de EK Prago).
La evento realiĝos je 1a de decembro, 18 hor., en la DOMO de LEGADO (Dům čtení), Ruská-strato, Prago
Partoprenos ankaŭ la poetino Věra Ludíková, kiu estis editoro de kelkaj verkoj de JK (en la eld. Chronos, Ústí nad Orlicí) amikino de la geedzoj, kaj favoranto de nia esperanta afero. Ni rememoru ĝuste ŝian partoprenon de la kultura programo ĉe la pasintjara ČEA-konferenco en Ústí nad Orlicí.
Al ĉiuj supre nomitaj gravuloj mi dediĉas mian privatan rememoron kaj instigas ĉiujn legantojn rememoru ilin ankaŭ. Danke al ili estas nia ĉeha esperanto-movado spirite riĉa.

Bulteno, n-ro 3/2016

2017

21/01/2017 – E-mentala socia aranĝo *1-a tosto por Zamĉjo* en Hradec Králové

28/01/2017 – E-mentala socia aranĝo *2-a tosto por Zamĉjo* en Plzeň

03/02/2017 – E-mentala socia aranĝo *3-a tosto por Zamĉjo* en Litovel

09/02/2017 – Jan Šebetovský prezentis malnovajn filmojn el E-aranĝoj malkovritaj en la ŝranko en la klubejo *(klubejo)*

23/02/2017 – prelego de Lucie Karešová pri Viktor Emanuel Frankl *(klubejo)*

Jak jazyk funguje v praxi, jsem poprvé zažila na esperantistické stáži. Přišlo mi až neuvěřitelné, že může takhle dobře fungovat. Setkala jsem se tam s několika esperantisty, často právě Francouzi, z nichž někteří měli za sebou už několikaletou praxi s esperantem. Byl to každopádně zážitek.

Myslíte, že vám esperanto i po skončení soutěže může být v životě užitečné?
Myslím si, že naučit se esperanto rozhodně není k zahození. Může posloužit jako dobrý základ k tomu naučit se další jazyky a také nabízí možnost cestovat a setkávat se s esperantisty z celého světa prostřednictvím Pasporta Servo. A možná časem najdu i nějaké propojení mezi esperantem a mou tvorbou, kdy mi esperanto může posloužit jako „univerzální jazyk“ specifické komunity esperantistů. Rozhodně si myslím, že se dá v rámci esperanta najít zajímavý potenciál, nový horizont pro něco dalšího.

Co vás inspirovalo k napsání básně „Senti la momenton“? Souvisí to s tím, že ve vašem uměleckém portfoliu o sobě píšete, že vás zajímá přítomný okamžik?
Nepřímo to spolu svým způsobem souvisí. Jak v umělecké tvorbě, tak i v poezii, co píší do velké míry kladu důraz právě na přítomný okamžik, pomíjivost a snahu zachytit existující v čase. Báseň „Senti la momenton“ vznikla právě podobnou hrou s přítomností a akumulací obrazů, toho, co je bezprostředně teď a tady. Zároveň je to i takový „lingvistický experiment“ na pomezí francouzštiny a esperanta, jelikož vznikla jako určitá „derivace“ velmi podobné francouzské básně, ne však jako její překlad. V rámci esperanta jsem se vlastně snažila o to znovu oživit onen přítomný okamžik zachovaný ve francouzské básni a vytvořit tak báseň novou v jazykových možnostech esperanta.

* * *

Senti la momenton

Eva Pechová

Senti la momenton en sia haŭto
kiam ĝi senvestigas
tiun momenton lumantan
kiam la parfumo de la mateno
de la suno sur la cilioj
ĝenas tian foreston
sub la kolonoj de lumoj
La amorajto
La sendenta karmo
La belgrajno kiu ne malaperas
La kadenco de deliraĵo
La perdaj folioj elspiras la distancojn
Kiel pensi
Ne forgesi spiri
Tie kaj ĉi tie
La pavimo reflektas ankoraŭ
la larmojn de pluvo
Eksenti ĉiam
ĉi tiun saman solecon
La larma pluvo
kun plia foresto
Imiti la ritmon de tiu ebona pluvo
La resto de perdoj
kun la konturoj forestantaj

Bulteno, n-ro 3/2018

2019

24/01/2019 – prelego de Tomáš Břicháček pri la historio de la Bulteno *(klubejo)*

07/02/2019 – ĝenerala kunveno; elektita nova estraro: Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Pištíková, Jan Šebetovský kaj Václav Ondřej Loučka

16/02/2019 – tradicia renkontiĝo de E-mental' en la praga bestĝardeno

21/02/2019 – prelego de Petr Chrdle pri Kurisu Kei *(klubejo)*

07/03/2019 – diskuto kun Květa Krajíčková pri 1980-aj kaj 1990-aj jaroj *(klubejo)*

16–17/03/2019 – ementala ekskurso en Leipzig

21/03/2019 – prelego de Bernhard Tuider pri la Esperanto-muzeo en Vieno *(klubejo)*

04/04/2019 – Aperis Bulteno n-ro 1/2019 (215); vizito de japana esperantistino Hiroko Katayama

12–14/04/2019 – E-mentala internacia aranĝo 15-a BIERo en Chotěboř

18/04/2019 – prelego de Margit Turková pri Kurisu Kei kaj lia tradukado de Hašek *(klubejo)*

02/05/2019 – prelego de Petr Chrdle pri la familio Ginz *(klubejo)*

16/05/2019 – prezentado de Jiří Galuška pri lia vojaĝo tra Yucatán *(klubejo)*

30/05/2019 – lanĉo de la libro *Zamenhof – život dílo ideály* en la Pola instituto

09/06/2019 – E-mental' pentris reklamon por Esperanto en Veletržní strato

22–27/07/2019 – E-mentala internacia aranĝo ĜUPR (Ĝuu Pragon) en Prago

24/07/2019 – tradicia E-mentala aranĝo Helpu helpi

17/08/2019 – 14-a E-mentala pikniko en Krásná Lípa

14/09/2019 – tradicia E-mentala Kuro por Paraple

19/09/2016 – prelego de Petr Chrdle pri Stanislav Schulhof *(klubejo)*

03/10/2019 – prelego de Tomáš Břicháček pri Jaroslav Šustr okaze de la 50-a datreveno de lia forpaso *(klubejo)*

04–06/10/2019 – E-mentala internacia aranĝo 16-a BIERo en Planá u Mar. L.

15/10/2019 – Aperis Bulteno n-ro 2/2019 dediĉita al Jaroslav Šustr

31/10/2019 – prelego de P. Chrdle pri Bertha von Suttner *(klubejo)*

28/11/2019 – prezentado de Vlasta Pištíková pri Sicilio *(klubejo)*

30/11–01/12/2019 – tradicia E-mentala aranĝo Kristnasko

07/12/2019 6-a Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio en Zittau

12/12/2019 – Kristnaska kaj Zamenhofa vespero; Aperis Bulteno n-ro 3/2019

14–15/12/2019 – E-mentala aranĝo 7-a Granda lokŝumado en Bratislavo

20–22/12/2019 – E-mentala aranĝo Semajnfino kun opero en Prago

Členská schůze 7. února 2019

Dne 7. února 2019 od 17 hod. se konalo v klubovně Ve Smečkách 25 zasedání členské schůze Klubu esperantistů v Praze. Účastnilo se 12 členů s hlasovacím právem a tři hosté z Benešova. Předseda klubu Tomáš Břicháček přednesl zprávu o fungování klubu ve funkčním období výboru, tj. od 27. 2. 2014 (výbor v mezidobí potvrzen ve funkci 11. 2. 2016). Místopředseda a pokladník klubu Jiří Mišurec přednesl zprávu o členské základně a stavu financí. Členská schůze vzala obě zprávy na vědomí.
Poté proběhla volba předsedy a ostatních členů výboru. Členská schůze zvolila za předsedu Tomáše Břicháčka (10 hlasů pro, 1 se zdržel, 1 z původních účastníků nepřítomen). Za ostatní členy výboru byli zvoleni Jiří Mišurec, Vlasta Pištíková, Jan Šebetovský a Václav Ondřej Loučka (10 hlasů pro, 1 se zdržel, 1 z původních účastníků nepřítomen).

Bulteno, n-ro 1/2019

S Květou Krajíčkovou o osmdesátých a devadesátých letech v pražském klubu

Květa Krajíčková (*1961), předsedkyně Klubu esperantistů v Praze v letech 1991–1994, s námi 7. března 2019 besedovala o tom, jak fungoval náš klub v osmdesátých a devadesátých letech minulého století. Na tuto úspěšnou akci navazuje rozhovor pro Bulteno.
Květa je nutriční terapeutka a bývalá komunální politička.

Jak ses vlastně dostala k esperantu?
To bylo v roce 1985 a mně bylo 24 let. Neměla jsem zrovna co dělat. Žádný kluk nebyl na dohled. Nestačilo mi jen tak chodit do práce, z práce a pak si lehnout. Na Ostrčilově náměstí v čekárně tramvaje jsem našla reklamu na kurz esperanta od pražského klubu. Bylo to na podzim, kurz zrovna začínal. Tak jsem si říkala, že bych to mohla zkusit.
Zavolala jsem na to číslo a ozvala se paní Helena Štruncová, tehdejší předsedkyně, která kurz vedla. Začala jsem se tedy učit u ní a současně u pana Špůra v korespondenčním kurzu. Pan Špůr byl význačný esperantista v Doksech, takový velice společenský člověk. V kurzu paní Štruncové jsem se dozvěděla, že taky je nějaký klub. Tak jsem se tam samozřejmě zapsala a začala jsem docházet.
A tak jsem koncem osmdesátých let přišla do docela fungujícího pražského klubu. Ten měl dvě části: jedna byla *junularo* a druhá dospělá část. Já jsem začínala s dospělými. *Junularo* se scházelo ve Vejvodově ulici, ta naše část chodila do klubu důchodců ve Vršovicích v Kodaňské. A kousek odtamtud byla i škola, kde probíhaly ty kurzy.
Blízko klubovny v Kodaňské byla hospůdka, kam jsme chodili upevňovat znalosti. Ta byla naše velmi oblíbená. Pak, když jsme po nějakou dobu neměli klubovnu, tak jsme chodili jenom do této hospůdky. Co se dalo dělat.

Na které osobnosti a události ze začátků si vzpomínáš?
Zajímavých osobností zde byla spousta. Vedle paní Štruncové třeba pan Jaroslav Mařík, profesor Rudolf Horský, Marta Křenková, Helena Maudrová, Ladislav Kynčl, Jiří Patera, Jindřich Ondráček a mnozí další.
Byly nejrůznější akce, přednášky, pořádali jsme i výlety, různé večírky, dokonce i ples. A v té době dokonce existovala i hudební skupina, která zpívala v esperantu. Jmenovala se *Barbuloj*. Byli to doopravdy vousáči. Takže nejenom slovenský TEAM, ale i my jsme měli svou skupinu.

Jejich frontmanem byl Petr Nýdl, což byl syn tehdejší sekretářky Českého esperantského svazu. Vypadal jako Michal Tučný. Také jsme měli mezi sebou členku Jarmilku Sequensovou, která měla čtyři dcery. Ty dcery nám rády chodily zpívat. To bylo osvěžující.
V roce 1987 jsme v nedalekých sadech Naděždy Krupské – dnes jsou to Heroldovy sady – zasadili památeční lípu a vztyčili pamětní kámen. Ta první lípa uschla, protože byla na kopci a veškerá voda stékala dolů, a nakonec ji ještě někdo zlomil. Zasadili jsme druhou, ale ta, chudák, taky uschla.
Potom v roce 1996 v souvislosti se Světovým kongresem paní Maudrová s panem Maříkem přišli na to, že by bylo šikovné ten kámen přestěhovat a dát ho před *kongresejo*. To se také stalo. Původně byl větší a špičatý, ale při tom stěhování se zlomil, jak už to tak bývá. A lípu vedle něj – vlastně naši třetí – jsme „adoptovali".

Jak došlo k tomu, že ses stala (velmi mladou) předsedkyní klubu?
Tehdejší předseda náhle rezignoval a nebyl nikdo jiný, kdo by se toho ujal. A díky tomu jsem se tedy nečekaně ve svých mladých letech – na tehdejší poměry jsem byla skutečně velmi mladá – stala místo něj předsedkyní. To bylo v únoru 1991.

Jak vzpomínáš na léta svého předsednictví?
Tehdy se klubovna přestěhovala do Vejvodovy ulice, kde bylo dříve *junularo*, a scházeli jsme se tam. Byly tam dvě místnosti a kuchyňka. Měli jsme tam cyklostyl, na kterém jsme vyráběli ručně Bulteno. Pořádaly se nejrůznější akce – přednášky, večírky…
Po roce 1990 nás bylo kolem stovky a k tomu připočítejme i různé rodinné příslušníky. Na schůzce bylo 20 účastníků zcela běžný počet. Chodilo tam poměrně hodně cizinců. Také se tu ukazovali emigranti, kteří se vraceli do republiky ať už na návštěvu nebo napořád. Takže tehdy v tom klubu bylo veselo.
V roce 1992 jsme slavili 90. výročí založení klubu. Oslavu jsme měli v restauraci Na Zvonařce. Tam jsme měli slavnostní program. Hrál nám tam tehdy nádherně na violoncello pan Sádlo – taky esperantista.
Na druhý den jsme šli na Videostop. S Českou televizí jsme tehdy dojednali natáčení jednoho dílu s esperantisty – jako soutěžících i publika. Soutěžící byli Dráža Kočvara, Mirek Severa z České Lípy a já. Bylo to moc hezké. Nechali nás říct o esperantu docela dost. I pan Patera tam promluvil. Také slovenští esperantisté tam byli aspoň v malém zastoupení – ještě jsme měli společný stát.
Pak byla také úžasná akce japonská svatba. Brali se tady dva Japonci; ženich byl esperantista, nevěsta aspoň předstírala, že rozumí. Proběhlo to na Staroměstské radnici. Svatba byla tlumočená. Tlumočníkem byl pan doktor Novobilský. Po obřadu jsme jeli do Všenor. Tam jsme měli hostinu a tanec. Hrálo se tam amatérské divadlo, kde zazářila Vlastička Pištíková.
Také si vzpomínám na oslavu devadesátin významného esperantisty – železničáře, pana Jaromíra Babičky ve vládním salonku na Hlavním nádraží, které se zúčastnili někteří naši členové.
Prostě ta doba tehdy byla plná různých zážitků a dojmů. Hodně jsme se navštěvovali i v rámci republiky tehdy.
Pak přišla doba privatizace a restitucí a dům ve Vejvodově ulici byl navrácen původním majitelům. Ještě před tím nám tam trochu zatápěli z úřadu Prahy 1. Snažili se nás samozřejmě vystěhovat, protože pořád platila stará smlouva a nájem byl nízký. Oni nám ten nájem nemohli zvednout, tak se nám snažili otrávit život. Až jsme jim nakonec na jedno zvýšení přistoupili, ale vzali jsme si tam do podnájmu jednu cestovku. No a kvůli tomu se nás nakonec zbavili – vzali to jako výpovědní důvod. Nám nezbylo než se vystěhovat. To bylo v roce 1994.
Tehdy část majetku včetně velké knihovny Jaroslava Šustra, která tam byla umístěna, přišla do České Třebové. Část majetku šla k rodině Štěpánků, kteří měli dům v Praze. My jsme si

s manželem vzali legendární Maříkův psací stroj. Bohužel byl ve sklepě a v roce 2002 ho postihly povodně – takže Maříkův psací stroj už není.

A co Světový kongres v roce 1996?
Kongres v Paláci kultury v roce 1996, na který se sjelo asi 3000 účastníků, to byl jeden z našich velkých úspěchů.
Bylo s tím hodně práce. Přípravy více jak rok dopředu. V roce 1995 jsme jeli do Finska do Tampere podívat se na *UK-o*, co všechno je třeba zařídit. Organizátoři nás vzali i do zázemí. Byli jsme tam nejenom my z Prahy, ale byl to zájezd esperantistů z celé republiky.
Pak jsme prožili čtrnáct dnů v pohybu – týden příprav a pak ten vlastní kongresový týden. Pomalu jsme nespali. Jedli jsme občas.
Jsem ráda, že se tehdy toho kongresu dožil pan Mařík – byl tam dokonce jako čestný host. Můj manžel tam měl výstavu obrazů. Doufám, že se Praze podaří kongres i napotřetí. Třeba se toho ještě dožijeme.

Tvůj manžel je také esperantista. Seznámili jste se díky tomuto společnému koníčku?
Přesně tak. To bylo v roce 1989 v Havířově na oslavách 20. výročí založení Českého esperantského svazu. Seznámili jsme se u stojacího popelníku ve foyer. Na té celé akci, kde bylo asi 140 lidí, jsme byli my dva jediní dva kuřáci – dneska už nekouříme ani jeden. U toho popelníku jsme se nutně museli začít spolu bavit. A potom taky Jarda Pokorný přivezl víno a povídá mně a Fejfině, ať seženeme nějaké kluky do party a že to večer vypijeme. Pozvala jsem Jirku, kterého jsem znala ze svazových zkoušek. Přišel ještě s kamarádem, a to byl ten můj spolukuřák. A pak jsme seděli u toho vína a povídali si a povídali … a bylo to.

Používáš esperanto ještě dnes? Nebo už jen v E-mentalu?
Většinou v E-mentalu. Od roku 2000, co jsem mimo hnutí, nemám moc možností mluvit. Když jsme před třemi lety jeli na SES na Slovensko, tak Vítek Mišurec mi povídá: „Poslouchej, to tvoje esperanto je takové archaické.“ Tak jsem se tam pokusila pár nových výrazů pochytit. Pamatuji si z nich hlavně „mojosa“ – to se k esperantu hodí.

Bulteno, n-ro 1/2019

Ĥanan Bordin en Prago

Petr Chrdle

Kiam mi ricevis (komplike tra esperantistoj el Pollando, Slovakio kaj Ĉeĥio) retmesaĝon de Ĥanan Bordin, lia nomo diris al mi nenion. Li sciigis al mi, ke li kun sia amiko, neesperantisto, vizitos Pragon por kelkaj tagoj kaj ke li havas du petojn: Laŭeble renkontiĝi kun lokaj esperantistoj, kaj ekscii ion pri la restado de fama rusa poetino Marina Cvetajeva en Ĉeĥio.
Ĉar en najbara komunumo Všenory estas memorĉambro pri Marina Cvetajeva kaj mi hazarde antaŭ proksimume unu jaro konatiĝis tie kun ĝia fondintino Galina Vaněčková, mi proponis al li ne nur komune viziti la memorĉambron, sed ankaŭ peri al li kontakton kun G. Vaněčková. Tio vere okazis kaj superis miajn imagojn.
Sed unue pri Ĥanan: Li estas juddevena, denaska rusparolanto el Latvio, profesie israela profesoro pri jida lingvistiko en la Hebrea Universitato en Jerusalemo, tamen nun por du jaroj li instruas la jidan kaj la hebrean lingvojn en la Universitato de Regensburgo en Germanio. Kun Esperanto li konatiĝis antaŭ kvin jaroj, lia unua interparolo en Esperanto okazis dum la UK-o en Rejkjaviko kaj nia renkontiĝo estis lia nur kvara interparolo kun eksterlandaj esperantistoj. Tamen, mi devas demeti la ĉapon antaŭ li, ĉar li parolis flue kaj mi kaptis eĉ ne unu eraron en

lia parolado. Plejparton de la restado en Prago li turismis kun sia amiko, jud-rusdevena doktoro pri onkologio kaj kirurgio, sed parte li avide ĉerpis el kelkaj renkontiĝoj kun esperantistoj: La unuan posttagmezon post ilia alveno mi gvidis lin tra historia kerno de Prago, la duan vesperon li partoprenis la kunvenon de E-mental (sen mi, ĉar mi havis neforŝoveblan taskon), plian tagon ni jam renkontiĝis en Všenory kaj la lastan Esperanto-renkontiĝon li trapasis kun kelkaj el ni unue en Vyšehrad, kaj sekve ni piediris ĝis la praga centro. La vojo en la centro estis iom zigzaga, ĉar li antaŭe bone lernis pri la pragaj vidindaĵoj, do ni iris laŭ liaj notoj. Inter alie interesis lin la Betleĥema kapelo, statuo de rabeno Löw, naskiĝdomo de Franz Kafka …
Sed la plej miriga travivaĵo, ne nur por Ĥanan, sed ankaŭ por mi, nin atendis en Všenory. Ni interkonsentis kun sinjorino Vaněčková, kiu loĝas en Prago, per kiu trajno ili komune venos al Všenory, kaj mi venis tien iom anticipe. Mi telefone eksciis, ke ili estas en la trajno, ke la trajno ne havas malfruiĝon, tamen ili ne aperis en la biblioteko, en kies parto troviĝas la memorĉambro.
Tial mi iris renkonti ilin. Kiam mi venis al la stacio, mi ekvidis ilin stari en la kontraŭa kajo, Galina Vaněčková vaste gestis svingante brakojn, dum Ĥanan senmove atente aŭskultis. Ĉar pro la distanco mi ne povis aŭdi ŝin, mi kvazaŭ spektis belan pantomimon. Nur post kiam mi renkontiĝis kun ili, mi ekkomprenis la kialon: Galina, parolante pri Maria Cvetajeva pozitive ekscitiĝis, en sian seninterrompan interesegan rakontadon enmetadis deklamadon de la poemoj de M. Cvetajeva en la rusa, ĉion parkere. Tion ŝi daŭrigis kaj survoje, kaj en la memorĉambro, sed ankaŭ post la forlaso de la ekspoziciejo dum nia promeno tra Všenory laŭ la spuroj de M. Cvetajeva: Ŝi montris al ni du domojn, en kiuj ŝi sinsekve loĝis (unu kun la memortabulo), la monumentan arbon, kie la poetino estadis kaj kiun ŝi plurfoje menciis en siaj poemoj, ktp.
Menciinda estas ankaŭ nia komunikado. Komence Ĥanan kun Galina parolis ruse kaj kun mi en Esperanto, mi kun Galina ĉeĥe. Sed post iom da tempo miaj forgesitaj scioj de la rusa iom revenis kaj ni parolis nur ruse, la ĉeĥa kaj Esperanto restis nur kiel neoftaj helpiloj. Kaj kiam ni estis akceptitaj ĉe la urbestrino, ni ĉiuj ŝanĝis al la angla.
Mi havas la tenton daŭrigi pri Marina Cvetajeva, kies vivo, same kiel la vivo de ŝiaj familianoj, estis tre interesaj, sed ofte tristaj, ĝis ŝi finfine mortis per propra mano. Sed por ke la artikoleto ne fariĝu tro longa, mi rekomendas al interesatoj trovi la informojn pri ŝi en la reto, aŭ eĉ pli bone, viziti la memorĉambron pri ŝi en Všenory.

Bulteno, n-ro 1/2019

Raporto pri la agado de nia klubo ekde februaro 2014

Tomáš Břicháček

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj! Karaj geamikoj!
Rapide pasis la temp' – tiel nomiĝas unu malfrua poemlibro de Eli Urbanová kaj la saman senton havas mi rigardante reen tra la lastaj kvin jaroj. Povas ŝajni kiel mallonga epizodo en la historio de nia klubo kaj eble ankaŭ en niaj privataj vivoj. Tamen ni koncedu, ke duono de jardeko jam estas sufiĉe signifa intervalo kaj ke ege indas, ke via komitato ĉiokaze haltu por bilanci kaj prirespondi antaŭ la geklubanoj.
Nia komitato estis elektita la 27-an de februaro 2014. Ekde tiam mi havis la honoron kunlabori kun **Jiří Mišurec** – diligenta kaj zorgema vicprezidanto kaj kasisto, **Vlasta Pištíková** – senlaca organizantino de sociaj aranĝoj kaj nia ĉefa interliga persono kun la klubo E-mental', **Vít Guglielmo Mišurec** kaj **Jan Šebetovský**. Komitatano **Jiří Patera**, kiel vi scias, bedaŭrinde forlasis nin por ĉiam en junio 2015. Komitatanino **Pavla Zemanová** finis en sia funkcio en februaro 2016, kiam ni devis formale reelekti la komitaton kaŭze de la nova Civila kodo.

Nun nome de tiu ĉi komitato mi volus peti vin, ke vi aŭskultu raporton pri la agado de la Esperantista klubo en Prago dum nia oficado.
En la raporto mi volus precipe koncentriĝi al kvin temoj, konkrete

- modernigo;
- agado ene de la klubo;
- agado direktita eksteren;
- juraj aferoj;
- Bulteno.

Poste mi rememoros ankaŭ kelkajn rimarkindajn okazintaĵojn ligitaj kun Esperanto en Prago, kiuj tamen aperis plejparte ekster nia klubo.

I. Agado de la klubo

Modernigo

La elekto antaŭ kvin jaroj ne rezultis nur en ordinaran ŝanĝon de la estraro. Estis generacia ŝanĝo. La stafeton manprenis junaj homoj, kiuj kunportis freŝan energion kaj novajn ideojn.
Bonŝance ili ne estis iuj revoluciuloj, kiuj volus detrui ĉion ekzistantan kaj konstrui ion radikale avangardan. – Kaj ni konfesu, ke inter esperantistoj en la mondo troviĝas ne malmulte da diversaj „specifaj“ konfuzuloj. – Ne, tio certe ne estis nia kazo. Oni ne volis enkonduki anarĥion aŭ malfermi pordojn al modernaj ideologioj. Oni nur deziris dediĉi sin plue al Esperanto kaj certigi kontinuecon kun ĉio bona, kion atingis niaj antaŭuloj. Tamen certajn reformojn ni volis realigi – reformojn, kiuj estis konektitaj kun teĥnologia progreso kaj aktualaj vivmanieroj. Alie dirite: **la ideo estis enkonduki la pragan klubon en la 21-an jarcenton, en la ciferecan epokon**.
Konkrete tio signifis ĉefe la sekvantan:
★ Oni komencis intensive uzi modernajn komunikajn teĥnologiojn. La klubo tuj ekhavis sian interretan paĝaron (http://bulteno.cs-retromusic.net/). La Bulteno ekaperadis ankaŭ en elektronika formo kaj ekestis elŝutebla sur la menciita paĝaro. Oni fondis kluban paĝon en Facebook, kiu parenteze estas nun sufiĉe aktiva kaj jam havas pli ol 330 sekvantojn. Ne lastloke oni ankaŭ komencis komuniki kun niaj membroj kaj favorantoj ĉefe per retpoŝto.
★ Alia parto de la reformoj koncernis la organizadon de kunvenoj. Antaŭe la kunvenoj okazadis ĉiujaŭde ekde la 14-a horo ĝis la 16-a horo. Tiu sistemo ne plu taŭgis. Unue, la laborantaj homoj kaj studentoj ne povis veni tiel frue. Due, hodiaŭ la homoj ne kutimas sidi tro ofte en klubejoj. Pro tio oni decidis, ke niaj kunvenoj okazos pli malfrue, ekde la 17-a horo, kaj nur ĉiun duan ĵaŭdon. Oni ankaŭ deklaris idealon, ke la kunvenoj havu laŭplanan antaŭpreparitan programon – sincere dirite ne ĉiam oni sukcesis plenumi tiun celon.
★ Oni ankaŭ ŝanĝis la bankokonton. La malnova bankokonto ĉe la ŝparkaso estis terure malavantaĝa; ĝi kostis al ni 1200 kronojn jare. Do oni fermis ĝin kaj prizorgis alian ĉe Fio banka sen iuj ŝarĝoj. La mono ŝparita dank' al tiu ŝanĝo sufiĉas por eldoni preskaŭ ĉiujn presitajn Bultenojn dum unu jaro.
★ Indas ankaŭ emfazi, ke ekestis tre favora konstelacio koncerne rilatojn kun la klubo E-mental'. Ĉar plimulto da komitatanoj estis samtempe ementalanoj kaj ni eĉ havis inter ni la estrinon („diktatorinon“) de E-mental', neniu konkuro plu eblis kaj la kunlaboro iĝis tre intensa. Mi dum tiuj kvin jaroj ĉiam sentis grandan sinergion kaj reciprokan kompletiĝon inter niaj du kluboj.

Agado ene de la klubo

Koncerne la agadon ene de nia klubo – tio signifas ĉio, kion ni faris por ni mem – oni povas diri, ke dum tiuj kvin jaroj la kluba vivo estis relative riĉa kaj variospeca:
★ Oni organizis kvar dekojn da prelegoj, diskutoj kaj seminarioj. Parto de ili estis dediĉitaj al Esperantaj temoj – al Zamenhof, famaj esperantistoj, literaturo, lingvaj demandoj, retrovitaj

malnovaj filmoj, novaj projektoj de ĈEA, klubaj kronikoj ktp. Alia parto tuŝis diversajn aferoj, kutime laŭ intereso aŭ hobio de prelegantoj – ekzemple novaj libroj, religio, genealogio, vojaĝado, svingo, interesaj personoj, migra krizo, Eŭropa Unio aŭ UNESCO-monumentoj.
Tiujn programerojn ofertis ĉefe niaj klubanoj, sed oni ankaŭ havis kiel prelegantoj interesajn gastojn. Mi povas rememori la diskuton kun la artisto Jan Nevan pri lia frato Mikuláš Nevan (novembro 2015), prelegon de Giorgio Silfer pri la historio de la Esperanta literaturo (majo 2017) aŭ la prelegon de Stanislava Vodičková pri kardinalo Josef Beran (majo 2018).
★ Ĉiujare oni organizis Kristnaskan kaj Zamenhofan festojn kunlabore kun E-mental'. Ili estis tre popularaj kaj plenabunde vizitataj.
★ Krom prelegoj kaj amuzaj aranĝoj ni havis multe da aliaj specifaj aktivecoj. Ni menciu la plej gravajn:
– En novembro 2014 volontuloj de nia klubo kaj de E-mental' renovigis la Esperantan monumenton apud la Kongresa centro. Oni farbis la surskribojn per malhelverda koloro. Ekde tiam la teksto estas denove bone legebla kaj aspektas elegante.
– En 2015 kaj 2016 dum printempaj monatoj okazis agado „Traduka printempo". Kelkaj niaj klubanoj kaj aliaj esperantistoj tradukis por la Bulteno diversajn tekstojn, por ke niaj legantoj havu somere interesan kaj amuzan legadon.
– En majo 2018 ni preparis katalogon de nia kluba libraro. Oni registris preskaŭ 130 librojn.
– Fine de la pasinta jaro ni kreis novan grandan Kronikon en elektronika formo, kiu kovras la periodon ekde la komenco de la jaro 2014. La kroniko estas strukturita laŭ jaroj. Unualoke ĉiam estas listo de okazintaĵoj kun datoj. Poste sekvas diversaj eltondaĵoj, ĉefe el la Bulteno, sed ankaŭ el aliaj fontoj. Mi daŭre kompletigas la tekston kaj dissendadas ĝin laŭbezone per retpoŝto.
★ Dum la jaro 2017 Petr Chrdle gvidis en nia klubejo kvar lingvajn seminariojn por progresantoj.
★ Agrablan refreŝiĝon alportis ĉiam vizitoj de eksterlandaj esperantistoj. Apud la jam menciita Giorgio Silfer (majo 2017) ni havis ekzemple multmembran grupon de gastoj de Suda Koreio gviditan de instruistino Ana Sonĝanta (junio 2015) aŭ rusajn esperantistojn el Kazaĥio (septembro 2016). Kaj venis multaj aliaj – unuopuloj, geedzoj, grupoj.

Agado direktita eksteren
Indas paroli ankaŭ pri agoj, kiuj ne limiĝis al nia kolektivo, sed estis direktitaj eksteren.
★ En septembro 2014 okazis en la Filozofia fakultato de Karola Universitato en Prago la Internacia simpozio *Otokar Březina 2014*. Prelegis tie Viktor Dvořák, kiu kun Miroslav Malovec prezentis la grandformatan poezian libron de Otokar Březina *Mistero de Doloro – Tajemství bolesti* en la ĉeĥa kaj en Esperanto. La poemojn de O. Březina esperantigis Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr. La libron preparis Jaroslava Míčová, Viktor Dvořák kaj Miroslav Malovec.
★ En decembro 2014 Ĉeĥa Radio Plus dediĉis sian regulan programeron *Radiofórum* al Esperanto. La subtitolo estis: *Má esperanto smysl, když je všude angličtina?* La ĉefa gasto en la studio estis mi. Per telefono partoprenis ankaŭ Marek Blahuš kaj David Gruber.
★ Post unu jaro en decembro 2015 ni denove aperis en Ĉeĥa Radio, tiun ĉi fojon en Radiožurnál en raportaĵo *Esperanto znají lidé po celém světě*. En ĝi mallonge parolis Josef Trojan kaj mi. La reporterino antaŭe vizitis nin en nia klubejo kaj intervjuis nin.
★ Komence de la jaro 2016 Petr Chrdle eldonis novan reviziitan version de la fama lernolibro *Esperantem za tři měsíce*, kiun li antaŭ multaj jaroj skribis kun sia edzino Stanislava Chrdlová. Tiu nova eldono aperis kun la titolo *Esperanto od A do Z*. Multaj el ni ĉeestis la solenan prezenton en februaro en la sidejo de la Unuiĝo de Interpretistoj kaj Tradukistoj. Mi havis la honoron iĝi la patrono de la libro.

★ En julio 2016 Viktor Dvořák aktive partoprenis internacian konferencon *Perspektivoj de lingva komunikado en la Eŭropa Unio* en la Universitato de Konstanteno la Filozofo en Nitra. Lia kontribuaĵo en la sekcio *Lingvaj problemoj de civitana partopreno kaj lingvaj problemoj ĉe ekonomia integriĝo* koncernis la temon *Ĉu Esperanto apartenas al la lingvoj nomataj „Dua lingvo" laŭ la dokumento COM(2008) 566 final?*
★ En marto 2017 Vlasta Pištíková, Jan Šebetovský kaj Vít G. Mišurec transdonis al Zdeněk Svěrák sian Esperantan tradukon de la teatra ludo *Dobytí severního pólu*. Pri tiu ĉi ago informis Ĉeĥa Radio Plus.
★ En somero 2017 s-ino Margit Turková aperigis libron *Scházíme se v této knize* (Ni renkontiĝas en jena libro). Tiu ĉi kolekto de tekstoj estas skribita ĉeĥe, sed estas dediĉita al memoro de Esperantaj personaĵoj Eva Seemanová kaj Čestmír Vidman.
★ En septembro 2017 Petr Chrdle prelegis en la sinagogo de Maisel pri Zamenhof. En la ĵurnalo Židovské listy aperis ankaŭ lia artikolo pri tiu temo.
★ En decembro 2017 aperis alia artikolo de Petr Chrdle pri Zamenhof, ĉi- foje dekpaĝa, en la revuo *Tvůrčí život* (N-ro 6/2017). La artikolo nomiĝas *Esperanto, hilelismus a homaranismus – Tři projekty L. L. Zamenhofa*.
★ Petr Chrdle en 2017 ankaŭ dufoje aperis en la Ĉeĥa Radio. En julio li parolis en iu mallonga raportaĵo. En decembro li estis intervjuita en la stacio Wave.
★ Parolante pri s-ano Chrdle, indas ankaŭ apreze akcenti, ke li daŭre gvidas kurson de Esperanto por triaaĝuloj.
★ Membroj de nia klubo ankaŭ diligente tradukadis: Margit Turková esperantigis la librojn Spirita revolucio en la koro de Eŭropo de Přemysl Pitter kaj F. V. Lorenz de Vlastimil Novobilský kaj Jindřich Košťálek ĉeĥigis la esperantan originalon L. L. Zamenhof – Vivo, verko, idealoj de Aleksander Korĵenkov. La unuaj du jam aperis, la tria estas preparita por la preso; ĉiuj en la eldonejo KAVA-PECH.

Juraj aferoj
Kelkokaze necesis solvi ankaŭ jurajn aferojn:
★ La plej grava kaj plej urĝa estis aktualigo de la statuto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiu ankaŭ estas fundamenta akto de nia klubo, kiel filia asocio de ĈEA. Tiun laboron bezonigis la nova Civila kodo. Kaj kiam oni jam devis malfermi la tekston, indis fari kelkajn plibonigojn ĉefe por plifaciligi la funkciadon de la Asocio kaj ĝiaj kluboj kaj sekcioj.
Novan statuton preparis dum la jaro 2015 la tiama prezidanto de ĈEA Vladimír Dvořák kaj mi prikonsiderinte konsilojn kaj rimarkojn de kelkaj helpantoj. La statuto estis adoptita en la kongreso de ĈEA en Ústí nad Orlicí en novembro 2015.
★ Danke al la nova statuto nia klubo povis fine atingi registradon de siaj aktualaj indikoj en la registron de asocioj. Pro tio ni en februaro 2016 organizis ĝeneralan kunvenon, kie ni reelektis la komitaton, ŝanĝis la nomon kaj konfirmis la ŝanĝon de ĝia adreso, kaj poste sendis ĉiujn bezonatajn dokumentojn al la tribunalo. En aprilo 2016 indikoj pri nia klubo estis aktualigitaj. Nur ekde tiam ni povis libere interagi kun aliaj personoj kaj inter alie efektivigi la menciitan ŝangon de la bankokonto.
★ Alia grava afero estis registrado de nia revuo Bulteno ĉe la ministrejo de kulturo en aŭtuno 2017. Tiu ago signifis oficialigon de nia revuo, kiu nun estas regula perioda eldonaĵo.
★ Unufoje ni havis ankaŭ malagrablan problemon kun nia kunvenejo. En aprilo 2014 la urbokvartalo Prago 1 portempe malpermesis la uzadon de siaj kunvenejoj – laŭdire pro tio, ke en unu el ili foje renkontiĝis iuj „ekstremistoj". Mi do turnis min perletere al la kvartalestro por peti ŝanĝon de tiu malpermeso rilate al nia klubo. La kvartalestro plenumis la peton kaj ekde la komenco de junio la klubo denove povis kunveni en la sama ejo.

Bulteno

Grava komponanto de nia kluba agado estas longdaŭre nia revuo Bulteno, kiu aperas trifoje en jaro. Ekde la tempoj de la redaktoro Jiří Patera ĝi estas ne nur kluba informilo, sed ankaŭ literatura kaj kultura forumo.
Mi transprenis la redakcion komence de la jaro 2014. Kiel nova redaktoro mi ne volis fari iujn dramajn ŝanĝojn. Mi volis konservi la bazan formon kaj naturon de la revuo. Tamen kiel junulo alkutimiĝinta labori kun moderna komputoteĥniko kaj vivanta en juna kolektivo mi strebis doni al la revuo novajn impulsojn.
La plej rimarkinda novaĵo estis, ke oni komencis eldoni la Bultenon ne nur en presita formo, sed ankaŭ elektronike. Tial oni povas facile dissendi la novajn numerojn retpoŝte kaj ankaŭ loki ilin sur nia interreta paĝaro, por ke ĉiu povu elŝuti ilin. La Bulteno do iĝis atingebla en la tuta mondo.
Ekde la ŝanĝo de la redaktoro oni eldonis 15 numerojn (14 eli ili dum la funkcia periodo de nia komitato). En tiuj numeroj aperis pli ol 50 artikoloj, preskaŭ 40 beletraj tekstoj, pli ol 30 poemoj, 4 intervjuoj (kun Josef Trojan, Jan Nevan, Vlasta Pištíková kaj Eva Pechová) kaj kelkaj ŝercoj, anekdotoj kaj kantoj.
Mi volus danki al ĉiuj, kiuj kontribuis iel ajn – kiel aŭtoroj de tekstoj, tradukantoj, korektistoj, propagandantoj ktp. Mi kredas, ke iliamerite oni sukcesis plenumi la antaŭdiron kaj deziron de Jiří Patera, kiu skribis en la unua numero eldonita post la ŝanĝo (1/2014): „*Mi estas konvinkita, ke la Bulteno de Esperantista klubo en Prago havas antaŭ si bonan estontecon kaj ĝi apartenos ne nur al bonaj kaj kvalitaj klubaj eldonaĵoj, sed estos laborejo kaj lernejo por pluaj novaj Esperanto-publicistoj, verkistoj kaj tradukistoj.*“

II. Rimarkindaj okazintaĵoj

Apud nia propra agado mi volus paroli ankaŭ pri kelkaj rimarkindaj okazintaĵoj ekster nia volo, kiuj tamen estis signifaj por la Esperanta komunumo en Prago:
★ En aŭgusto 2014 la parko en la strato Na Třebešíně en Prago 10 – Strašnice ekportis la nomon de Jiří Karen (1920 – 2000), ĉeĥa poeto kaj esperantisto, kiu verkis ankaŭ en Esperanto. Karen kaj lia edzino Zuzana Podmelová estis multjaraj loĝantoj de la najbara kvartalo Malešice.
★ En junio 2015 mortis Jiří Patera, multjara estrarano kaj *spiritus agens* de nia klubo, redaktoro de la Bulteno, honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, konata internacie pro siaj tradukoj kaj artikoloj.
★ En septembro 2016 okazis en teatro U Valšů jubilea koncerto de Miroslav Smyčka, opera kantisto kaj esperantisto, kiu tiam ĝisvivis 90 jarojn. Bedaŭrinde majstro Smyčka post proksimume duonjaro forpasis.
★ En novembro 2016 okazis en la bierfarejo en Malešice memoriga programo pri Jiří Karen *Tam, kde skřivan zpívá na betonu* enkadre de ĉiujaraj Tagoj de poezio. En decembro 2016 okazis alia simila programo *Jiří Karen a Zuzana Podmelová: „Čtverec nad přeponou lásky“* en Dům čtení en la kvartalo Strašnice. Ambaŭ eventojn aktive partoprenis s-ino Margit Turková.
★ En aŭtuno 2017 eldonejo KAVA-PECH de Petr Chrdle atingis 25 jarojn de sia ekzistado. En novembro okazis festo en la sidejo de la Unuiĝo de Interpretistoj kaj Tradukistoj, kiun partoprenis multaj niaj geklubanoj. Oni solene prezentis tie la *Grandan Esperantan-ĉeĥan vortaron* de Miroslav Malovec. Mi denove havis la honoron esti patrono de tiu ĉi eminenta libro. En mia parolo mi deklaris nome de nia klubo, ke ni ĉiuj tre estimas la unikan kontribuon de KAVA-PECH al Esperanta literaturo kaj al la kultura vivo de Esperantistoj en Ĉeĥio kaj en la mondo.
★ En aprilo 2018 okazis premiero de esperantlingva opero *Sternenhoch* en la Nacia teatro. La opero baziĝas je la prozaĵo *Suferado de princo Sternenhoch* de Ladislav Klíma. La aŭtoro estas komponisto Ivan Acher. La tekston esperantigis Miroslav Malovec. Ŝajnas, ke la opero havas sukceson kaj ĝian kvaliton koncedas eĉ la kritikantoj de la dekadenca romano de Klíma.

★ En majo 2018 E-mental' rememorigis kaj vigle festis sian 20-an datrevenon. De komenca malgranda grupeto E-mental' fariĝis klubo kun preskaŭ 50 E-parolantaj membroj kaj kun vico da favorantoj.
Ni dediĉis al la jubileo grandan spacon en la Bulteno. Ni elkore gratulis kaj deziris al ementalanoj en venontaj jaroj multe da feliĉo, amikeco kaj ĝuado de la vivo kun Esperanto.
Pavla Dvořáková oportune konstatis: „*E-mental' estas sendube specifa fenomeno kadre de la Esperanta komunumo kaj en Ĉeĥio kaj eksterlande. Ĝia koncepto povas esti certe en multo inspira ankaŭ por vivigo de la agado de la ‚klasikaj' kluboj!*"
★ En majo 2018 studentino Eva Pechová de la praga UMPRUM gajnis la 3-an premion en la Esperanta kategorio de la konkurso *Poésie en liberté* en Parizo kun sia poemo *Senti la momenton*. Fraŭlino Pechová volonte donis al ni intervjuon kaj sendis ŝian poemon.
★ En la jaroj 2017 kaj 2018 Max Kašparů celebris kelkajn esperantlingvajn mesojn en la preĝejo de sankta Pankraco en Prago 4. Unu el la mesoj (en februaro 2018) estis dediĉita al Miroslav Smyčka kaj dum ĝi kantis profesiaj kantistoj, Jolana Haan Smyčková, la solistino de la teatro Semafor, kaj Richard Haan, la solisto de la Nacia Teatro.

Konkludo

Resuminte la agadon kaj la okazintaĵojn mia ĉefa konkludo estas: **En tiuj kvin jaroj Esperanto en Prago vivis kaj videblis.**
Alia demando estas nature, ĉu ĝi povus vivi pli forte kaj esti pli videbla, ĉu ni estis vere *diligenta kolegaro*, ĉu la prezidanto kaj la komitato laboris sufiĉe. Koncerne tion, ĉiu el ni certe havas propran impreson kaj propran alrigardon.
Mi ne volus fari tian prijuĝon rilate al la komitato, ĉar kiel unu jurista teoremo instruas al ni: *Nemo iudex in causa sua* – neniu povas esti juĝisto en sia propra kazo. Kaj unu biblia proverbo diras: „*Alia vin laŭdu, sed ne via buŝo; Fremdulo, sed ne viaj lipoj.*"
Ni submetiĝos do plene al via juĝo kaj via kritiko, ĉe kio ni atentas alian proverbon de Salomono, kiu tekstas: „*Kiu amas instruon, tiu amas scion; Sed kiu malamas atentigon, tiu estas malsaĝulo.*"
Ĉiuokaze mi volus danki al niaj komitatanoj pro la laboro, kiun ili faris, kaj al vi ĉiuj, ke vi estis kun ni kaj partoprenis la komunan strebon. Mi antaŭĝojas la daŭrigon de nia renkontiĝado kaj agado kaj mi esperas, ke venontaj jaroj alportos almenaŭ tiom da sukcesoj, kiel la periodo, pri kiu ni hodiaŭ parolis.

Bulteno, n-ro 1/2019

Mi renkontis esperantistojn en Prago!

Hiroko Katayama

La unuan semajnon de aprilo mi vizitis Pragon, ĉefurbon de Ĉeĥio, kun mia edzo, kiu partoprenis en la simpozio okazinta tie.
Mi deziris renkonti esperantistojn en Prago. Antaŭ ekveturo rete studinte mi eksciis, ke en Ĉeĥio troviĝas pli ol 30 lokaj kluboj, kiuj estas organizaĵoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la membro de UEA.
La Esperanto-Klubo de Prago estis fondita en la jaro 1902. Du Universalaj Kongresoj de UEA okazis en Prago. En la jaro 1921 estis la fonda kongreso de SAT dum la 13-a UK. En la jaro 1996 je la 81-a UK prezentita estis la Manifesto de Prago, kiu konsistas el sep principoj de movado. Prago delonge estas la centro de serioza agado por Esperanto.
Kun helpo de s-ro Yamaguti mi sendis retleteron al la delegito de UEA en Ĉeĥio, s-ro Petr Chrdle (karesnome Petro), kiu jam dekfoje vizitis Japanion, en Nagojo vizitis la ĉambron de Nagoja Esperanto-Centro (NEC), kaj tranoktis ĉe ges-roj Itoo.

Li respondis al mi, ke la lokaj kunvenoj okazos dum nia restado, kaj ni estos bonvenigotaj. Li sendis informon al aliaj ĉefuloj en Prago.
La 3-an de aprilo matene s-ro Josef Trojan, eks-delegito de Prago, kaj mi kune promenis en la malnova kvartalo, en kiu restas belaj mezepokaj konstruaĵoj.
Vespere mi vizitis la kunvenon de la klubo E-mental', gvidite de samideanino Vlasta Pištíková, ĉefo de la klubo kaj unu el ĝiaj fondintoj en la jaro 1998.
E-mental' celas al uzado de Esperanto en ĝuoriĉeco, kaj akceptas tiujn (precipe junulojn), kiuj hezitas aliĝi al tradicia klubo.
Regulaj kunvenoj okazas ĉiun duan merkredon vespere ĉe la hejmo de membro, al kiu venas anoj kun iu konkreta temo kaj bongustaĵo.
Tiuvespere ili preparis kvizojn pri Honŝuo (la plej granda insulo de Japanio), pro la gasto el Japanio. Kvizoj estis tiel malfacilaj, ke mi povis nur malpli ol triono ĝuste respondi.
Ankaŭ brazila juna esperantisto partoprenis la kunvenon.
La 4-an posttagmeze Petro kaj mi promenis en la urbo kaj iris al la kunvenejo de la Esperanto-Klubo de Prago. La ĉambro troviĝas centre de la urbo, ĉe la strato proksima al Venceslaa Placo, kie okazis eventoj signifaj en la ĉeĥa historio, nome Praga Printempo kaj Velura Revolucio.
La kunveno okazas ĉiun duan ĵaŭdon vespere, kutime de la 17-a ĝis la 19-a horo. Por vidi min kolektiĝis ekde la 16-a multaj membroj inkluzive de kelkaj el E-mental'.
Petita, ke mi parolu ion pri Japanio, mi prezentis la urbon Nagoja, la kastelon, la palacon, kaj la Generalon Iejasu Tokugaŭa, kiu ordonis konstrui ilin.
Mi donacis al la klubo librojn, kiujn mi kunportis, t.e. la bildolibro „Vostoj ridas!" verkita de s-ino Ĵunko Itoo, kaj „Gon-Vulpo kaj aliaj rakontoj" de Nankiĉi Niimi (la memoraĵo por partoprenantoj al la Japana Kongreso en Inujama 2009).
Mi ankaŭ kunportis japanajn organojn, La Informilo de NEC, La Revuo Orienta de JEI, ktp., kiujn ĉeestantoj kun intereso tralegis.
S-ro Tomáš Břicháček, la prezidanto de la klubo, donis al mi la plej novan version de ilia revuo „Bulteno" eldonita je tiu tago.
Li skribis por ĝi raporton pri la agado de la klubo ekde la jaro 2014 post sia prezidantiĝo. Li kaj la komitatanoj laboris por modernigo de la klubo: enkonduko de la klubo en la 21-an jarcenton, en la ciferecan epokon.
Interrete legeblas la teksto de la Bulteno, kaj troveblas ankaŭ en YouTube la prelego de la prezidanto farita dum la ĝenerala kunveno de la klubo en februaro 2019.
Dum mallonga vizito mi havis tre signifoplenan tempon.
Mi eksciis, ke ankaŭ en Prago oni ĉagreniĝas pro maljuniĝo kaj malmultiĝo de membroj, sed malgraŭ tio junuloj ĉiam penadas naski agadon novstilan kaj allogan – bazite sur la trezoro de pasinteco, kaj harmonie – ĝuste tiel, kiel agas la urbo Prago.

Bulteno, n-ro 3/2019

Vespero kun Věra Ludíková

Margit Turková

Por la interesiĝantoj pri nuntempa poezio la nomo **Věra Ludíková** estas bone konata. Kelkfoje ni jam sciigis la legantaron, ke ŝi estas favoranto de Esperanto ĝistiomgrade, ke ŝi vicigis la Lingvon jam antaŭ 20 jaroj en sian literaturan projekton „Sendu ĝin pluen". Sendadi pluen, disvastigi en la tutan mondon sian mesaĝon pri humanisma konduto, pri interkomprenado, pri protekto de la naturo – ŝi komencis en la formo, kiu estas por ŝi la plej kara – do per poezio.

Oni ja povas supozi, ke multaj poetoj esprimas siajn ideojn kaj sentojn per beletra formo. Ŝi ĉiujare publikigas ĉarman volumeton, en kiu la poemoj estas interpretitaj en diversaj nacilingvaj tradukoj. Ludíková engaĝigas por la projekto amikojn, siajn konatojn, kiuj esprimiĝas en siaj denaskaj lingvoj. Oni povas diri, ke siasence ŝi kunigas naciojn en siaj poeziaĵoj. Ĉi-jara libreto havas la titolon **Je jaro. Estas printempo, 1+55.** La „enigmo" estu klarigita: en la projekto estas uzitaj 55 diversaj naciaj lingvoj (neniu dufoje) – nur „1" apudas ilin ĉiufoje – Esperanto! En la verkoj estas uzitaj ĉu poeziaĵoj de ĉeĥaj esperantistoj (ekz. de Čestmír Vidman), ĉu ŝiaj – en tradukoj de J.Mráz, M.Malovec, F.Patera, J.Werner. Nur en la ĉeĥa kaj Esperanto troviĝas la titolo kaj la mesaĝo kaj la postparolo (en la traduko de M.Malovec). **La 15-an de aprilo 2019** okazis ĉiujara publika legado de la verketo – en persona prezentado de (la menciitaj) diversaj nacianoj (la Esperantan prezentis mi, Margit Turková). La solenaĵo okazadas en la spacoj de la Nacia etnografia muzeo, Prago, nune en la historia biblioteko – en kiu estis fondita ĉeĥa esperantista komunumo!
El la supre menciitaj faktoj klariĝas, ke la Poetino alproprigis al si la plej taŭgan manieron por sendi siajn mesaĝojn de kristana humanismo – la internacian lingvon Esperanto…

Bulteno, n-ro 3/2019

Rememorigo de František Kožík

Margit Turková

Ĉu tio estas hazardo, ĉu la „providenca destino", ke en la praga kvartalo Malešice vivis (preskaŭ en unu strato) kvar por ni konataj verkistoj – esperantistoj: Jiří Karen, František Kožík, Josef Rumler, Čestmír Vidman…
Kaj maljunaj kaj junaj „patriotoj" de la regiono kunigis siajn emojn por prezentadi la „famajn kunloĝantojn" al la nuna loĝantaro de la kvartalo. Ke ties literaturaj trezoroj ne perdiĝu en profundaĵo de arkivoj, sed vivigu la kulturan etoson. La afero de jubileoj komenciĝis per la poeto Jiří Karen, la persono, kiu estis „la plej videbla". Plej ofte oni vidis lin en la loka parko, ĉu sidanta, ĉu paŝanta – sed ĉiam kun ia libro en la manoj. Ne povis tion ne rimarki unu lerta 6-jarulo: *„Sinjoro, kion vi ĉiam faras, promenante?" „Mi legas librojn". „Aĥ ja, vi bedaŭrulo"…* Nun la parko havas oficialan nomon: „Parko de Jiří Karen". Okaze de tiu afero realiĝis publika prezento de verkoj de Jiří Karen en kulturaj institucioj de la Prago 10- kvartalo. Lian riĉan agadon en la Esperanta kampo prezentis mi, kaj Věra Ludíková – redaktinto de J.K.-verkaro.
Pasis du jaroj, kaj **la 16-an de majo 2019** okazis alia jubileo-festo: la 110-a naskiĝdatreveno de „la plej granda" … ja ĝuste je la 16-a de majo 1909 naskiĝis **František Kožík**. Lin oni ne bezonas prezenti – tuta ĉeĥa nacio konas lin – inter ili ĉeĥaj esperantistoj. La kultur-funkciuloj plenumis sian ŝatatan devon kaj kunigis la favorantojn de la Verkisto en la Malešice-biblioteko. Min ili favoris, ĉar ĉe la supre menciita Karen-evento mi atentigis ilin pri František Kožík – esperantisto. Do vere – la programo enhavis parton pri tiu ĉi lia agado, kiun plenigis plejparte mi. Dank´al M.Malovec, kiu plenamplekse priskribis la agadon de esperantistoj en la Radio-elsendado en Brno, mi povis informi la partoprenantojn pri la etapo, kiam en la elsendejoj Brno, Bratislava, Prago, Ostrava estis prezentita la ĉeha kulturo per la fama **Verda ĉaro**, kiun „tiris" ankaŭ František Kožík. Por ni ĉiuj fariĝis la evento neforgesebla, ĉar inter ni estis la filino de F.K. – Alena Kožíková… Pri la vivo kaj verko de sia patro ŝi scias ĉion – krom la tradukaĵoj, per kiuj ja povas „fieri" ni, esperantistoj. Ĝoja estis konscio, ke danke al Vondroušek, Karen, Malovec enmondiĝis la verkoj **Největší z pierotů** *(La plej granda el pierotoj),* **Světlo v tmách** *(Lumo en tenebroj – pri Komenio*), k.a.

Kompreneble, ke mi ne preterpasis la novaĵojn – la operon „Sternenhoch“ kaj la Esperantan vikipedion. Sinjorino Alena K. tuj notis tion en sian kajereton kun la vortoj: „Mi devas tion pli profunde ekkoni“. Tion ni, esperantistoj, certe kun ĝojo akceptas…

Bulteno, n-ro 3/2019

Lanĉo de libro pri Zamenhof

Tomáš Břicháček

La 31-an de majo okazis en la Pola instituto publika lanĉo de la libro *Ludvik Lazar Zamenhof – život dílo ideály* de Alexander Korženkov. Libron ĉeĥigis Jindřich Košťálek kaj eldonis ĝin KAVA-PECH. Patrono de la libro volonte iĝis mi.

Bulteno, n-ro 3/2019

Forpasis Helena Štruncová kaj Marie Drašnarová

Kun doloro ni anoncas, ke fine de septembro forpasis en la aĝo de 94 jaroj iama prezidantino de nia klubo s-anino **Helena Štruncová** (al kiu estis dediĉita artikolo en Bulteno n-ro 1/2015) kaj ke iam en junio estis murdita praga esperantistino **Marie Drašnarová** en la aĝo de 73 jaroj (vidu la paĝon 6).

Bulteno, n-ro 3/2019

Reklamo por Esperanto

Vlasta Pištíková

La 9-an de junio 2019 membroj de la klubo E-mental’ kreis en Prago reklamon por Esperanto. Ili pentris ĝin sur barilon ĉirkaŭ konstruata domo en vigla strato de Prago. Posedantoj de la barilo – la konstrufirmao – mem proponis al homoj, ke ili laŭplaĉe kreu.
Unue ili parton de la barilo nigre kolorigis per farbo, kiun ili hazarde trovis en proksimeco. Per penikoj kaj eĉ per propraj manoj ili dum kelke da minutoj preparis la spacon por plua kreado.
Poste devis esti solvita problemeto, kion desegni sur la barilon. Estis klare, kiujn ĉefajn vortojn skribi, sed kion plu? Feliĉe en la grupo estis juna novulino, kiu studas reklamon kaj ŝi donis ĉefan aspekton. Poste jam ĉiuj diligente desegnis.
Sur alia parto de la barilo ili rimarkis jam estantan verdan stelon, kiu instigis ilin por plua kreado kaj ili alskribis grandan vorton ESPERANTO.
Bedaŭrinde la pentraĵo restis en la barilo nur kelkajn tagojn, ĝis kiam niaj sprajistaj konkurantoj surkovris ĝin per siaj skribaĉaĵoj.

Bulteno, n-ro 3/2019

O. Březina – překlady básní aneb Domluvíme se v EU?

Viktor Dvořák

Od 11. do 24. června 2019 se uskutečnila výstava v předsálí Jednacího sálu Senátu Parlamentu ČR v Praze pod záštitou senátora RNDr. Miloše Vystrčila, který přítomné přivítal. Úvodní slovo – Jiří Höfer, recitace básně Moje matka – Magdalena Krejčová a hudební doprovod na housle – Petr Hudeček. Viktor Dvořák dále komentoval obsah na panelech podle autorů překladů Březinovy básně Moje matka / My Mother / Mia Patrino, ve kterých je obsah, předmluva i ediční poznámka v jazyku českém, anglickém a esperantském. Výstava se konala při příležitosti 150. výročí narození a 90. výročí úmrtí Otokara Březiny. Měla za cíl ukázat na obtížnost šíření literatury malých národů ve světě a s tím souvisejícími problémy dorozumívání. Předkládá se k úvaze možnost využití esperanta, které je univerzálním jazykem, který odpovídá pojetí Jana A. Komenského v díle VIA LUCIS, kapitola XIX. Mnohojazyčnost je stále překážkou a s lítostí lze konstatovat, že naplněním „Barcelonského“ cíle je jen omezeně vyřešen problém vzájemné komunikace v EU. K velké škodě je, že tvůrci dokumentu KOM 566, Brusel (18. 9. 2008) potřebu univerzálního jazyka zcela pomíjí. Výstavu připravil Ing. Viktor Dvořák, CSc., ze svého dlouholetého bádání a pátrání po překladech Březinova básnického díla, jeho překladatelích a dědicích autorských práv. Vyhledání překladatelů a získání souhlasu se zveřejněním poskytnutých překladů a materiálů byla dlouholetá, časově velmi náročná práce. Výstava byla výsledkem spolupráce s Klubem přátel esperanta ve Svitavách, Spol. O. Březiny v Jaroměřicích nad Rok., Ústavem pro českou literaturu AV ČR v Praze, Moravskou zemskou knihovnou v Brně a Památníkem národního písemnictví v Praze. Byl projeven zájem o opakování výstavy v rodišti Otokara Březiny v Počátkách, Jaroměřicích nad Rokytnou a Galerii Františka Bílka v Praze, prostřednictvím Spol. F. Bílka.

Bulteno, n-ro 3/2019

Od roku 2022 je výstava trvale umístěna v rekonstruovaném rodném domku Otokara Březiny v Počátkách. Je málo známou skutečností, že některé básně byly zhudebněny a proto výstava byla doplněna dvěma panely s ukázkami notových záznamů děl deponovaných v Hudebním oddělení Národní knihovny. Poznamenává se, že součásti výstavy je i certifikát Agentury Dobrý den Pelhřimov o vytvoření českého rekodu “Nejvíc překladů básně českého autora elektronické knihy Otokar Březina: Moje matka – My Mother – Mia Patrino“

Dovětek Viktora Dvořáka, říjen 2022

Esperantista geedziĝo

La 20-an de julio 2019 geedziĝis gesamideanoj Vít G. Mišurec kaj Veronika Venislovas. La sekvantan tagon post la oficiala geedziĝo okazis Ementala geedziĝfesto.
Ni elkore gratulas kaj deziras multe da feliĉo kaj sano.

Bulteno, n-ro 3/2019

Helpu helpi 2019

Vlasta Pištíková

La 24-an de julio 2019 okazis jam la sesa aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental’ aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago. Ĉi-foje helpis ankaŭ partoprenantoj de aranĝo ĜUPR, kiu ĝuste okazas en Prago.
Estis kolektita mono por 40 brikoj!

La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj…
…kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas amasoj da turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.
Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke…
…kaj apartan dankon al eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj ne hezitis sendi monon!!!

Bulteno, n-ro 3/2019

La praga klubo rememorigas sian grandan estron

La 8-an de septembro 2019 pasis 50 jaroj ekde la morto de Jaroslav Šustr, elstara esperantisto, multjara prezidanto de nia klubo (1931–1958) kaj ĝia honora prezidanto, honora membro de ĈEA, delegito kaj ĉefdelegito de UEA, „karmemora homo“. La klubo rememorigis lin per solena prelego, kiu okazis la 3-an de oktobro 2019 kaj eldonas tiun ĉi numeron de Bulteno, kiu estas komplete dediĉita al li.

Bulteno, n-ro 2/2019

Tri sinsekvaj aranĝoj kun Martin Stuppnig en Ĉeĥio

Petr Chrdle

Senpere antaŭ sia 94-jariĝo, en oktobro 2019, faris la fama aŭstra esperantisto Martin Stuppnig vojaĝon al Ĉeĥio, kie li trifoje prezentis sian tre sukcesan libron, eĉ en tri lingvaj variaĵoj: La germana orginalo, la Esperanto-versio kaj la freŝe eldonita ĉeĥa traduko.
Unue, li partoprenis la Konferencon de Ĉeĥaj fervojistoj-esperantistoj en Kořenov de la 11-a ĝis la 13-a de oktobro. Due, la 15-an de oktobro okazis la unua publika lanĉo de la libro en la ĉeĥa en la aŭlo de la Humanisma gimnazio en Prago, kie li prezentis ĉiujn tri versiojn de la libro, post kiam sekvis diskuto de la aŭtoro kun la ĉeestantoj kaj aŭtografado.
Fine, la dua oficiala publika lanĉo okazis en la Mahen-biblioteko en Brno la 18-an de oktobro. Ĝi okazis lige kun la kongreso de ĈEA, kiun Martin ankaŭ partoprenis. La programo estis simila kiel en Prago.
Jen la historio de tiu mirinda libro, per kiu Martin Stuppnig sukcese debutis kiel verkisto en la aĝo de preskaŭ 90 jaroj:
Ĝi aperis unue en la germana kun la titolo *Militimpressionen*, sekve en Esperanto kun la titolo *Home en senhomeco* en la traduko de Jozefo Horvath. Ĉar multaj esperantistoj deziris aĉeti ankaŭ la germanan originalon, kiu dume elĉerpiĝis, mi eldonis en malgranda kvanto la duan germanan eldonon kun la pli trafa titolo *Menschlich in der Unmenschlichkeit* kompletigitan pri la tekstoj aldonitaj en Esperanto-eldonon: Aldonaĵoj pri la batalo ĉe Monte Cassino, kiun Martin devis partopreni kaj en la libro priskribas siajn priajn memorojn, kaj pri britaj militkaptitejoj en Afrika, kie li travivis du jarojn, sed ankaŭ koncizan tekston pri la aŭtoro. Ĉar la eldonkvanto 300 ekzempleroj mirakle baldaŭ elĉerpiĝis, jam estas eldonita la dua Eo-eldono.
Kaj nun finfine aperis ankaŭ la ĉeĥa traduko kun la titolo *Vždy lze zůstat člověkem* (*Ĉiam eblas resti homo*, kio estas parto de la citaĵo de J. W. Goethe, kiun ni elektis kiel moton: *Ne ĉiu povas esti heroo, sed ĉiam eblas resti homo*) en la traduko de la duopo Jindřiška Dubinová kaj Karel

Kauer. Kiel bazo de la traduko oni uzis la duan, kompletigitan germanan eldonon. Mi forte esperas, ke ĝi estos same sukcesa kiel la germana originalo kaj la Esperanto-versio.

Bulteno, n-ro 3/2019

2020

23/01/2020 – rememoriga vespero pri Stanislava Chrdlová okaze de la 20-a datreveno de ŝia forpaso *(klubejo)*

06/02/2020 – lingva seminario de Margit Turková *(klubejo)*

20/02/2020 – diskuto kun Petr Kotyk el Muzeo de la nacia Literaturo *(klubejo)*

05/03/2020 – prelego de Jindřich Košťálek pri Brazilo *(klubejo)*

29/03/2020 – tradicia E-mentala aranĝo Bestĝardeno

22/04/2020 – aperis Bulteno n-ro 1/2020

11/06/2020 – unua kluba kunveno post la printempa koronvirusa kvaranteno *(Ouky Douky Coffee, Prago Holešovice)*

15/08/2020 – aranĝo „Paralela Universo“ en Prago Strašnice, kiun partoprenis 12 personoj el 4 landoj; oni interalie kolektis monon por Bejruto, kie okazis granda eskplodo

19/08/2020 – tradicia E-mentala aranĝo Helpu helpi

27/09/2020 – E-mentala promeno („Ni ne sidu hejme“) en la praga parko Hvězda kaj ĝia ĉirkaŭaĵo

08/10/2020 – aperis Bulteno n-ro 2/2020

12–18/10/2020 – interreta seminario „Armena semajno“; oni studis diversajn materialojn pri Armenio kaj ĝia kulturo kaj pri tiea E-movado

05/11/2020 – interreta seminario de Tomáš Břicháček pri Bultenoj eldonitaj en la jaro 2020

09/11/2020 – aperis Bulteno n-ro 3/2020

09/12/2020 – interreta prelego de Pavla Dvořáková „Surspure de d-ro Zamenhof en Bjalistoko“

10/12/2020 – interreta Kritnaska vespero

Rememore al Stanjo

Petr Chrdle

La 23-an de januaro okazis en la klubejo de Praga Esperanto-Klubo rememorigo al Stanislava Chrdlová, inter esperantistoj konata kiel Stanjo, kiu forpasis pro kancero fine de januaro 2000, do antaŭ 20 jaroj, en la aĝo de 45 jaroj. Mi projekciis du rilatantajn filmojn: La unua montris fragmentojn de ŝia riĉa Esperanto-vivo, la dua la lastan adiaŭon kun ŝi en la ĉefpreĝejo de la Ĉeĥoslovaka husana eklezio sur la Malnovurba placo en Prago. En ambaŭ filmoj ni povis vidi multajn ĉeĥajn kaj eksterlandajn samideanojn, kiuj ankaŭ ne plu estas inter ni. Do ilia rememorigo estis iuspeca flanka efiko de ambaŭ filmoj.
Dum la lasta adiaŭo akompanis Stanjon per kantado Miroslav Smyčka kaj la funebran paroladon havis Renato Corsetti, tiutempa vicprezidanto de UEA kaj nia proksima amiko. En sia parolado li resumis la ĉefajn meritojn de Stanjo ene de la Esperanto-movado, la Ĉe-metodan instruadon de Esperanto dum mallongaj kursoj ne nur en Ĉeĥio (ekzemple en Lančov), sed ankaŭ eksterlande, ekzemple en San Marino kaj Koreio, prezentadon de moravia folkloro ene de multaj Esperanto-aranĝoj, kompiladon de folkloraj programoj, ekzemple de la tutsemajna oficiala antaŭkongreso en Brno *Moravia folkloro al la mondo* antaŭ la UK en Prago en 1996 kaj de la Nacia vespero en la UK, ŝian brilan ĉiĉeronadon, ofte ankaŭ por esperantistoj, ŝiajn verkojn kaj prelegojn, ktp. Lia parolado estis bona resumo de la agadoj de Stanjo, kiun oni povis vidi antaŭe en la jam menciita filmo.
Fine de tiu konciza teksto pri mia edzino mi petas tiujn, kiuj konis ŝin, dediĉi al ŝi mallongan rememoron en ĉi tiu malgaja ronda jubileo.

Bulteno, n-ro 1/2020

Koronvirusa pandemio ne haltigis nin

La koronvirusa pandemio en printempo 2020 forte trafis nian landon kaj ankaŭ nian movadon. Agado de pragaj esperantistoj estas limigita. Ne povas okazi kunvenoj, nek kunaj amasaranĝoj. Ni ĉiuj fermiĝis en niaj hejmoj kaj niaj vizaĝoj kaŝiĝis malantaŭ maskoj. Tamen la esperantista vivo ne haltiĝis. Ni restas en kontakto kaj ni laboras kaj amuziĝas kune. Estiĝis kelkaj gravaj akiroj. […]

★ Oni kune preparis malgrandan vortaron de terminologio rilata al la pandemio […].
★ Oni kune preparis tradukon de la rakonto *Vdova v režimu utajení* (*Vidvino en reĝimo de sekretigo*) de Roman Cílek […].
★ Jan Šebetovský ciferigis kaj poste lokigis en YouTube kvar silentajn filmojn el la historio de pragaj kaj aliaj ĉeĥaj esperantistoj trovitaj en la klubejo de la praga klubo […].

Bulteno, n-ro 1/2020

Unua kunveno post kvaranteno

La 11-an de junio 2020 okazis la unua kunveno de nia klubo post la printempa kvaranteno. Partoprenis ĝin sep „pioniroj“. Ni ĝoje revidis nin post longaj tri monatoj. Ni renkontiĝis eksterordinare en Prago–Holešovice en unu loka kafejo (Ouky Douky Coffee en Janovského strato). Proksime de tiu loko loĝis en siaj malfruaj jaroj la muzikisto R. A. Dvorský.

Ĉe la komenco oni rememoris pri du gravaj datrevenoj: Ĝuste antaŭ cent jaroj naskiĝis la fama poeto kaj esperantisto Jiří Karen. Antaŭ kvin jaroj kaj kelkaj tagoj (la 6-an de junio 2015) mortis nia granda aktivulo Jiří Patera.
Poste oni parolis pri travivaĵoj el la tempo de la kvaranteno. Ĉiuj ŝajne pasigis ĝin pli aŭ mapli agrable en bona etoso. La vivo trankviliĝis kaj ĉiuj ripozis iomete. Oni jam antaŭĝojis rekomencon de la kutima vivo, sed – kiel ni scias – fine de somero la pandemio atakis duan fojon.

Bulteno, n-ro 2/2020

Malgraŭ la „dua ondo“ ni ne sidas hejme

Post agrabla somero revenis la koronvirusa pandemio kun sia „dua ondo“. Tamen pragaj esperantistoj volas ĝui la vivon. Vlasta Pištíková alvokis ilin per sugestaj vortoj „Ni ne sidu hejme!“ kaj fine de septembro ŝi organizis promenon ĉirkaŭ la parko Hvězda, kiu estis finita per tagmanĝo en unu ĝardena restoracio. En la foto videblas E-mentalaj ĉarmaj maskoj.

Bulteno, n-ro 2/2020

Aktualaĵoj el E-mental’

Vlasta Pištíková

Paralela Universo
Dum aranĝo „Paralela Universo“, kiu okazis sabaton la 15-an de aŭgusto 2020 en Prago, partoprenantoj kolektis monon por helpi al la ĉefurbo de Libano, Bejruto, kie antaŭ kelke da tagoj okazis granda kaj detrua akcidento, dum kiu estis damaĝita granda parto de la urbo, multe da homoj perdis parencojn, hejmon, laboron…
Esperantistoj kolektis 2000 kronojn, kiuj estis senditaj al konto de „Člověk v tísni“ kaj kiuj almenaŭ iomete helpos al bejrutanoj en ilia malfacila situacio.

Helpu helpi
La 19-an de aŭgusto 2020 okazis jam la sepa aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental´aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.
Malgraŭ la viruso, ni sukcesis kolekti monon por 35 brikoj!
La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.
Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke kaj apartan dankon al eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj denove ne hezitis sendi monon!!!

[…]

Bulteno, n-ro 2/2020

Tri demandoj por Margit Turková okaze de ŝia jubileo

La sprita leganto certe ekscios, ke la demandojn liveris mi mem dezirante eviti la kutimajn, kiuj pro sia banaleco enuigas la legantojn tiom, ke oni ilin ne legas [mi tion fara(da)s…]. Oni ja ne povas en la nura „rememoriga" artikolo priskribi plenajn biografiajn rememorojn, tial mi elektis ion el la lasta tempo (do – pli malpli aktualan).

Margit Turková, julio 2020

Kio en esperantujo estis por Vi la plej kortuŝiga?

Ĝuste en mia „jubileo-jaro – do en 2019 – mi ĝuis kortuŝplenan esperantan eventon: la OSIEK-konferencon, kiu okazis en la hungara urbeto KONDOROŜ. Kelkajn mi jam partoprenis – ekzemple en Prago, 2003, kiun organizis Petro Chrdle, kie havis siajn parolojn niaj eminentuloj Eli Urbanová (pri siaj biografiaj, poemplenaj aferoj), Jiří Patera (pri historio de Prago), Vlastimil Kočvara (la hobio-kolektanto de la poemo „Máj," pri ties 200-aj eldon-ekzempleroj)… Do ĝuste la aferoj, pri kiuj ni – praganoj – fieras kaj ŝate rememoras. Tiam ni estis multaj (eble 60)…

La menciita OSIEK en Kondoroŝ havis nur cca 20 partoprenantojn, sed ĝi havis ĉiujn kvalitajn atributojn de la renoma konferenco pri literaturo, kiel tio estis destinite ĉe la fondo de ĝi: same havis la „ĉefan temon" – tute nature tio estis „La hungara literaturo".

Min rilate: Troviĝis en mia biblioteko la libro „Sklavoj de Dio," kiujn mi pasinttempe kun intereso tralegis; ĉar ĝi traktas la epokon de la 13-a jarcento, en Hungario, kiam la juneta princino MARGIT (post ŝi mi ricevis nomon) fariĝis monaĥino, poste la nacia sanktulino) – kaj preskaŭ fariĝis edzino de la ĉeĥa reĝo Přemysl Otakar II.

Tuj mi rememoris la tempe daŭrigan eventon, kiun prezentadis Eva Seemannová : „Kunhuta – kdysi královna česká". La legantoj sciu – ke tiu Kunhuta estis anstataŭintino de la menciita Margit (kiu forte malkonsentis kun la propono je la edzeco) kaj ke poste ŝi „estis farita" edzino de la reĝo Přemysl. Do, mi sciigis al la aŭskultantoj kiel la historioj de niaj landoj estis „kunplektitaj," kaj tiun ĉi fakton mi ekuzis por plenumi la postulon de la ĉeftemo. Sed plu: mi nun volas „jubilei" la plej meritplenan anon de nia klubo – do Eva SEEMANNOVÁ, kies 100-jaran naskiĝdaton ni rememoris (??) je la 21.3.2020.

Ke la supre menciita afero ne estu por la legantoj nur dato, mi jen liveras al ili parton de la teatra monologo pri Kunhuta (kiun mi en mia traduko prezentis en la kunsidejo de OSIEK en Kondoroŝ):

Naskiĝo kaj morto – mejloŝtonoj, inter kiuj ni estas vivopilgrimantoj. Nun estas vico mia por atingi la lastan. Ne estas kialo por rigardi antaŭen, restas nur tagoj, eble horoj destinitaj al mi… Tial mi rigardas nur retren…
Tial mi petas Vin, Dio mia
Kiu donas al ni la panon bonan kaj vivoplenan
Nun malfermu la ĉielon
Kaj liveru al mi parton de Vi
Ebligu priplori niajn pekojn
Ke ni povu por ili penti
Dankegi al Vi por ĉio
Vin per la tuta koro ami
Jes – nun mi nur retrorigardas malproksimen, tro malproksimen… En tiu ega malproksimo retroviĝas antaŭ mi bildoj kaj impresoj el miaj infanecaj jaroj sur la hungara korto.

Ankoraŭ antaŭ ol mi ekkonis vin, Premislo, kiel juneta kaj malsperta princineto, malgraŭ la gloro kaj brilo de via nomo, mi malamis vin, ĉar vi kaŭzis morton de mia plej ŝatata infan-amiko. Kvankam vi tion ne sciis, ne havis eĉ antaŭsenton pri tio…
Jánoŝ – pri li mi sciis ĉion! Sufiĉas fermi la okulojn kaj tuj mi vidas lin antaŭ mi – lian hararon, okulojn, rideton, mi sentas la odoron, kiu eliras el lia haŭto, tuŝojn de liaj manoj... Li estis amiko de miaj infanaĝaj ludoj, li instruis min rajdi ĉevalon, akompanis min ĉe la rajdado. Denove kaj denove mi petis miajn gepatrojn ke ili permesu lian akompan-ĉeeston.
Sed plej bele estis, se ni povis malaperi de la elrigardo de plenkreskuloj kaj ekstarti por ia aventuro. Tiam ni grimpadis en la fosejoj de la Buda burgo, enpenetradis en la subterajn, duone superŝutitajn koridorojn, kie ni „oran trezoron" serĉis; aŭ ni subrampadis la junarbaran vegetaĵon kaj tie ni serĉis arbarajn feinojn.
Kaj iamfoje … iamfoje, kiam ni degrimpis la arboplenan deklivon, al Danubo, mi glitis sur krutaĵo kaj en la lasta momento Jánoŝ kaptis min brakume. Lia spiro, subite alproksimiĝinta al miaj lipoj, ĉirkaŭblovis min per sia varmeco kaj ekflamigis mian junecan korpon. Eble tio estis momento – aŭ eterno – sed poste revenigis min en la realon la ekfulmo de lia alrigardo, kiu samtempe kun mi ekkaptis ankaŭ la vizaĝon de iu, kiu kaŝis sin en la apuda arbustaro. La vizaĝo tujmomente malaperis, kaj mi denove perceptis la grundon sub miaj piedoj, la verdon de la foliaĵo, kaj Jánoŝ-on, kiu jam minutojn antaŭ lasis min el la brakoj kaj staris nun apude, en sia konate ĉiutaga aspekto.
Sed la duan tagon, kiam mi serĉis lin, li ne estis trovebla. Al la promeno akompanis min mia vartistino. Ni estis elirintaj la burgan korton ĉirkaŭ la staloj – kaj jen tie – tie mi lin vidis! Li pendis kapalteren, la piedoj ligitaj al kejloj sur kiujn oni lokadis ĉeval-konjungilojn. Li estis nuda kaj inter la femuroj oscedis profunda sulko de sangvundo, ĝis la ventroduono. Ruĝaj streketoj estis fluantaj sur la brusto, kreis kadretojn sur la vizaĝo de l´mortinto kaj gutis surteren sub lia kapo. Jánoŝ! Jánoŝĉjo…!
Kelkajn tagojn mi kuŝis en febro. Kiam mi el ĝi reviviĝis, longan tempon mi volis vidi neniun. Ĉiun, kiu alproksimiĝis al mia lito, mi forpuŝis per angorplena krio, la kapon ŝovante sub la kusenon. Unusola, kiun mi toleris, estis la avo Bela. Nur lia alrigardo alparolis min; pacema, afabla, komprenplena – kaj tamen estis li, kiu ordonis Jánoŝ-on malhonorige murdi – pro sciigo fare de la maljuna vartistino, kiu nin en la arbustaro observis. Nur post kelka tempo mi ĉion eksciis – sed, mirinde, eĉ pro tiu fakto mi ne perdis la ŝatemon al la avo. Nek la vartistinon mi kulpigis. Mian malamegon mi transprenis al vi, Premislo, kiun mi ĝis nun ne konis – sed de kies kulpo – tiel mi la aferon sentis – la terura murdo-krimo okazis. Se mi ne estus destinita fariĝi via reĝa edzino, neniu havus kialon malakcepti la amikecon kun Jánoŝ. Ĝis nun mi memoras, kion diris al mi – trankvile kaj prudentoplene – la avo Bela: „Ne strebu tion kompreni nun. Memoru nur, ke tio estis neceso. Poste vi ekkomprenos. Estas la malnova proverbo: „Se oni lasas du infanojn kunaj – poste oni trovos tri." Vi estas destinita por reĝa krono kaj trono – vole nevole de via flanko, kaj ni estas por vi respondecaj. Ĉion, kio stariĝus kontraŭ tiu celo, ni estas devigaj likvidi. La viro, al kiu vi devas edziniĝi, estas la plej potenca suvereno en la tuta mondo. Kaj vi nure havas du elektojn: aŭ la jenan viron – aŭ monaĥinejon." Tiel diris mia avo, kaj liaj vortoj destinis… De tiu tempo mi ĉesis baŭmi kaj akceptis… Sed longe, Premislo, mi ne povis pardoni al vi, ke vi estis nedirekta kaŭzo de Jánoŝ-a morto.
Hodiaŭ mi pardonas ĉion al ĉiuj kaj mi mem preĝe petas senkulpigon…

Ĉu – aŭskultinte tiun monologon, ni povus ne substreki la plej grandan teatro- prezenton de E.S. – nome la „Eliška Přemyslovna, královna česká," kiun ni povis ĝui okaze de la UK en Prago, 1996. Arda proklamo – „mi estas la reĝino ĉeha" sonis same fiere kiel „mi estas aktorino ĉeĥa." Kaj ni estu fieraj, ke el la ĉeĥa esperanto-nesto eliris tia reprezentant-ino.

2020

Aldonendas, ke pri la sukceso de teatraĵoj same meritis „ŝia dramaturgo“ Čestmír Vidman. Lian 100-jaran naskiĝtagon ni, praganoj, ne forgesu rememori venontjare je la 31.10. 2021. Sen tiuj amikoj mi ne povus skribi la rememoraĵon.
Sed la programo kaj etoso de la menciita konferenco OSIEK en Kondoroŝ
ne estas nura afero nepre mencienda. Pro naturaj kaj objektivaj kialoj la Organizo estis oficiale nuligita post sia 34-jara ekzisto. Tio je vere estis kortuŝa afero, ne sen larmoj en niaj okuloj. Ĝi postlasis grandiozan laboron por Esperanto: 2-foje en la jaro eldonata gazeto LA GAZETO kun bunta programo koncerne la literaturon kaj aŭtorojn, kaj ĉiujaran kunsidan traktadon en diversaj lokoj de la mondo (ni rememoru Wu-Ĥan, nun kun la afero de COVID-19). La lasta loko – KONDOROŜ – meritas specialan atenton kaj dankon de ĉiuj „osiekanoj“. En tiu negranda hungara urbo la konferenco okazis 3-foje! Ne demandu pri kialoj – sed mi scias, ke unu la plej grava estas tiu, ke en ĝi „nestas“ familio, kiu fariĝis motoro de la Organizo. Dum la jaroj mi poŝtupe konatiĝis kun la personecoj, kiuj jam delonge estas konataj en la Esperantujo: Eugéno de Zilah – la aŭtoro de famaj libroj (naski ĝinto en Kondoroŝ), lia edzino Lena de Zilah – instigantino kaj „ ŝoforino“ de LA GAZETO (kara mortinto en 2009), iliaj hungaro-francaj geinfanoj kaj genepoj, genevoj, ktp. – inter ili estu nome menciita Pál KOSZUCH – la rekta organizanto de la konferenco. Pro la ekkono de la tuta familio „je la lasta momento“ por mi la movado de OSIEK fariĝis nedisigebla afero de mia vivo.
La urbeto mem meritas jenan gajan rimarkon. Hungaroj diras, ke – kvankam negrava, ĝi tamen estas konata de hungarnacianoj en la tuta mondo! Ili ĉiuj konas kaj kantadas la simplan melodian kanton pri la „Kondoroŝ-a ĉardo“. Jen traduko de la kanteto (ne en la traduko mia):

Kondoroŝa ĉardo/belas, jen ver´.
Ĝin vizitas cimbalisto/por cimbali ĉiu vesper´.
Jen dezir´ de ĉardistin´/ke tre baldaŭ la filin´/
Iĝu edzin´.

Nenia geniaĵo, mi scias, sed ĝi evokas en mi plej varmajn rememorojn. Krom tio aludas komencon de la dua demando, je kiu mi volas respondi.
En nia OSIEK-kolektivo mi povis fiere anonci la „grandiozan“ eventon – la operon STERNENHOCH. Por min viziti kaj la Operon ĝui mi surloke invitis la renoman muzikistinon en la Esperantujo nomatan Perla Miela (laŭvorta traduko de ŝia hungara nomo, kiun mi ne liveras).

Kio en esperantujo estis por Vi la plej ĝoiga?
Kaj pere de la supra rimarko mi venas al la afero, pri kiu mi povas paroli kiel pri „la plej ĝojiga“ … (kompreneble estis ankaŭ aliaj, sed se mi devas elekti, kaj samtempe certe kuninteresigi la legantojn, do, sendube…).
Mi ĝuis la Operon 5-foje; (kaj la 6-an malebligis la pandemia kvaranteno). Se oni supozas, ke estas ĝuste la „Esperanto-elemento“ kialo de mia entuziasmo, do ne plene jese mi povas aserti; la kerno estas la interesa muziko, kiu fariĝas neniam laciga, ĉiam impetiga; kaj la tuta aranĝo; kaj la Komponisto Ivan Acher. Dum ĉiu prezentado li sidas ĉe sia „kapitana aparato,“ mi ŝatas vidi lian rondan agrablan vizaĝon – kaj mi ĉiam iras lin saluti „en la nomo de esperantistoj“. Perla, la fakulino (en muziko, en Esperanto, en literaturo) esprimiĝis: „Videblas, ke la komponisto ne estas esperantisto kaj ke la tradukisto ne estas muzikisto. Tamen mi estus malfeliĉa se mi ne estus spektinta la Operon.“ Kaj ŝi kunprenis la programon por trakti la aferon inter siaj budapeŝtaj gekolegoj. Ĝuste tio ĝojigu nin: ke tiel NEATENDITE falis al ni „la sukceso“ (kvankam aktuale ni por tio aktive ne propagandis). Sed la afero maturiĝis kaj donis rikolton – **ĉar la hazardo favoras la preparitajn…**

Kaj ni estu fieraj, feliĉaj, kaj al Mirek Malovec dankplenaj, ke li estas kapabla ĉiumomente (ne nur en ĉi menciita) reprezenti nian movadon. Ĉu povas esti iom pli ĝoiga ol havi tiajn homojn por samideanoj??

Kio en esperantujo estis por Vi la plej malĝoiga?
La „kabeo“ de Jaroslav Krolupper…

Estimata sinjoro redaktoro, mi dankas por la demandoj, kiujn mi sciis kaj povis respondi sen hezito. Laŭ mia konscio mi elektis bone la splitaĵojn el mia proksimume 50-jara esperanta vivo.

Samideanino **Margit Turková** (fraŭla nomo Kvietková) naskiĝis la 26-an de septembro 1939 en Čierny Balog en Slovakio. En 1946 ŝi transloĝis kun la familio en Okcidentan Bohemion. En 1961 ŝi finis studadon en la Agronomia Fakultato de la Agrikultura Altlernejo en Prago kaj ekde tiam ŝi laboris kiel agronomino.
En Esperantujo ŝi aktivas ekde 1971. Origine ŝi estis membrino de la Esperanto-Klubo en Bor u Tachova. Post sia tranloĝiĝo en mezbohemia vilaĝo Obořiště en 1979 ŝi agis en la kluboj en Příbram kaj en Prago. En la jaroj 1976-1982 ŝi estis membrino de la Komitato de ĈEA. Honora membrino de ĈEA ŝi fariĝis en 2011.
Ŝi aktivas precipe en la sfero de kulturo. Ŝi kunlaboris ekzemple kun Josef Rumler, Jiří Karen, Čestmír Vidman kaj rusa poetino Ljubov Vondroušková kaj nuntempe kun Věra Ludíková. Per siaj artikoloj ŝi kontribuas al esperantistaj gazetoj. Ŝi estas ano de la organizo OSIEK, en kiu ŝi prelegis pri *Kei Kurisu kaj liaj tradukoj de la verkoj de Jaroslav Hašek* (OSIEK-konferenco en Banská Štiavnica, 2017) kaj *Respegulo de hungara historio en ĉeĥa literaturo* (OSIEK-konferenco en Kondoroŝ, 2019).

plejparte laŭ la Vikipedio

Bulteno, n-ro 2/2020

Saluto al Armenio

Tomáš Břicháček

En tiuj ĉi tagoj niaj pensoj estas ofte kun Armenio kaj Surmontara Karabaĥo. Dum nia situacio kun la koronviruso ŝajnas bedaŭrinda, ni ne forgesu, ke en iuj partoj de mondo homoj havas multe pli gravajn problemojn kaj eĉ batalas por ilia propra ekzistado kaj ŝtateco!
Komence de la nuna milito mi salutis la armenajn samideanojn kaj esprimis niajn viglajn simpatiojn al ilia popolo. Ĉeĥoj ĉiam estis amikoj de tiu antikva kristana nacio, kiu vivas en nefacilaj politika-geografiaj kondiĉoj.
Kiam mi tiurilate konatiĝis kun la aktiva armena Esperanto-movado kaj kun armena kulturo, ekestis ideo organizi retan seminarion Armena semajno kaj antaŭ ĉio prepari unu numeron de Bulteno tute dediĉita al Armenio. Koran dankon al ĉiuj, kiuj helpis al mi efektivigi tiujn du intencojn.
Ni forsendas el Prago al niaj armenaj geamikoj dezirojn de ĉio plej bona kaj ĉefe de rapida reveno de paco en liajn landojn.

Bulteno, n-ro 3/2020

Armena semajno

Ekde la 12-a ĝis la 18-a de oktobro [2020] okazis en nia klubo interreta seminario *Armena semajno* kiel signo de solidareco kun Armenio kaj Arcaĥo trafitaj de kruelega milito. Dum tiu aranĝo oni studis diversajn materialojn pri Armenio kaj ĝia kulturo kaj pri tiea Esperanto-movado. Inter armenaj gesamideanoj ni akiris novajn geamikojn.

Bulteno, n-ro 3/2020

Forpasis Václav Lamr

Kun bedaŭro ni anoncas, ke la 17-an de decembro 2020 forpasis samideano Václav Lamr.
Václav Lamr naskiĝis la 25-an de aprilo 1943 en Litovel. Li estis ĉeĥa pentristo, esperantisto, poeto, kreanto de aforismoj. Li studis art-industrian lernejon en Brno, fakon „pentristaj teknikoj kaj pentraĵoj en arkitekturo“ (1961–1964). Antaŭ 1968, en la tempo de liberiĝo de pensado, li ekspoziciis kun juna generacio de artistoj kaj aranĝis vesperojn de propra poezio. Post 1970 la tiamaj okazintaĵoj en Ĉeĥoslovakio orientigis lin al la kristanaj valoroj, li komencis krei bildojn kaj grafikaĵojn kun bibliaj temoj (Reveno de la perdita filo, Kompatema patro, Kompatema samariano, Lukto de Jakobo kun anĝelo). Ekde 1993 li preparis lernantojn por studado en artfakoj, precipe pri desegnado de portretoj kaj homfiguroj. Li organizis „Tagojn de kreado“ por infanoj kaj junularo por motivigi talentajn individuojn trovi propran stilon de esprimado. Li ekspoziciis siajn bildojn en Ĉeĥio kaj ankaŭ eksterlande. Lia speciala hobio estis kreado de aforismoj.

El la letero de Tomáš Břicháček al sinjorino Lamrová (24. 12. 2020):
„Vážená paní Lamrová, jménem svým i Klubu esperantistů v Praze bych Vám chtěl vyjádřit upřímnou soustrast.
Vašeho pana manžela jsem znal z jeho občasných návštěv v našem klubu. Nebyl v něm zvlášť hovorný, ale všichni jsme dobře věděli o jeho umělecké činnosti. Přispěl také loni na jaře do našeho časopisu krásnou básní o Janu Palachovi. Ještě letos před pandemií jsme se spolu domlouvali na přednášce o jeho obrazech. Bohužel na ni už nedošlo.
Vážil jsem si jeho výtvarného díla i jeho velmi aktivního křesťanského duchovního života.
Našemu klubu bude velmi chybět.“

Bulteno, n-ro 1/2021

2021

07/01/2021 – interreta prelego de Petr Chrdle pri novaj libroj de KAVA-PECH

15/04/2021 – interreta prelego de Pavla Dvořáková „Surspure de d-ro Zamenhof en Varsovio“ – parto 1

16/04/2021 – aperis Bulteno n-ro 1/2021

26/07/2021 – interreta prelego de Pavla Dvořáková „Surspure de d-ro Zamenhof en Varsovio“ – parto 2

18/08/2021 – tradicia E-mentala aranĝo Helpu helpi

20/09/2021 – aperis Bulteno n-ro 2/2021

30/09/2021 – fondita kanalo de EKP en Jutubo (YouTube)

14/10/2021 – prezentado de Vlasta Pištíková pri Sicilio *(klubejo)*

25/10/2021 – EKP ricevis valorajn arĥivaĵojn post Jaroslav Šustr de lia familio

25/11/2021 – solena memoriga vespero okaze de la 100-a datreveno de naskiĝo de Čestmír Vidman *(klubejo)* – kun prelego de Tomáš Břicháček

09/12/2021 – aperis Bulteno n-ro 3/2021

15/12/2021 – Zamenhoftago – tradicia kunveno ĉe Esperanto-monumento en Vyšehrad kun tosto, torto, kantado kaj amikeca babilado

Forpasis Lenka Angelová

Kun bedaŭro ni anoncas, ke la 18-an de marto 2021 forpasis nia amikino Lenka Angelová (62-jaraĝa). Ŝi estis longjara aktiva membrino de E-mental', tre bonkora virino, kiu zorgis pri aliuloj kaj ĝojigis homojn ĉirkaŭ si, nelacigebla persono, kiu dum multaj jaroj vigle laboris por Esperanto-mondo.
Lenka, vi tre mankos al ni!

Bulteno, n-ro 1/2021

La lasta adiaŭiĝo kun Lenka okazis la 18-an de marto 2021 en Pardubice. Ĉar E-mentalanoj ne povis komune partopreni entombigon de Lenka, membroj de la klubo kunvenis ĉe E-monumento en Prago, kie estis farita pietata loko kaj tie oni almenaŭ simbole povis adiaŭĝi kun kara amikino.

www.e-mental.cz

Surspure de d-ro Zamenhof en Varsovio

Dufoje dum la lastaj monatoj Pavla Dvořáková pretigis por nia klubo ege interesajn interretajn prelegojn, kiujn ŝi nomis Surspure de doktoro Zamenhof en Varsovio. Temis pri virtualaj promenoj tra la lokoj, kie dro Zamenhof vivis, studis, laboris, mortis kaj estis entombigita. La unua prelego okazis la 15-a de aprilo (unu tago post la forpasdatreveno de Zamenhof) kaj la dua la 26-an de julio, kiu estas la Tago de Esperanto.
Pavla montris al ni, ĉe kiuj adresoj d-ro Zamenhof loĝis, tra kie li supozeble iradis, kie li ĉerpis fortojn, kiujn konstruaĵojn tiutempe vidis liaj okuloj, kiuj el ili estis post la 2-a mondmilito renovigitaj kaj kiu ne, kiel tiuj lokoj aspektas nuntempe. Etoson de Varsovio ŝanĝe de la 19-a kaj 20-a jarcentoj ni iom enflaris pere de malnovaj bildkartoj kaj fotografaĵoj, kiuj estis kompletigitaj per interesaj detaloj el la vivo de Zamenhof.

Bulteno, n-ro 2/2021

Sukcesa Helpu helpi 2021

Vlasta Pištíková

La 18-an de aŭgusto 2021 okazis jam la oka aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental´aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.
Estis kolektita mono por 42 brikoj!
La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.
Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke kaj apartan dankon al eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj denove ne hezitis sendi monon!!!

Bulteno, n-ro 2/2021

Bukedo por Jaroslav Šustr

Tomáš Břicháček

Dum nia ĉi-jara familia libertempo en Orlické hory komence de aŭgusto ni planis viziti ankaŭ Ústí nad Orlicí. Mi rememoris, ke tie estas sepultita la iama eminenta prezidanto de la praga klubo Jaroslav Šustr (al kiu ni dediĉis la tutan N-ron 2/2019 de nia Bulteno).
La administracio de la tombejo (temas pri tiel nomata Nový hřbitov) informis nin, ke la tombo de Šustr devus esti en loko CD/3 n-ro. 13, 14 (CD estas sektoro, 3 estas vico) kaj ke ĝi estas duobla tombo. En la tombo laŭdire ripozas ankaŭ la patro Karel Šustr (+ 1956).
Fakte, kiam ni venis en la tombejon, ni havis problemojn orientiĝi tie. Oni facile trovas sektoron kaj eble ankoraŭ vicon, sed tie estas neniuj numeroj apud la tomboj.
Fine ni trovis en la koncernata vico iun grandan – ŝajne duoblan – tombon tute kovritan de hedero sen iu videbla surskribo. Ĝi povis estis la ĝusta. Kiu scias? Ĉiukaze ĝi certe estis proksime de la loko. Do mi metis mian bukedon tien.

Bulteno, n-ro 2/2021

Kluba kanalo en Jutubo

Ekde la 30-a de septembro 2021 la Esperantista klubo en Prago havas sian kanalon en Jutubo. Ĝi nomiĝas Esperanto Prago kaj ĝi troviĝas en la ligilo: https://www.youtube.com/channel/UCMltXqTwAGh5PkgyObqa6yA. La kanalo estas intencita kiel deponejo de diversaj prelegoj, beletraĵoj, amuzaj programoj, arĥivaj filmoj kaj aliaj interesaĵoj. En la estonteco ĝi povus oferti ankaŭ retan kurson de Esperanto por vasta publiko.
Vizitu la kanalon kaj vi vidos, ke jam hodiaŭ ĉeestas varispecaj videoj. Ĉiu povas helpi kun ĝia evoluo kaj espereble ĝi estos ĉiam pli riĉenhava kaj utila.

Bulteno, n-ro 3/2021

Valoraj arĥivaĵoj post Jaroslav Šustr

Tomáš Břicháček

En oktobro 2021 skribis al ni neatendite sinjorino Hana Šustrová el praga kvartalo Vinoř. Ŝi estas edzino de la nepo de nia iama prezidanto Jaroslav Šustr. Ŝi anoncis, ke lia bopatro Jaroslav Šustr, filo de „nia“ Šustr, ĉi-jare mortis kaj ke li postlasis ankaŭ kelkajn Esperantajn arĥivaĵojn post lia patro. Ŝi ofertis ilin al nia klubo.
Mi vizitis sinjorinon Šustrová la 25-an de oktobro en ŝia hejmo kaj transprenis de ŝi kun plezuro multajn interesaĵojn. Inter ili troveblas:

- bela albumo de portretaj fotoj de elstaraj pragaj esperantistoj el la jaro 1947 (kun priskriboj)
- granda kolekto de poŝtkartoj adresitaj al Šustr
- kadrita portreta foto de Šustr
- kadrita diplomo donita al Šustr de lia klubo
- kadrita diplomo donita al Šustr de Ĉeĥosl. Esperanto-komitato
- kolekto de libretoj „ŝlosilo“ en diversaj lingvoj
- antikvaĵa kulereto kun reliefo de Zamenhof.

Ĉiuj tiuj valoraĵoj nun estas en la kunvenejo Ve Smečkách 25 kaj niaj klubanoj kaj gastoj povas trarigardi ilin dum kunvenoj.
Pri la filo de Šustr, Jaroslav Šustr junioro, oni eksciis, ke li estis fama aŭtovetkuristo. Liaj mallongaj rememoroj estis publikigitaj en retpaĝaro https://www.ewrc.cz en artikolo *Jarda závodník*.[13]
[En Bulteno n-ro 3/2021] vi povas vidi la menciitajn portretajn fotojn de elstaraj pragaj esperantistoj, kiuj troviĝas en la albumo dediĉita al Šustr en la jaro 1947. Estas samideanoj: Antonín Slanina, František Sviták, Anna Bárochová, František Čermák, František Landsman, Jaroslav Šustr, A. Fryšová, Tomáš Balda, V. Boháčová, Václav Lorenz, St. Jelínková.

Bulteno, n-ro 3/2021

Jubileo de Čestmír Vidman

La 31-an de oktobro pasis 100 jaroj ekde la naskiĝo de la poeto kaj esperantisto Čestmír Vidman (1921–2013). […]
La jubileo […] estis omaĝita unue en Rožmitál pod Třemšínem – urbeto, kie la poeto pasis gravan parton de sia infaneco kaj kiun li ŝatis. La loka muzeo „Podbrdské muzeum“ malfermis ekspozicion, kiu daŭris ekde la 27-a de oktobro ĝis la 30-a de novembro. La unuan tagon okazis vernisaĝa vespero, dum kiu estis ankaŭ prezentita la dramo „Johana z Rožmitálu – královna česká“ pere de Stanislava Hošková. Margit Turková, kiu helpis prepari la ekspozicion kaj partoprenis la vernisaĝon, skribas en Starto: „Tre ĝojiga estas konstato, ke la organizantoj respektis kaj ofte menciis la esperantistecon de Č.V. kaj lian agadon ĉi-teme.“
La Esperantista klubo en Prago rememorigis la elstaran klubanon la 25-an de novembro per solena vespero kun prelego kaj kun deklamado kaj aŭskultado de poemoj. Ĉeĥa versio de la prelego jam troveblas en nia kanalo en Jutubo. Ankaŭ [Bulteno n-ro 3/2021] estas parte dediĉita al la jubileo.

Bulteno, n-ro 3/2021

[13] https://www.ewrc.cz/clanek/35717-jarda-zavodnik/?fbclid=IwAR1KBlbxkegWGNxXlqijBNFYtfWGqBlckZeB5atz5XjmHmdcUkV9_hCU550 [januaro 2021]

2022

20/01/2022 – interreta seminario dediĉita al Eli Urbanová okaze de la 10-a datreveno de ŝia forpaso

17/02/2022 – prezentado de Vlasta Pištíková pri Kalabrio *(kunvenejo)*

03/03/2022 – prelego „Pri Ĉinio kaj Koreio subjektive“ de Petr Chrdle *(kunvenejo)*

17/03/2022 – prelego de Michal Lebl pri interesaj Esperantaj projektoj, en kiuj li partoprenis *(kunvenejo)*

31/03/2022 – ĝenerala kunveno; elektita nova estraro: Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Pištíková kaj Petr Javorik

14/04/2022 – aŭskultado de versoj de Věra Ludíková – ekstera kunveno *(Život 90, Karolíny Světlé)*

28/04/2022 – seminario pri Japanio – pri siaj travivaĵoj kaj spertoj parolis Petr Chrdle, Vlasta Pištíková kaj Petr Javorik *(kunvenejo)*

03/05/2022 – aperis Bulteno n-ro 1/2022

12/05/2022 – diskuto pri la organizado de la festo de la venonta 120-a jubileo de nia klubo, kiu okazos en novembro *(klubejo)*

09/06/2022 – solenaĵo okaze de la 30-a datreveno de la fondiĝo de la eldonejo KAVA-PECH *(Jednota tlumočníků a překladatelů)*

23/06/2022 – prelego de Tomáš Břicháček pri lokoj ligitaj kun la komencoj de Esperanto en Prago *(klubejo)*

15/09/2022 – kuna legado de libro pri Eduard Weinfurter *(klubejo)*

21/09/2022 – aperis Bulteno n-ro 2/2022

13/10/2022 – prelego de Petr Chrdle pri Eli Urbanová *(klubejo)*

09/11/2022 – aperis broŝuro *120 let esperanta v Praze* (kiel Bulteno n-ro 3/2022) kaj nova jubilea kroniko

11–13/11/2022 – granda festo okaze de la 120-a datreveno de la Esperantista klubo en Prago

24/11/2022 – diskuto kun Jiří Altior kaj Vladimír Liščák, reprezentantoj de la Instituto de renesanco de kultura heredaĵo *(klubejo)*

08/12/2022 – Kristnaska vespero *(klubejo)*

15/12/2022 – Zamenhoftago – tradicia kunveno ĉe Esperanto-monumento en Vyšehrad kun tosto, torto, kantado kaj amikeca babilado

Duobla jubileo de Eli Urbanová

La 8-an de februaro 2022 pasis 100 jaroj depost la naskiĝo de Eli Urbanová, elstara Esperanta poetino kaj aŭtorino de la aŭtobiografia romano *Hetajro dancas*, multjara estimata membrino de la Esperantista klubo en Prago, honora membrino de UEA kaj de ĈEA, membrino de la Akademio de Esperanto (1986–1995), profesie instruistino. La 20-an de januaro ni ankaŭ rememorigis la 10-an datrevenon de ŝia forpaso. Okaze de tiu duobla jubileo la klubo organizis interretan seminarion (la 20-an de januaro) kaj en [la Bulteno n-ro 1/2022] vi trovos ŝian poemon *Curriculum vitae*.

Bulteno, n-ro 1/2022

Raporto pri la agado de nia klubo (2/2019–3/2022)

Tomáš Břicháček

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj! Karaj geamikoj!
Post tri jaroj la Esperantista klubo en Prago organizas sian ĝeneralan kunvenon. Kiel kutime, tio estas okazo resumi kaj komenti nian agadon kaj gravajn okazintaĵojn de la pasinta periodo, kiu samtempe estis la funkcia periodo de nia kluba komitato.
La komitato, kiu hodiaŭ sumigas antaŭ vi, estis elektita la 7-an de februaro 2019. Ekde la komenco ĝis nun ĝi funkciis en tiu-ĉi konsisto: Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Pištíková, Jan Šebetovský kaj Václav Ondřej Loučka.
Tiuj tri jaroj tutsume estis ege malfacilaj kaj iel-tiel sinusoidaj – ĉar ĉiam ŝanĝiĝis tempoj pli bonaj kaj malpli bonaj. La unuaj monatoj estis tre favoraj – nia programo estis riĉa kaj la aranĝoj estis sufiĉe vizitataj. Bedaŭrinde poste venis la koronvirusa pandemio kaj kunligitaj registaraj restriktoj, kiuj forte limigis nin. Ni travivis du kvarantenojn. Dum longaj monatoj ne povis okazi kunvenoj, nek kunaj amasaranĝoj. Ĝis nun ni tute ne reviviĝis.
Malgraŭ tia situacio ni estis relative aktivaj. Ene de la klubo oni organizis pli ol 30 aranĝojn – inkluzive 19 prelegojn aŭ prezentadojn, 8 seminariojn aŭ diskutojn kaj kelkajn festojn. Ankaŭ okazis iuj gravaj agadoj ekstere fare de niaj klubanoj, kiujn indas rememorigi.
Temoj, al kiuj ni dediĉis nin en tiuj aranĝoj, estis diversspecaj: oni parolis pri lingvaj demandoj, pri elstaraj personoj (Kurisu Kei, familio Ginz, Stanislav Schulhof, Bertha von Suttner, Jaroslav Šustr, Stanislava Chrdlová, Čestmír Vidman, Eli Urbanová), pri Esperanto-muzeo en Vieno, pri vivlokoj de Zamenhof, pri novaj libroj de KAVA-PECH kaj pri kelkaj landoj kaj regionoj (Italio, Meksikio, Brazilo, Armenio, Ĉinio, Koreio).
Antaŭ la koronvirusa pandemio ni ricevis kvar interesajn gastojn: Unue oni diskutis kun la iama prezidantino de nia klubo Květa Krajíčková. Aŭstra esperantisto Bernhard Tuider prelegis pri la Esperanto-muzeo, kiun li gvidas. Vizitis nin ankaŭ japana esperantistino Hiroko Katayama kaj arĥivisto Petr Kotyk el la Muzeo de la nacia Literaturo.
El tiu feliĉa parto de la priparolata periodo ni menciu ankaŭ kelkajn gravajn eventojn ekster la klubo rilatajn al niaj klubanoj aŭ aliaj esperantistoj aŭ ĝenerale al Esperanta vivo en Prago:
★ En aprilo 2019 okazis en la Nacia etnografia muzeo publika legado de la poemo Je jaro de Věra Ludíková, kiu estis tradukita en kelkaj dekoj da lingvoj inkuzive en Esperanto. La Esperantan version legis sinjorino Margit Turková.
★ En majo 2019 okazis en la Pola instituto publika lanĉo de la libro *Ludvik Lazar Zamenhof – život dílo ideály* de Alexander Korženkov. Libron ĉeĥigis Jindřich Košťálek kaj eldonis ĝin KAVA-PECH.

★ En junio 2019 membroj de E-mental' kreis en Prago reklamon por Esperanto. Ili pentris ĝin sur barilon ĉirkaŭ konstruata domo en la strato Veletržní de Prago. Posedantoj de la barilo – la konstrufirmao – mem proponis al homoj, ke ili laŭplaĉe kreu.
★ Ankaŭ en junio 2019 okazis en la Senato ekspozicio dediĉita al Otokar Březina. La ekspozicion helpis prepari Viktor Dvořák, kiu dum tiu evento ne malzorgis propagandi Esperanton.
★ En oktobro 2019 vizitis Pragon la fama aŭstra esperantisto Martin Stuppnig dum sia vojaĝo tra Ĉeĥio, kie li trifoje prezentis sian tre sukcesan libron *Menschlich in der Unmenschlichkeit.* En Prago okazis lanĉo de la ĉeĥa traduko kun la titolo *Vždy lze zůstat člověkem*. La tradukon preparis Jindřiška Dubinová kaj Karel Kauer.
Dum la pandemio nia agado febliĝis, sed ne haltiĝis. En printempo 2020 dum la unua kvaranteno oni kune preparis malgrandan vortaron de terminologio rilata al la koronviruso kaj tradukon de la rakonto *Vdova v režimu utajení* (*Vidvino en reĝimo de sekretigo*) de Roman Cílek. Poste dum la dua kvaranteno oni „malkovris" interretajn kunvenojn – danke al tio okazis kelkaj bonegaj prelegoj – ekzemple tiuj pri Zamenhof kaj liaj vivlokoj en Bialistoko kaj Varsovio fare de Pavla Dvořáková – kaj eĉ la kristnaska vespero en 2020 okazis tiel.
En la lastaj monatoj nia klubo revekiĝas. Denove okazas klasikaj aranĝoj, kvankam ĝis nun malpli vizitataj. Okazas jam ankaŭ eventoj ekster la klubo, ekzemple en oktobro 2021 Margit Turková helpis prepari ekspozicion pri Čestmír Vidman en Rožmitál pod Třemšínem en la loka muzeo.
Parto de la revekiĝo estas ankaŭ nia nova kluba kanalo en Jutubo, kiu estis fondita en septembro 2021. La kanalo estas intencita kiel deponejo de diversaj prelegoj, beletraĵoj, amuzaj programoj, arĥivaj filmoj kaj aliaj interesaĵoj. En la estonteco ĝi povus oferti ankaŭ retan kurson de Esperanto por vasta publiko.
Ĝojigis nin ankaŭ la donaco de sinjorino Hana Šustrová, edzino de la nepo de nia iama prezidanto Jaroslav Šustr. En oktobro 2021 ŝi transdonis al ni valorajn arĥivaĵojn. Dank' al tio ni interalie kunvenas sub la portreta fotaĵo de Šustr.
Nia revuo Bulteno aperis dum la tuta periodo kiel kutime, do trifoje en jaro. Ekde la lasta ĝenerala kunveno aperis 9 numeroj. Du el ili estis specialaj. La numero 3/2019 estis tute dediĉita al nia iama eminenta prezidanto Jaroslav Šustr okaze de la 50-a datreveno de lia forpaso, kaj la numero 3/2021 temis plejparte pri Čestmír Vidman.
Daŭre oni ankaŭ aktualigas nian elektronikan *Kronikon de Esperanto en Prago,* kiu kovras la periodon ekde la komenco de la jaro 2014. La kroniko enhavas jarajn listojn de okazintaĵoj kun datoj kaj diversaj eltondaĵoj, ĉefe el la Bulteno.
Koncerne niajn membrojn kaj favorantojn: Pozitiva okazintaĵo estis la geedziĝo de gesamideanoj Vít G. Mišurec kaj Veronika Venislovas en julio 2019. Male kun bedaŭro ni devas rememorigi forpason de kelkaj samideanoj – nome Helena Štruncová, Marie Drašnarová, Přemysl Hrzán kaj Václav Lamr.
En novembro nia klubo ĝisvivos 120-an datrevenon de ĝia fondiĝo. Estas granda festinda jubileo kaj ni devus prepari por ĝi zorge. Ni povus organizi pli gravajn aranĝojn, kiu povus allogi ankaŭ samideanojn el aliaj urboj kaj eĉ el eksterlando.
Fine mi volus danki al ĉiuj membroj kaj favorantoj, kiuj aktive kunlaboris en organizado de nia klubo, ĝia programo kaj lia revuo. Ĉiu prelego, seminario, amuza socia aranĝo aŭ teksto por la Bulteno estas valora kontribuaĵo por la funkciado de la klubo kaj por la Esperanta vivo en Prago. Speciala danko apartenas al niaj komitatanoj kaj al la aktivuloj, kiuj videbligas Esperanton ankaŭ ekster nia klubo.

2022

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj, karaj geamikoj, mi antaŭĝojas pri la daŭrigo de nia renkontiĝado kaj agado kaj mi esperas, ke la klubo post la pandemio baldaŭ komplete reaktiviĝos.
Dankon pro via atento.

Bulteno, n-ro 1/2022

Zápis ze zasedání členské schůze 31. března 2022

Petr Javorik, Vlasta Pištíková

Dne 31. března 2022 od 17 hod. se konalo v klubovně v ulici Ve Smečkách 25, Praha 1, zasedání členské schůze Klubu esperantistů v Praze, pobočného spolku Českého esperantského svazu, z. s.

Účast
Dle stanov Českého esperantského svazu, z.s. platí, že členská schůze klubu (včetně klubu, který je pobočným spolkem) je schopna usnášet se při účasti alespoň 5 členů s hlasovacím právem. Tato podmínka byla splněna. Účastnilo se 8 členů s hlasovacím právem.

Volba zapisovatele a ověřovatele
Členská schůze jednomyslně (8 hlasy) zvolila jako zapisovatele Petra Javorika a jako ověřovatele Vlastu Pištíkovou.

Zpráva předsedy
Předseda klubu Tomáš Břicháček přednesl zprávu o fungování klubu v období od posledních voleb výboru (7. 2. 2019).
Členská schůze vzala zprávu na vědomí.

Zpráva místopředsedy a pokladníka
Místopředseda a pokladník klubu Jiří Mišurec přednesl zprávu o členské základně a stavu financí.
Členská schůze vzala zprávu na vědomí.

Volba předsedy a dalších členů výboru
Poté proběhla volba předsedy a ostatních členů výboru.
Členská schůze zvolila za předsedu Tomáše Břicháčka (7 hlasů pro, 0 hlasů proti, 1 se zdržel).
Jako místopředseda a pokladník byl zvolen Jiří Mišurec (7 hlasů pro, 0 hlasů proti, 1 se zdržel).
Za ostatní členy výboru byli zvoleni Vlasta Pištíková (8 hlasů pro, 0 hlasů proti, 0 se zdržel) a Petr Javorik (8 hlasů pro, 0 hlasů proti, 0 se zdržel).

Volná diskuse
1. Návrh na zvýšení členských příspěvků od roku 2022. Pracující ze 100 Kč na 200 Kč, nepracující z 80 Kč na 100 Kč. Schváleno (8 hlasů pro, 0 hlasů proti, 0 se zdržel).
2. Návštěva čtení básní Věry Ludíkové v rámci schůzky klubu dne 14. 4. 2022.

Bulteno, n-ro 1/2022

Mnohojazyčné čtení z díla Věry Ludíkové

14. dubna, na Zelený čtvrtek, několik členů našeho klubu navštívilo mnohojazyčné čtení díla Věry Ludíkové, konkrétně třetího rozšířeného vydání díla *Kantáta 1 + 5*. Na tuto „výjezdní“ schůzku jsme se vypravili namísto pravidelného setkání Ve Smečkách.
Akce, kterou pořádal Americký klub dam, se konala v budově Život 90 v ulici Karolíny Světlé na Starém Městě.
Básnířka Věra Ludíková je aktivní příznivkyní esperanta. Řada jejích děl včetně *Kantáty 1 + 5* byla přeložena do esperanta.
Esperantský překlad *Kantáty* četla na akci Margit Turková.

Bulteno, n-ro 1/2022

Tridekjariĝo de KAVA-PECH

La 9-an de junio okazis en la sidejo de la Unio de Ĉeĥaj Interpretistoj kaj Tradukistoj granda solenaĵo okaze de la tridekjariĝo de la eldonejo KAVA-PECH, posedata de nia elstara membro Petr Chrdle. Inter multnombra aŭditorio aperis ankaŭ multaj pragaj kaj alilokaj esperantistoj, kiuj venis festi la jubileon kaj gratuli al Petr.

Bulteno, n-ro 2/2022

Eldonejo KAVA-PECH tridekjara

Petr Chrdle

Kiam mi fondis etan entreprenon en la jaro 1991, mi neniel intencis fariĝi eldonisto, nek mi intencis agi internacie. Tial ankaŭ la nomo de ĝi estas enigmo kaj mi devas ripete klarigi, ke ĝi estas akronimo en la ĉeĥa kun la signifo Kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle. Do evidentiĝas, ke la ĉefa agado estis organizi kongresojn, seminariojn kaj ceterajn edukajn aranĝojn.
Sed mi sentis, ke pluraj prelegkolektoj estas valoraj, do ili meritus aperi libroforme kun ISBN, por ke ili estu devige registritaj en katalogoj kaj neforĵeteble restu en difinitaj bibliotekoj. Tial mi komencis esplori la eblojn de laŭmenda eldono ĉe eldonejoj kaj presejoj. Sed pro la dezirata eldonkvanto inter 60 kaj 200 ekzempleroj oni aŭ priridis min, aŭ donis al mi tian prezon, ke neniu aliĝus al la evento pro la aliĝkotizo enhavanta la prelegkolekton.
En tiu situacio mia edzino Stanjo proponis, ke ni registriĝu en la sistemon ISBN kiel eldonejo por ekhavi proprajn ISBN kaj ke ni produktu la librojn „surgenue“. Tiel ni registriĝis en la jaro 1992, do nun ni festas la tridekjariĝon de la eldonejo. Ni aĉetis kopiilon (tiutempe analogan), mane regatan tranĉilon por havi belajn eĝojn, kaj grandan pinglilon por nedikaj libroj. La pli dikajn ni igis glui enspine en la malplej kosta maniero.
Klare, se tiam jam ekzistus kvalita cifereca presmaniero, mia eldonejo ne ekestus. Sed kiam ni jam pro neceso fariĝis eldonejo, tiu laboro komencis plaĉi al ni kaj ni komencis eldonadi ankaŭ librojn en Esperanto, nia komuna hobio, sekve ankaŭ en la ĉeĥa. Kaj iom paradokse nun, kiam mi estas pensiulo, mi nuligis ĉiujn miajn aktivaĵojn krom tiu neintencita, nome eldoni librojn. Ĝi restis mia hobio ankaŭ post la forpaso de Stanjo.
Ĝis nun mi eldonis kun mia ISBN 235 librojn kaj preskaŭ duono iel tuŝas Esperanton: aŭ ili estas skribitaj en Esperanto (originale aŭ tradukite), aŭ temas pri lernolibroj de Esperanto, vortaroj aŭ tradukoj el Esperanto (tiuj ĉiam kun klara indiko en la kolofono, ke temas pri traduko

el Esperanto). Kaj danke al la libroj en Esperanto mia eta eldonejo estas enskribita en la ĉeĥa libro de rekordoj kiel la eldonejo eksportanta proprajn librojn en la plej multajn landojn de la mondo.
Krom tiuj propraj eldonaĵoj ĝi produktas librojn ankaŭ laŭmende kun ISBN de aliaj eldonejoj aŭ individuoj. Mi povas mencii la lastajn tri eldonojn de PIV por SAT aŭ plurajn librojn por FEL, sed ankaŭ por neesperantistaj etaj
eldonejoj. Kiel ekzemplon mi indiku la eldonon de la lernolibro de la itala en la sveda. Tamen, se mi ricevas mendon de iu neesperantista kliento, ĉiam estas en la fono iu esperantisto, kiu min rekomendis. Ja apenaŭ iu kredus al nekonata eksterlanda eldonejo sen bonaj referencoj de iu, al kiu oni fidas.
Mia devizo dekomence estas ĉiam teni profesian kvaliton. Kiam mi ricevas demandon de iu nova kliento, mi neniam strebas doni la plej malmultekostan oferton, sed la plej favoran rilaton inter kvalito kaj prezo.
Dum iu intervjuo por ĉeĥa gazeto mi estis demandata, kiun el miaj eldonaĵoj mi pleje ŝatas. Mi respondis, ke mi ne povas indiki la plej ŝatatan libron, ĉar ĉiu manuskripto kaptis mian atenton, alimaniere mi ne eldonus ĝin. Sed, pli proksimas ĉemizo ol mantelo (laŭvorte el la ĉeĥa), mi do menciis, ke mi plej fieras pri mia Sen laco por paco, pri la vivo kaj verko de praga naskito kaj la unua ina nobelpremiito por paco Bertha von Suttner, eldonitan en Esperanto, kiu havas pozitivan eĥon kaj eĉ bone vendiĝas. Kaj momente al mi kaŭzas ĝojon la eĥo de mia plej freŝa libro *Ĉinio, Koreio, Japanio, la landoj similaj sed diferencaj*, pri tio kiel mi ekkonis ilin dum miaj relative oftaj vizitoj. Ĝin mi eldonis kaj en la ĉeĥa kaj en la Esperanto-versioj.
La 9-an de junio mi organizis (kunlabore kun la Unio de Ĉeĥaj Interpretistoj kaj Tradukistoj, kun kiu mi jam multajn jarojn kunlaboras) la solenaĵon omaĝe de la tridekjariĝo de mia eldonejo. Ĉeestis proksimume cent partoprenantoj, inter ili proksimume duono estis esperantistoj, eĉ el Slovakio kaj Germanio. En la ĉeĥa kaj en Esperanto kantis Jolana Haan Smyčková, aktorino kaj kantistino de la plej populara ĉeĥa malgrandforma teatro Semafor, filino de la operkantisto kaj esperantisto Miroslav Smyčka, kiu multfoje koncertis ankaŭ por esperantistoj.

Esperanto, n-ro 1370(7-8), Julio-Aŭgusto 2022

Unu ŝerco tage

Estas nia honoro prezenti al la legantoj novan libron de Michal Lebl kaj Mirka Tomečková.

Ŝercoj kaj gajaj rakontoj ĉiam estis ege popularaj; kiel rakontas al ni la historio – „jam en la antikva Grekio…“ Se ili estus en la libroj, certe tiuj estus multaj „sufiĉe grasaj volumoj“ – trafaj diraĵoj, aforismoj, anekdotoj kaj ŝercoj.
„Unu ŝerco tage“ estus nur malgranda volumo, se ilia kolektanto kaj aŭtoro Michal Lebl ne havus la bonegan ideon pri tri lingvaj variantoj. Kaj se la oportunaj desegnaĵoj de Mirka Tomečková ne pligrandigis ĝian enhavon – amuza, kiel bonaj karikaturoj supozeble estas. Mi volonte kontribuis mian lingvan provlegadon (la ĉeĥa, Esperanto).
Ni deziras, ke la legantoj multfoje „rid-eksplodas“ – tio estas la sola eksplodo, kiu skuos nian diafragmon kaj ne damaĝos nin, sed plaĉos same al nia korpo kiel al nia animo. Kelkfoje ni trovas la „verajn perlojn“ de la popola literaturo, kiujn ni bezonas ankaŭ en Esperanto.

Margit Turková

[...]

Bulteno, n-ro 2/2022

Helpu helpi 2022

Vlasta Pištíková

La 3-an de aŭgusto 2022 okazis jam la naŭa aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental' aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.
Estis kolektita mono por 39 brikoj!
La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj…
…kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.
Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke…
…kaj apartan dankon al pragaj, eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj denove ne hezitis sendi monon!!!

Bulteno, n-ro 2/2022

Virtuala kuro por Paraple

Vlasta Pištíková

En junio okazis unumonata karitata konkurso „Virtuala kuro por Paraple", kiun ankaŭ partoprenis teamo ESPERANTO. Dum la tuta monato partoprenantoj kuris, biciklis, piediris... diligente registris kilometrojn. Ĉar ili estis tre bravaj, la teamo ESPERANTO atingis la kvaran pozicion! Gratulon al ĉiuj! Dankon al ĉiuj!

Bulteno, n-ro 2/2022

La praga klubo festis sian 120-an datrevenon

Ekde la 11-a ĝis la 13-a novembro 2022 organizis la Esperantista klubo en Prago grandan feston memore al la 120-a datreveno de sia fondo. Internacian renkontiĝon kun prelegoj, promenoj, filmoj, kantado kaj bonaj manĝaĵoj partoprenis kvar dekoj da samideanoj de kvin landoj. Pri la sukcesa evento amplekse raportis la revuo *Starto* kaj ankaŭ Varsovia Vento en sia elsendo.

Bonveniga vespero en la centro Elpida

Vendrede la 11-an de novembro vespere proksimume duono de la partoprenantoj kolektiĝis en la centro Elpida en la kvartalo Holešovice (str. Jankovcova n-ro. 8b). Atendis ilin multnombraj bongustaĵoj preparitaj fare de volontuloj de la klubo E-mental'. Sekvis prelego de Petr Chrdle pri novaj libroj de KAVA-PECH kaj rakontado de Vlasta Pištíková (kun la helpo de Radmila Švejcarová) pri ĵusa vojaĝo de kelkaj E-mentalanoj en Italion. Fine Pavla Dvořáková kaj Josef Kalčík prenis en manojn siajn ukulelojn kaj ĉiuj komune kantis belajn Esperantajn kantojn.

Eduka promeno tra la urbocentro

Sabate la 12-an de novembro antaŭtagmeze preskaŭ ĉiuj partoprenantoj entreprenis sub la gvido de la prezidanto Tomáš Břicháček promenon tra la urbocentro (nome kvartaloj Nové Město kaj Staré Město) preter lokoj ligitaj kun la historio de nia klubo. Oni komencis en la klubejo Ve Smečkách kaj la sekvaj stacioj inkludis interalie iaman gastejon „U Štajgrů" (nun domo „U

Nováků“) en la strato Vodičkova, iaman gastejon „U Pštrossů“ en la strato Pštrossova, Žofín, kafejon „Louvre“ kaj iaman kafejon „Union“ en la avenuo Národní, Muzeo de Náprstek, domon en la strato Dlouhá, kie loĝis Jaroslav Šustr kaj lian iaman vendejon en la strato Benediktská. Pli da detaloj pri la vizititaj lokoj troveblas en aparta artikolo […].

Programo en la kafejo AdAstra

La ĉefa parto de la programo efektiviĝis sabate posttagmeze kaj vespere en la hejmeca kafejo „AdAstra“ proksime de Vyšehrad (str. Podskalská n-ro. 8).

Unue oni tagmanĝis. Poste Tomáš Břicháček alparolis la ĉeestantaron kun solena parolado, post kio tuj sekvis lia prelego pri la fondiĝo de la praga klubo. La dua preleganto estis Irek Bobrzak el Pollando, kiu informis pri la retaj elsendoj kaj jutubaj videoj de Varsovia Vento.

Anstataŭ atendata torto venis surprizo. Oni aranĝis sur tablo grandan nombron de kuketoj kun kremo kaj verdaj steletoj, kiuj kune formis la numeron 120.

Alfred Heiligenbrunner el Aŭstrio poste prelegis pri imunsistemo kaj vakcinado. Tomáš Břicháček projekciis kelkajn malnovajn mutajn filmetojn el la historio de la klubo. La lasta prelego, kiun preparis Petr Chrdle, temis pri la poetino kaj verkistino Eli Urbanová.

Post vespermanĝo la esperantista himno „La Espero“ malfermis la mallongan blokon nomitan „oficialaĵoj“. Dum ĝi estis unue legata la salutletero de la prezidento Miloš Zeman. Poste estis premiitaj kvin pliaĝaj merituloj de la klubo per dankesprimo pro longtempa laboro por Esperanto. Estis gesamideanoj Margit Turková, Libuše Dvořáková, Viktor Dvořák, Jindřich Košťálek kaj Petr Chrdle. Premiita estis ankaŭ la prezidanto Tomáš Břicháček pro vigla laboro por la klubo.

Plua programero estis projekciado de la Cimrmana teatraĵo *Murdo en salona kupeo* kun esperantlingvaj subtekstoj. La tradukon preparis Vlasta Pištíková, Jan Šebetovský kaj Petr Javorik.

Dume alvenis grava gasto, nome operkantistino Vanda Šípová, kiu aktoras en la opero *Sternenhoch*. Ŝi laudis Esperanton kiel bone kanteblan lingvon. Ŝi ankaŭ kantis fragmenton de la opero.

Dimanĉa adiaŭa promeno

Dimanĉe la 13-an de novembro matene oni renkontiĝis antaŭ la Kongresa Centro en Vyšehrad apud la Esperanto-ŝtono. En frosta vetero oni trinkis ion varman, kantis denove „La Esperon“ kaj fotis sin. Poste sekvis promeno tra Vyšehrad. Fina punkto en la programo estis tagmanĝo en la restoracio V Podskalí (str. Podskalská n-ro 29), kie oni danke al E-mental’ jam longe havas menuon ankaŭ en Esperanto.

Bulteno, n-ro 1/2023

El la solena parolo de Tomáš Břicháček

„... La datreveno, kiun ni festas, estas sendiskute impona kaj igas nin halti kaj retrospekti. La 9-an de novembro pasis jam 120 jaroj ekde la momento, kiam malgranda grupeto de pioniroj aŭdacis – unu jaron post la sukceso de la samideanoj en Brno – fondi Esperantan klubon en nia metropolo, la duan en nia lando.

La komencoj estis malfacilaj kaj modestaj, sed la movado rapide akiris decidemon kaj forton, kaj ne haltigis ĝin eĉ la multnombraj malfacilaĵoj, kiuj iom post iom estiĝis. La klubo travivis du mondmilitojn, la nazian okupacion kaj komunisman premon. En la tempo de grandaj ŝanĝoj post la novembro 1989 ĝi konservis la ritmon kaj finfine sukcese eniris la novan ciferecan epokon.

Inter pragaj esperantistoj ĉiam estis multaj kreemaj kaj intelektaj personoj (kiel Eli Urbanová, Jiří Karen, Čestmír Vidman kaj aliaj). Merite de ili riĉa kulturvivo formiĝis ĉirkaŭ la klubo tra la jaroj. Ekstaris ankaŭ multaj lertaj gvidantoj kaj organizantoj (kiel Jaroslav Šustr), sen kiuj la movado ne povus funkcii. Fine, ĉiam estis inter ni multaj bonaj, diligentaj, sindonemaj ordinaraj homoj, kies nomoj povas esti preskaŭ forgesitaj, sed kiuj vivis kaj spiris por la nobla ideo de la internacia lingvo kaj kiuj estis kaj estas la vera substanco de nia komunumo. Danke al ĉiuj tiuj tri specoj de homoj – kulturemuloj, organizantoj kaj entuziasmuloj – la Esperantista klubo en Prago ekzistas kaj estas forta ero de la ĉeĥa Esperanto-movado ĝis nuna tempo.
Ni rigardu la estontecon kun optimismo kaj kredu, ke en la venontaj jaroj la klubo havos eĉ pli da tiaj aktivaj kaj viglaj membroj kaj favorantoj. Ni deziru, ke Esperanto en Prago, en Ĉeĥio kaj en la tuta mondo vivu kaj prosperu plu kaj pli! ...“

Bulteno, n-ro 1/2023

Popřáli nám k výročí

Vážení a milí přátelé esperanta,
srdečně Vás pozdravuji při příležitosti 120. výročí založení vašeho klubu.
Mezinárodní jazyk esperanto mne vede ke krátkému zamyšlení. Svět, jak můžeme v současnosti sledovat, se rozděluje a vznikají nové příkopy a nová nepřátelství. Esperanto, jeho poselství, jde jiným směrem. Představuje společného jmenovatele lidstva, prvek, který jde proti rozdělení a sváru. Ano, je to vznešená myšlenka, která by měla inspirovat.
Přeji vám vše dobré, ať dál šíříte pozitivní záměr mezinárodního jazyka esperanto.

Miloš Zeman, prezident republiky

★

Milí esperantisté, blahopřeji vám k výročí Vaší velmi záslužné činnosti, která trvá již úžasných 120 let. Moc si vážím Vaší přízně a ráda patřím mezi Vás, i když jsem jen propagátorkou Vašeho jazyka. Oceňuji esperanto jako jazyk hodný poezie, jazyk nesmírně bohatý, jenž je schopný vyjádřit metaforu, základ básní a poetických textů. Nesmírně si vážím spolupráce s Vámi. Když přeji Vám do dalších let všechno nejlepší, hrozinek slov v sobě skrývá obdiv a úctu, všem dobré zdraví – víc málo toho zbývá. Zdraví nejsrdečněji

Věra Ludíková, básnířka, členka Obce spisovatelů

★

Pražský klub vznikl rok po brněnském – mimo jiné za účasti básníka S. K. Neumanna. Bohema Unio Esperantista v Praze vydávala časopis, v němž na pokračování vycházela v esperantu Babička. V roce 1921 se v Praze odehrál světový kongres esperanta, který se zapsal do historie hnutí založením SAT, a Karel Emanuel Macan uspořádal setkání nevidomých esperantistů a založil knihovnu slepecké literatury, která existuje dodnes. Po druhé světové válce přešla do Prahy Verda Stacio, jejíž nahrávka Rusalky se dochovala. Jaroslav Šustr rozšířil knihovnu klubu na největší u nás; dnes je uložena v Městském muzeu v České Třebové jako neodstranitelný majetek státu. Další světový kongres v Praze 1996 se zapsal Pražským manifestem. Nakladatelství KAVA-PECH vydává překlady do esperanta i z esperanta. Jména jako např. Šupichová, Pumpr, Mařík, Seemannová, Urbanová, Rumler, Karen jsou známá po celém esperantském světě. Máte na co být pyšní a na co navazovat, k čemuž Vám přeji hodně elánu a rozhodnosti.

Miroslav Malovec, redaktor *Starta* a *Paměti hnutí*

Milí esperantisté, celoživotně věřím na osudovou moc náhody. Bylo tomu tak i tentokrát. Když jsem se rozhodl pozdravit vás u příležitosti vašeho jubilea, zpracovával jsem právě pro revue

literatury faktu Přísně tajné! článek o osobnosti jménem Alfons Mucha. A tam se mi přímo pod ruku nabídla jeho myšlenka, kterou vyslovil v době, kdy na rozhraní 20. a 30. let minulého století bilancoval jednu z etap své světoběžnické tvůrčí činnosti. Napsal tehdy: „Účelem mého díla nikdy nebylo bořit, ale stavět a spojovat, neboť nás všechny musí živit naděje, že celé lidstvo se jednou sblíží, a to tím snáze, čím lépe se pozná a domluví navzájem.“ Moudře a s časovým nadhledem řečeno, že ano! Co víc lze k tomu dodat? Zejména dnes, kdy se ve světě víc boří, než staví a spojuje. Mnoho úspěchů vám přeje

Roman Cílek, spisovatel a nakladatel

★

Milí samideáni, nejsme organizace, nejsme instituce, nejsme „eseróčko“. Jsme rodina! Zůstaňme spolu a zůstaňme věrni té krásné myšlence. Zelená hvězda ať nám svítí!

Max Kašparů, řeckokatolický kněz, psychiatr, pedagog

★

Vážím si práce současných i minulých členů Pražského esperantského klubu, které osobně znám a které jsem poznala osobně. A fandím těm, kteří se neformálně podílí na práci Klubu a obdivuji jejich nápady a nadšení. Utvrzují mě v přesvědčení, že Zamenhofova myšlenka je správná a je ji potřeba udržet a rozvíjet. Přeji jim všem vytrvalost, zdraví a radost z práce.

Jindřiška Drahotová, Esperantský kroužek Dr. Hradila v Mladé Boleslavi

★

Pražský esperantský klub je jedním z našich nejstarších. V jeho řadách působili významní čeští esperantisté, kteří se nemalou měrou zasloužili o rozvoj našeho hnutí. Přeji všem jeho členům, aby i za dalších sto dvacet let někdo mohl říct stejně pochvalná slova!

Jiří Tomeček, předseda Českého esperantského svazu

★

V našem rozděleném světě, kde se příkopy mezi lidmi zdají být den ode dne širší, je třeba ocenit každý čin, jenž naopak pomáhá lidstvo spojovat a umožňuje mu nalézt společnou řeč. Esperanto je bezesporu jedním z těchto důležitých projektů. Již sto dvacet let jeho mluvčí usilují, abychom si přes to, že mluvíme různými jazyky, navzájem porozuměli. Proto bych jim rád vyjádřil poděkování, že se snaží svět udělat lepším místem, a popřál jim v těchto snahách mnoho úspěchů.

Tomáš Bandžuch, spisovatel

Esperanto. Už když jsem coby malý špunt ono slovo poprvé zaslechl v jakémsi historickém filmu, vyvolalo ve mně těžko určitelný pocit tajemna a starých časů. A to jsem prosím neznal jeho význam! Poté, co mi byl – myslím, že starším bratrem – vysvětlen, přišlo mně celé tohle esperanto strašně zajímavé. Netušil jsem, že takový jazyk existuje, a jeho znalci mi tehdy připadali coby zasvěcení „majitelé klíčů“, bezmála tajné bratrstvo, opečovávající jazyk nikoho a všech. V dnešní době izolovaných společenských bublin jsem navíc vděčný za každou pomyslnou slánku, kterou lze bubliny propichovat. Esperanto je podle mého jednou z nich. Vše nejlepší k vašemu jubileu! Ať se vám daří!

Marek Skřipský, spisovatel

120 let esperanta v Praze (Bulteno, n-ro 3/2022)

Eĥoj de la festo

Miroslav Malovec kiel partopreninto de la festo skribis pri ĝi longan raportaĵon kun fotoj (*120 jaroj de Esperantista klubo en Prago*). La teksto aperis en Starto n-ro 4/2022.
Varsovia Vento dediĉis al tiu evento grandan parton de sia 161-a elsendo. Speciala danko apartenas al Irek Bobrzak. La elsendo troveblas en la sekvanta ligilo: https://www.podkasto.net/2022/12/22/la-161a-elsendo/

Bulteno, n-ro 1/2023

Lokoj ligitaj kun la frua historio de nia klubo

Tomáš Břicháček

La 12-an de novembro 2022 dum la jubilea festo mi gvidis edukan promenon tra la centro de Prago, kiu estis dediĉita al la historio de nia klubo. Sube vi trovos notojn pri la plej gravaj lokoj, kiujn ni vizitis. Kontraste al la promeno, ĉi tie la lokoj estas ordigitaj ĥronologie.

1. Iama gastejo U Pštrossů

adreso: Pštrossova (eksa n-ro 196), proks. nunaj domoj 199/25 kaj 218/27, Nové Město (Nova Urbo)
GPS: 50.0793153N, 14.4155575E

- ĝi estis en duetaĝa domo (inkluzive teretaĝon)
- en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento ĝi estis detruita kaj anstataŭigita per modernaj altaj ludomoj (n-roj 199/25 kaj 218/27)
- la gastejo estis ŝatata kunvenejo de laboristoj / sidejo de *Politický klub dělnický v Čechách* (Politika Laborista Klubo en Bohemio)
- loko, kie en Prago Esperanto estis unuafoje propagata kaj instruata – de F. V. Lorenc, kiu iam en la komenco de la 90-aj jaroj de la antaŭpasinta jarcento prelegis pri la lingvo kaj poste gvidis kurson ĉi tie
- Stanislav Kamarýt skribas, ke la gastejo kaj sia „malgranda, longforma kaj fulgumita ĉambro gasteja ... estis la loko kaj okazejo de la Esperanta pratempo en nia lando" kaj aldonas, ke „eĉ se la tiea aktivado ne donis rimarkindan rikolton, apartenas al ĝi honora loko en la historio de la ĉeĥa kaj ĉeĥoslovaka Esperanto-movado."

2. Restoracio Konvikt

adreso: Bartolomějská 291/11, Staré Město (Malnova Urbo)
GPS: 50.0830722N, 14.4175581E

- en tiu ĉi fama, ĝis nun ekzistanta restoracio okazis la 20-an de junio 1902 la prepara kunveno por la fondo de la praga klubo
- partoprenis proksimume 10 personoj
- oni akceptis statuton kaj decidis sendi ĝin al la landa oficejo por aprobo
- la fondan kunvenon oni decidis kunvoki nur en aŭtuno, post la oficiala aprobo de la statuto
- pluaj detaloj pri la kunveno troveblas en la rememoroj de František Barth supre (p. 11)

3. Iama restoracio U Štajgrů

adreso: Vodičkova 699/30, Nové Město (Nova Urbo)
GPS: 50.0809094N, 14.4246419E

- tie la 9-an de novembro 1902 la klubo estis fondita

- restoracio „U Štajgrů“ troviĝis en duetaĝa (inkluzive teretaĝon) konstruaĵo en la loko, kie hodiaŭ staras la granda secesia domo „U Nováků“
- partoprenis 15 homoj
- oni elektis komitaton – la unua prezidanto fariĝis Eduard Weinfurter
- pluaj detaloj pri la kunveno troveblas en la rememoroj de František Barth kaj Stanislav Kamarýt supre (paĝoj 11–12)

4. Kafejo Union

adreso: Národní 342/29, Staré Město (Malnova Urbo)
GPS: 50.0824717N, 14.4188036E

- la unua sidejo (kunvenejo) de nia klubo – ekde ĝia fondo ĝis junio 1903
- ankaŭ poste okazis tie diversaj klubaj agadoj (ekzemple ĝenerala kunveno en februaro 1918)
- la kafejo troviĝis en la iama „Domo de Brauner“ en la angulo de la stratoj Národní kaj Na Perštýně, kie hodiaŭ staras la oficeja domo nomata „Albatros“
- ĝi estis la centro de la praga kultura vivo en la 19-a jarcento kaj en la unua duono de la 20-jarcento
- pli da informoj pri la kafejo troveblas en la rakontado de Stanislav Kamarýt supre (paĝoj 12–13)

5. Kafejo Tůmovka

adreso: Lazarská 10/4, Nové Město (Nova Urbo)
GPS: 50.0790478N, 14.4200911E

- kafejo „Tůmovka“ aŭ „Tůmova kavárna“ estis la dua sidejo de la klubo (post la kafejo „Union“) – ekde junio 1903 ĝis (iam en) la jaro 1905
- la eleganta ludomo, kie la kafejo troviĝis, ĉiam staras ĉi tie, sed la kafejo mem ne ekzistas jam jardekojn

✂ Stanislav Kamarýt: „[La] sidejo de la Klubo estis ŝanĝita. Ni transiris en la kafejon Tůmovka en la strato Lazarská. Ankaŭ ĝi estis kafejo de literaturistoj, sed sen fetiĉisma adorado de revuoj. La Klubo komencis kunvenadi regule ĉiusemajne en aparta ĉambro, malantaŭ la restoracio. La kunvenoj komenciĝadis post la 20-a horo, daŭris longe. Ni sidis ĉe unu laktokafo ĝis la 23-a, poste transiris la restintaj membroj en la restoracian salonon kaj konsumis la duan kafon. La prezidanto [Vojtěch Kraus], kvankam preskaŭ dudek jarojn pli aĝa ol mi, ŝatis ĉeeston de junuloj. La vizitoj de la kunvenoj fariĝis tre kontentigaj kun 20 – 30 partoprenantoj ĉiusemajne, iam eĉ pli. Venadis novaj homoj. Ni klopodis ĉe diversaj okazoj venigi homojn el diversaj elstaraj postenoj. Plurfoje ni sukcesis, sed iliaj vizitoj ne estis ripetataj. Komika rememoro mia estas pri vizito de d-ro Jiří Guth, la fama aŭtoro de trivoluma "Katekismo pri deca konduto en la socio". Li venis tre frue kaj - akceptite de ni kun dankaj honorigoj parolaj kaj observinte la neluksan salonon - diris, ke li venos post unu horo. Li ne venis plu.“

Kamarýt S.: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio

6. Muzeo de Náprstek

adreso: Betlémské náměstí 269/1, Staré Město (Malnova Urbo)
GPS: 50.0840425N, 14.4166072E

- ĉe la Muzeo de Náprstek funkciis en la epoko, pri kiu ni parolas, la Amerika Klubo de Damoj
- laŭ iniciato de tiu klubo nia membro Eduard Kühnl havis en marto 1904 enkondukan prelegon pri Esperanto, kiun sekvis kurso gvidata de li
- poste en decembro 1904 konstituiĝis ĉi tie ĉe la muzeo la Unua Virina Grupo Esperantista
- prezidantino iĝis Božena Studničková, instruistino kaj verkistino – la unua ĉeĥino, kiu verkis originalajn poemojn en Esperanto / animo de la grupo estis Matylda Krausová

7. Restoracio U Donátů

adreso: Spálená 110/53, Nové Město (Nova Urbo)
GPS: 50.0818558N, 14.4192047E

- la tria sidejo de nia klubo – ekde la jaro 1905 ĝis oni ne scias kiam – poste la klubo ŝanĝis multegajn kunvenejojn kaj ne eblas jam sekvi ilin
- anstataŭ tiama historia trietaĝa domo troviĝas en la loko hodiaŭ moderna alta domo (kun librejo kaj malnovlibrejo malsupre)

✂ Stanislav Kamarýt: „En 1905 la Klubo transmigris el Tůmovka en la restoracion U Donátů en la strato Spálená. [...] La vizitoj de la kunvenoj estis daŭre tre kontentigaj. La restoracio estis fama pro bona kvalito de sia biero. La konsisto de la membraro iĝis pli diversa, kaj laŭ la aĝo, kaj laŭ la socia pozicio."

Kamarýt S.: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio

8. Kafejo Louvre

adreso: Národní 1987/22, Nové Město (Nova Urbo)
GPS: 50.0821003N, 14.4187250E

- loko de la fondo de la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista
- ofta kunvenejo de la praga klubo en 30-aj kaj 40-aj jaroj

✂ Jaroslav Mařík: „Dum la nazia okupacio kelkaj fidelaj membroj, precipe Šustr, kunvenadis vespere, dum la estinta kutima kunven-tago, en nia iama ‚hejmo', la kafejo Louvre (Národní tř.), inter la aliaj gastoj, nur por interŝanĝi novaĵojn ktp. Post tempo la kelnero avizis nin, ke pasintfoje serĉis nin tie la gestapo kaj enketis la kelneron pri esperantistoj. Tiu rediris, ke neniuj kunvenadas en ilia kafejo. (Mi memoras inteligentan junulon nekonatan, kiu komencis venadi inter nin, kun aserto interesiĝi pri Esp-o. – Mi rekonis lin post jardekoj, kiam okazis (dum la komunisma reĝimo) ia studenta protesta kunveno apud la Mácha-statuo. Ĉu hazardo, aŭ ne – ĝi ja estis sub Petřín? Li aspektis kvazaŭ ruino...)."

Mařík, J: 90 jaroj de Esperantista klubo en Praha (fina parto), Bulteno de Esperantista Klubo en Prago kaj de Esperantista Klubo en Brno, n-ro 2/1993.

9. Žofín

adreso: Slovanský ostrov 226, Nové Město (Nova Urbo)
GPS: 50.0789711N, 14.4128133E

- en somero 1921 okazis ĉi tie la 13-a Universala Kongreso de Esperanto
- kun 2561 partoprenantoj el 35 landoj
- la palaco Žofín estis konstruita en 80-aj jaroj de la 19-a jarcento
- la kongreson alparolis interalie la ministro pri edukado Josef Šusta, ĉeestis Klara Zamenhof, vidvino de dr-o Zamenhof
- prezidanto Masaryk respondis al salut-telegramo de UK en Prago telegrafe: „*Capri la 4-an de aŭgusto 1921. Mi dankas pro salutoj al enlandaj kaj eksterlandaj kongresanoj. Mi deziras a1 via celado, servanta al progresema idealo sukceson. T. G. Masaryk.*"
- Edvard Beneš, ministro pri eksterlandaj aferoj en la salutletero al la UK skribis: „*La ideo de unu interkompreniga lingvo, kia estas Esperanto, estas grandvalora por ĉiuj sinceraj pacifistoj. Hodiaŭ ĝi ne plu estas utopio, sed problemo, pri kiu laboras intelektularo de la tuta mondo.*"

10. Domo de Šustr

adreso: Dlouhá 614/10, Staré Město (Malnova Urbo)

GPS: 50.0891356N, 14.4223250E
- ĉi tie loĝis Jaroslav Šustr – elstara esperantisto, multjara prezidanto de nia klubo (1931–1958) kaj ĝia honora prezidanto, honora membro de ĈEA, delegito kaj ĉefdelegito de UEA
- granda amo de Šustr estis la kluba biblioteko, kiun li daŭre ampleksigis. Li senlace havigadis al la klubo eksterlandan literaturon kaj gazetojn. Antaŭ la milito la biblioteko jam havis proksimume 1800 volumojn. Iom post iom ĝi kreskis. En la jaro 1969, kiam Šustr aldonis siajn proprajn librojn, ĝi jam konsistis el proksimume 4700 volumoj.
- detaloj pri Šustr trovebla en Bulteno n-ro 2/2019

11. Vendejo de Šustr
adreso: Benediktská (verŝajne 722/11), Staré Město (Malnova Urbo)
GPS: 50.0902153N, 14.4272233E
- iam en la tridekaj jaroj Šustr malfermis en la praga Dlouhá třída (Longa avenuo) vendejon de bongustaĵoj
- poste, eble jam dum la okupacio tiu vendejo translokiĝis al la najbara Benediktská strato, kie Šustr lasis desegni sur fasado (de la domo n-ro 9) grandan reklamon – ĝi rimarkinde restis tie ĝis nunaj tempoj
- la revuo Esperantista skribis poste pri la butiko, ke ĝi „*estis dum longa vico de jaroj kvazaŭ centra kunvenejo de esperantistoj el la ĉefurbo, el la provinco kaj el la fremdlando. Ĉiu veninto ricevis afablan informon; ofte ĝi signifis kuraĝigon; iam eĉ helpon materian al vojaĝanta samideano en embaraso. Ankaŭ tie, ne sole en la klubejo kaj en kluba administro, helpadis al li lia edzino, kiun ĉiuj esperantistoj konas kaj alte estimas.*“

Por promeno vi povas elekti ekzemple ĉi tiun sinsekvon de la stacioj: 3 – 5 – 1 – 9 – 7 – 8 – 4 – 2 – 6 – 10 – 11

Bulteno, n-ro 1/2023

Ni esperantistoj devas fari ĉiu laŭ siaj ebloj

Fina parto de la intervjuo de Irek Bobrzak kun Petr Chrdle en la 161-a elsendo de Varsovia Vento:

Petro, ia mesaĝo de vi por la esperantistoj en la mondo... Ĉu vi havas tion en koro? Kion vi ŝatus diri al homoj en la mondo, al la esperantistaro?

Do mi estas maljunulo, do tio signifas, ke maljunuloj devus verŝi saĝecon. Sed mi ne tiel alte taksas min.
Mi havas de juneco mian propran sloganon, kiu sonas: *Kio estas alirebla, tio ne logas min. Per preterpaŝo ni kreskas.*
Mi ne scias, ĉu estas klare, kion mi volas diri. Sed tion mi volas mesaĝi al la esperantistoj. Ĉar multaj esperantistoj diras, ke Esperanto estas mortanta kaj ke ne plu valoras fari ion por ĝi, ktp. Sed tio ne estas vero. Mi kredas, ke Esperanto havas sian estontecon. Sed tiu estonteco dependas de ni esperantistoj. Kaj ni ne atendu, ke iu registaro aŭ EU aŭ iu ordonos, ke oni lernu en lernejoj Esperanton. Ne, ne. Ni esperantistoj devas fari ĉiu laŭ siaj ebloj. Do mi estas eldonisto, do mi strebas krom la ĉeĥajn eldonadi ankaŭ Esperanto-librojn. Se iu estas kantisto kaj esperantisto, li kantu ankaŭ Esperante. Se iu estas desegnisto, faru ilustraĵojn en Esperanto-verkojn. Kaj tiamaniere ni komune zorgu, ke Esperanto vivu, vivu kaj floru.

Bulteno, n-ro 1/2023

2023

05/01/2023 – diskuto pri eĥoj de la 120-a datreveno de la klubo en E-amaskomunikiloj *(kunvenejo)*

12/01/2023 – aperis Bulteno n-ro 1/2023

14/01/2023 – komuna renkontiĝo omaĝe al beata Odoriko organizita de la Instituto de renesanco de kultura heredaĵo kun ĉeesto de multaj pragaj klubanoj kaj aliaj esperantistoj *(preĝejo Panny Marie Sněžné)*

02/02/2023 – prezentado de Tomáš Břicháček pri la konstitucia rolo de la prezidento de la respubliko *(kunvenejo)*

16/02/2023 – prezentado de Tomáš Břicháček pri vojaĝo de ĉeĥaj esperantistoj al Krimeo en 2007 *(kunvenejo)*

02/03/2023 – traduka kaj muzika seminario, dum kiu oni kompletigis tradukojn de la kantoj *Vltavo, Vltavo* de Karel Hašler kaj *Kulhavá kobyla* de Vilda Dubský *(kunvenejo)*

16/03/2023 – prelego de Tomáš Břicháček pri la poeto Josef Rumler *(kunvenejo)*

30/03/2023 – prelego de Petr Chrdle pri la paraleloj inter Komenský kaj Zamenhof *(kunvenejo)*

13/04/2023 – Leonarda Chaloupková kaj Vlasta Stará prezentis kun lumbildoj la agadon de la Esperanto-klubo Benešov *(kunvenejo)*

27/04/2023 – prezento de Petr Chrdle pri du novaj libroj de sia eldonejo: *Sadako volas vivi* kaj *Mia vivo kun Esperanto (kunvenejo)*

25/05/2023 – muzika vespero kun Pavla Dvořáková – unue prelego pri muzikaj komponistoj-esperantistoj, poste kuna kantado kun ukulelo *(kunvenejo)*

22/06/2023 – prezentado de Vlasta Pištíková pri siciliaj lokoj ligitaj kun la komisaro Montalbano *(kunvenejo)*; vizito de du brazilo-usonaj gastoj (Hermes kaj Marcia Illana)

12/09/2023 – Vlasta Pištíková, Jan Šebetovský kaj Petr Javorík transdonis al Zdeněk Svěrák Esperantan tradukon de la teatra ludo *Vražda v salónním kupé*

12/10/2023 – muzika vespero kun Pavla Dvořáková – unue prelego pri Profesiaj vidartistoj-esperantistoj, poste kuna kantado kun ukulelo *(kunvenejo)*

26/10/2023 – aperis Bulteno n-ro 2/2023

09/11/2023 – prelego de Tomáš Břicháček pri la fondiĝo de nia klubo en la jaro 1902 (kunvenejo)

23/11/2023 – prelego de Margit Turková pri la radikoj de la konflikto en Izraelo / Palestino (kunvenejo)

07/12/2023 – prezento de Vlasta Pištíková pri E-mentala vojaĝo al Sicilio en novembro 2023 (kunvenejo)

08/12/2023 – aperis Bulteno n-ro 3/2023

14/12/2023 – Zamenhoftago – tradicia kunveno ĉe Esperanto-monumento en Vyšehrad kun tosto, torto, kantado kaj amikeca babilado

21/12/2023 – Kristnaska vespero *(kunvenejo)*

Kiel po-ŝtup-umas „la afero Altior“

Margit Turková

(Raporto de praga klubanino)

Parto 1

Senteble la aĵo (afero), kiun ni tiel nomu, jam tiom enradikiĝis en nia esperantista klubo, ke ĝi meritas certan resumigon…

1. Jen: de la 24-a de novembro 2022, kiam en nian klubejon envenis du viroj – Vladimír Liščák (sinologo, akademiano) kaj Jiří Altior (multlertulo, kiel montriĝis), por prezenti al ni sian grandiozan projekton „Institut renesance kulturního dědictví“ (Instituto de renesanco de kultura heredaĵo), kaj esprimi seriozan intereson pri Esperanto, jam pasis tempo.

De tiam ni havas en nia „komuna konto“ kelkajn aferojn. Tiujn mi nun sternas antaŭ niaj legantoj.

2. Vizito de l'Altioranoj (plue nur l'A) en nia Muzeo en Svitavy, kie ili eksciis, ke Esperanto ankaŭ estas nacia heredaĵo, kiun ni tie kultivas. Tie ankaŭ okazis la plej grava paŝo – reciproka konatiĝo de ili kun niaj movad-funkciuloj (la prezidanto, la vic-prezidantino, la prizorgantoj de la Muzeo).

3. Epifanan (tříkrálový) koncerton l'A tradicie organizis en la preĝejo de St. Matiaso, (kiu troviĝas en la praga kvartalo Hanspaulka). Ke l'A serioze kaptis nian Lingvon, pruvis ilia koncertprezentado: kelkajn kristnaskajn kantojn kaj karolojn ili kantis en Esperanto. Se en la punkto 1. ni prezentis du virojn, nun estas la vico diri, ke la kolektivo havas pli multajn anojn – ili ĉefe okupiĝas pri muziko (instrument-ludo, kantado), kaj ke ties estrino estas Beata Altior (edzino de Jiří A).

Pri muziko ŝi okupiĝas profesie. Jenan eventon vizitis kelkaj pragaj esperantistoj.

4. Sur fono de la eldiritaj informoj, la plua estas eĉ pli surpriza! Enkadre de niaj malmultamasaj E-societoj ĝi sendube meritas la epiteton „grandioza“.

La 14-an de la januaro 2023 – (okaze de la morto-tago de beata Odoriko), okazis komuna renkontiĝo. La Fratoj franciskanoj – Minoritoj bonvenigis nin en la refektejo de sia monaĥejo (certe danke al bonaj rilatoj kun **l'A),** kiu apartenas al la apuda preĝejo (P. Marie Sněžné); tie okazis la solena meso, omaĝe al Odoriko, kiu estas patrono de la franciskana frataro (origine en la norda parto de Italio, Pordenone, naskiĝloko de la beatano).

Ĉar ni jam en niaj presaĵoj skribis pri la evento, nun ni ne ripetu la abundan programon de ĝi… Ni nur igas la legantaron imagi, ke ĝi havis multajn punktojn, se ĝi daŭris de la 15-a-ĝis 22-a horo. Ĝi konsistis el paroloj, instrument-muzikeroj, kantoj, (multaj en E!), video-prezentaĵoj, filmo – tio en la flanko de niaj gastigantoj. Same riĉa je programpunktoj estis la Esperanto-parto: niaj ĉefuloj flue kaj klare informis la aŭditorion pri nia movado – estis prelego (pri S.Schulhof), estis E-vikipedio, estis teo-festivalo en Ĉinio). Oni povas esperi, ke tiu ĉi evento fariĝis bazo de nia eventuala plua kunlaboro.

5. Intertempe J. A. vizitis la EK en Pardubice (ni tion vidis en INFORMILO) – kie fakte fontas (kaj kien celas) lia ideo pri la menciita projekto de la Instituto.

6. Poste okazis personaj kontaktoj de E-funkciuloj (kaj pragaj, kaj asociaj), en la hejmo de Altior-familio.

7. El tio tute nature disvolviĝas la agado, kiu senĉese estas bezona: ekzerci la Lingvon. Tio okazis en la Esperantista klubo en Prago, kiun vizitis la estimata Beata A. (kun sia gitaro). Aktuale ni tradukis kelkajn kantojn (laŭ ŝia deziro), kaj tuj ni provis la kantadon; ĝin akompanis gitar-ludo (B.A.), kaj ukulelo-ludo (de Tomáš Břicháček), kiu estas hobio-interesiĝanto en muziko kaj kantoj. Eble ni povas baldaŭ ĝoji aŭskultonte la „UKULELO-TRIOn“ (Tomáš Břicháček, Josef Kalčík, Pavla Dvořáková). Nur trovi la okazon por tio…

8-a estas la vico de mia persona „riporto“ … (B.v. havi paciencon).

Mi ricevis invitilon por partopreni, je la 18. 2., nun omaĝe al la St. Matiaso-nomo, en la preĝejeto, pri kiu jam estis mencio. Ĉar mia nepo nomiĝas Matiaso, ĉar estis bona vetero kaj ĉar tiu ĉi parto de Prago estas aminda kaj vizitenda, mi decidiĝis. Por la nesciantoj – La preĝejo estas famkonata pro siaj mesoj kaj kermesoj omaĝe al la sanktulo, kiuj iras profunden en la historion. (En nia epoko el tio restis nur foiregoj kun amas-ludiloj, en la Parko-Holešovice. Sed ni revenu al Hanspaulka). Ĉi-nune la grupo de l'A disponigis sian talenton al la afero de religia-komunumo, en kies socia kadro ĝi jam sufiĉe longe noble kunlaboras. Ni, la vizitantoj, ĝuis la meson, kaj poste la koncerton (estris B. A.). Jiří A. sciigis nin pri la historio de la evento (de la 18-a jrc).
Poste ili eĉ min prezentis al la vizitantoj – kiel reprezentanton de Esperanto – kio estis akceptita per sincera aplaŭdo. La amikeca renkontiĝo daŭrigis en apuda paroĥejo. Tie estis preparita frando-manĝo kun teo (ili estas „teo-adorantoj"). Kiu kredas „hazardon", do sciu, ke hazarde tie ĉi troviĝis jena grava persono: la ano de la urba konsilantaro en Svitavy (ne kiel delegito, sed private). Jiří klarigis al li siajn (niajn!) planojn kaj intencojn. Kaj la reprezentanto promesis de sia flanko fari por ni ĉion, kio estos akceptebla por la urbo. En tiel esperplena perspektivo nia kunveno finiĝis…
La l'Altioranoj surloke decidiĝis fariĝi faka sekcio de la Ĉeĥa Esperanto- Asocio. Tio estas por nia korporacio certe plezuriga afero. Ĉar almenaŭ Jiří A. estas serioza interesiĝanto pri E. kaj instigas nin okupiĝi pri nia ĉefa celo – kultivi la Lingvon (kion ni nun malofte faras).

Parto 2
Kaj la tempo fluas…
Kaj mi povas daŭrigi pri la temo entute aktuale. Ĉar mi partoprenis jenan gravan aferon **– La 90-jaran jubileon de la Esperanto-klubo en Svitavy** (8.9.-10.9.). La afero havis kompreneble unuavice Esperanto-koncernan parton (sed pri ĝi mia riporto ne estu).
Nia temo estas l'A. La admirinda kolektivo konvinkis nin, ke ĉiuj ĝiaj anoj estimas Esperanton. Certe danke al la estro Jiří Altior, kiu fariĝis serioze respondeca esperantisto. Duonjare kunlabore prepariĝis (kun la EK S.) la arta programo por omaĝi la jubileo-aferon.
SABATO

1. La geedzoj A. (Jiří, Beata) direktas ankaŭ siajn infanojn por akcepti Esperanton serioze. La infanoj ne nur partoprenadas, sed aktivas – ilia filo Damian (16 j.) malfermis la programon per „teo-ceremonio", kiun li kultivas jam de sia eta-infanaĝo.
2. La sabata vespero sonis per kantoj, ĉu ĉeĥaj, ĉu Esperantaj. Elstara prezento de malgranda muzikgrupo – la (bel)kanto, violono – Beata A. (profesie muzikistino), kaj aliaj (pardonu, ke mi ne mencias ilin nome!). Kantpartoprenis ankaŭ ni, aŭditorianoj – ĉar ni havis en la manoj la tekstojn tradukitajn Esperanten. Nun mi elstarigu la ĉeĥajn tradukojn de Jiří A. !!!. Sed eble ankaŭ Esperantaj tradukoj de niaj klubanoj (Turková, Břicháček) ne sonas malbele – opiniu vi mem:

   VLTAVO, VLTAVO (Karel Hašler)
   Pod skálou, na níž stál Vyšehrad,
   ku Praze valí se řeka.
   Já bych se zeptal jí tolik rád,
   co na mě ve světě čeká.
   Nikdy se ničeho neleknu,
   třeba jsem na světě rád,
   na břehu pod skalou pokleknu,
   budu se pokorně ptát:

   Vltavo, Vltavo, vodičko hluboká,

pověz mi, co bude do dne a do roka,
pověz mi, co voda přinese,
pověz mi, co voda odnese ?
Řekni mi, kolikrát země se otočí,
než český dragoun si na koně vyskočí.
Kdy z noci odejde ošklivý sen,
Kdy se zas rozbřeskne den

VULTAVO, VULTAVO (Karel Hašler)
Sub roko de reĝa Vyšehrad
Larĝega fluegas river'
Korpreme demandojn mi vokas:
Gvidos min tra l'vivo Esper'?
Sur la bord' kliniĝas humile
Fascinas Panoramo,
Kuraĝon esprimas ĝentile,
Koron plenigas Amo

Vultavo, Vultavo
Profunda rivero
Vi estas, Vultavo
Vejno de l'Espero
Diru vi, kion vi alportos
Diru vi, kion vi forportos
Kelkfoje dum jaroj
La Tero turniĝos
Ĝis en la Patrujo
Espero naskiĝos
Ĝis la nokta koŝmaro perdiĝos
Ĝis la Suno leviĝos
Vultavo fluas kaj silentas, ne zorgas pri mia voko
desude norden ĝi eskapas preter la altega roko.
Ĉiam al obstakloj rezistos la river' de mia kor'.
La roko staros kaj rezistos, neniu movos ĝin for.

3. DIMANĈO
   Ni rememorigu, ke dekomenca punkto estis la omaĝo de beata Odoriko. La biografion de la monaĥo verkis Vladimír Liščák, ano de la Ĉeĥa akademio (danke al ĝi li doktoriĝis), kiu la volumon al ni prezentis. La unua paŝo estis farita je la 14-de januaro (vidu supre), la dua estis farita ĝuste en Svitavy. La akademiano mem havis prelegon pri la beata Odoriko; sed ne nur tion: ni eĉ spektis filmon, kiu estas kreita laŭ la menciita libro (la reĝisoro: Jan Eliáš Svatoš).
4. La jubileon pintis la „Himno omaĝe al beata Odoriko" kiun ni ĝuis dum la koncerto, kiu okazis dimanĉe, je la 14a, en la baroka preĝejo. Spirhaltiga prezento de koncertgrupoj el Prago (LA VOJO DE MELODIO – estro Stanislav Mistr, PRAŽŠTÍ PĚVCI – estro Beata Altior). Admirinde klare kaj ĝuste sonis Esperanto el iliaj voĉoj!
   Ni rememorigu la buntan programon (kaj laŭimage ĝuu ĝin):
   1. *Ludvík L. Zamenhof@Félicien Menu de Ménil:* ***La Espero***
   2. *Ján Valašťan-Dolinský@arr. Vojtěch Frank:* ***Ne iradu preter ni !***
   3. *Ján Valašťan-Dolinský@arr. Vojtěch Frank:* ***Estas ja domaĝe***

4. arr. Jan Fila: ***Inclitum Patrem*** *(hymnus)*
5. Vojtěch Frank: ***Nokto*** *(premiera)*
6. Jan Fila: ***Himno omaĝe al beata Odoriko*** *(premiera)*
7. John Willams@Antonín Pevala: ***Schindler list***
8. arr.Vladimír@Ugodin *Jan Fila:* ***Ani ma'amin***
9. Leonard Bernstein: ***Chichester psalms***
10. Stanislav Schulhof@Vojtěch Frank: ***Nový duch se rodí po vší zemi***

Finfine fine: La supre menciita urbano de Svitavy – Libor Dynka --plenumis sian promeson: teknikon-koncerne li faris ĉion, por ke nia komuna evento restu konservita por la rememoro de historio. Dankon!

Bulteno, n-ro 2/2023

Moviĝante por Paraple kaj Helpu helpi

Vlasta Pištíková

Moviĝante por Paraple

Dum 25 tagoj – de la 1-a ĝis la 25-a de majo 2023 – 39 esperantistoj aktive partopenis karitatan konkurson „Moviĝante por Paraple" por subteni korphandikapulojn. Ili diligente marŝis, biciklis, kuris kaj fine ili komune atingis 7468,854 km.
Ne sufiĉis tio por la unua loko, sed esti la sesa el 312 teamoj estas bonega.
Unuopaj partoprenantoj estis tre sukcesaj kaj eĉ ses el ili finis en la unua deko. La plej bona estis Martin Vávra, kiu estis la dua piedmarŝanto. Li sukcesis kolekti 582,2 km kaj antaŭigi pluajn 93 piedmarŝantojn. Gratulon al Martin! Kaj gratulon al ĉiuj partoprenantoj!

Helpu helpi

La 21-an de junio 2023 okazis jam la deka aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental'aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago.
Estis kolektita mono por 51 brikoj!
La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.
Grandan dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj helpis surloke kaj apartan dankon al pragaj, eksterpragaj kaj eksterlandaj bonkoruloj, kiuj denove ne hezitis sendi monon!!!

www.e-mental.cz

Ankaŭ ĉi-jare KAVA-PECH ne pigras

Petr Chrdle

Ekde la komenco de ĉi tiu jaro la eldonejo KAVA-PECH eldonis jenajn librojn en Esperanto aŭ ligitajn al Esperanto:
La jam anoncita eldono de ***Sadako volas vivi!*** verkita de Karl Bruckner en perfekta traduko de Jan Duda finfine aperis. La vorto *finfine* taŭgas, ĉar estis problemoj kun la akiro de la kopirajto,

kiun ni tamen sukcesis venki. Temas pri romanstile prilaborita vera okazado de japana knabino Sadako Sasaki, kiu travivis la atombombadon de Hiroŝimo sen videblaj vundoj, tamen post 9 jaroj ŝi mortis pro leŭkemio, malsano kaŭzita de radiado.
Bluaj neĝoj de Piotr Bednarski en traduko de Ewa Grochowska estas plia ero en la vico de la kontraŭmilitaj libroj de KAVA-PECH. Temas pri aŭtobiografiaj rakontoj de travivaĵoj de la aŭtoro, nun fama pola verkisto, tiam juna knabo, kiu estis dum la dua mondmilito deportita kun la gepatroj al Siberio. Li ĝisvivis la liberecon preskaŭ mirakle, la sola el la tuta familio. La titolo rilatas al la koloro de la neĝo je temperaturo de minus 40 gradoj de Celsio.
La lasta vojaĝo de Cesaro kaj aliaj noktaj aventuroj estas finalistaj noveloj de la Interkultura Konkurso. La kolekto prezentas la rezulton de la konkurso: 37 finalistajn novelojn elektitajn inter 421 konkursaĵoj. Ĉiuj estas prezentitaj en Esperanto kaj ankaŭ en la originala lingvo tiuj, kiuj ne estas verkitaj en Esperanto (franca, itala, rusa, ukraina).
Ekster la limoj. Apokrifoj estas la apokrifaj kristanaj rakontoj, kiuj ne eniris en la Biblion. Ĉiujn tradukis Gerrit Berveling. Fine estas envicigita riĉa bibliografio de Berveling, kaj liaj verkoj, kaj tradukaĵoj.
En la muziko estas la vivo de ĉeĥoj verkita de Jan Duda estas bazita sur la prelego de la aŭtoro prezentita dum la UK en Prago en la jaro 1996. Ĝi koncize, sed trafe resumas la evoluon de muziko en Ĉeĥio kune kun priskribo de elstaraj ĉeĥaj komponistoj fronte de Smetana, Dvořák, Janáček kaj aliaj. Kiel titolon la aŭtoro elektis citaĵon de la komponisto Bedřich Smetana.
Fine mi prezentas ankaŭ proprajn librojn, ĉe kiuj mi estas ne nur eldonisto, sed ankaŭ aŭtoro. En ili mi resumas mian ĝisnunan poresperantan kaj peresperantan laboron. Ambaŭ enhavas multajn nigroblankajn fotografaĵojn.
Mia vivo kun Esperanto enhavas kvar partojn: A, kiu priskribas mian Esperantan karieron kiel funkciulo de pluraj Esperanto-organizaĵoj, sed ankaŭ kiel ĝia profesia utiliganto. Ĝi montras kaj seriozajn, kaj gajajn rememorojn, ofte lernigajn. Parto B konsistas el elektitaj fragmentoj el miaj verkoj kaj diversaj artikoloj el Esperanto-gazetaro. Parto C montras bibliografion rilatantan al Esperanto kaj parto D specimenojn de la oferto de mia eldonejo.
Život s esperantem (Vivo kun Esperanto) estas celanta la neesperantan publikon, tial ne temas pri Esperanto-versio de la antaŭa, sed tute diferenca libro, kvankam preskaŭ ĉiuj bildoj estas la samaj. Ĝi enhavas tri partojn kaj kvar aldonaĵojn. Parto A estas laŭstrukture la sama kiel tiu en Esperanto, tamen la teksto estas kongruigita al la celgrupo de legantoj. La parto B enhavas pli frue aperigitajn artikolojn rilatantajn al Esperanto en la ĉeĥaj periodaĵoj (unu en la slovaka), la parto C specimenojn de la eldonita literaturo. Aldonaĵojn kreas unue Kompleta gramatiko de Esperanto laŭ Henri-Sébastian Erhard en traduko de Dagmar Chvátalová kaj Marek Blahuš, due kelkaj esprimoj en Esperanto kun la ĉeĥaj tradukoj, trie la Akademio de Esperanto (priskribo de ties taskoj) kaj kvare Rekomenditaj interretaj portaloj por pliaj informoj.
[...]

Bulteno, n-ro 2/2023

Tradukita teatraĵo

Vlasta Pištíková

La 12-an de septembro 2023 kunvenis tri membroj de E-mental' (Jan Šebetovský, Vlasta Pištíková kaj Petr Javorik) kun Zdeněk Svěrák kaj transdonis al li Esperanto-subtekstojn por la teatraĵo *Murdo en salona kupeo*.
La *Murdo en salona kupeo* estas teatraĵo, kiun prezentas teatro de Jára Cimrman. Aŭtoroj estas Zdeněk Svěrák, Ladislav Smoljak kaj Jára Cimrman – fiktiva ĉeĥa geniulo. Enhavo iom similas al la fama verko de Agatha Christie *Murdo en la Orienta Ekspresstrajno*.

Zdeněk Svěrák akceptis la tradukon (sur KD kaj ankaŭ sur la USB-poŝmemorilo). Li estis plezurigita pro la laboro kaj dankis. Volonte li lasis sin foti kun Esperanto-flago.
La *Murdo en salona kupeo* estas jam la dua teatraĵo, kiu estis tradukita en Esperanton. La unua estis *La konkero de la Norda Poluso* kaj ĝi estis transdonita al Zdeněk Svěrák en la jaro 2017. Kiel la tria teatraĵo por traduki estis elektita *Longulo, larĝulo kaj miopulo*. La tradukanta triopo jam komencis labori kaj ili esperas, ke kvankam la teksto estas tre malfacila, la traduko estos same sukcesa kiel en antaŭaj teatraĵoj.

www.e-mental.cz

Překlad hymny La Espero do češtiny

Náš nový člen Jiří Altior překvapil na podzim 2023 klub povedeným překladem hymny La Espero, který připravil spolu s Milošem Lukášem.

Nový duch se rodí po vší Zemi,
světem mocné volání se nese,
posílené vánku perutěmi,
ať po širém kraji rozlétne se.
Nemá touhy po krvavých zbraních,
chce být tmelem všelidskému rodu,
světu, který tolik válek zažil,
harmonickou nabídnout chce shodu.

Pod posvátným znamením naděje,
šikují se míru bojovníci,
společná věc rychleji se děje,
když se snaží lidé doufající.
Mocné hradby stojí věky celé,
tisíce let lidstvo rozdělují,
nezadrží nápor lásky svaté,
nakonec se její vahou zřítí.

Neutrální jazyk základem je,
k vzájemnému porozumění si,
když ve shodě dílo k cíli spěje,
propojí se kruhy rodinnými.
Potom píle uvnitř společenství,
dodá sil při práci v prospěch míru,
ať sen krásný o společném lidství
požehnaných dosáhne svých cílů.

Lasta ĉi-jara eldonaĵo de KAVA-PECH

Petr Chrdle

La 7-an de decembro aperas la lasta ĉi-jara eldonaĵo de KAVA-PECH: *Mi venos kvazaŭ la morto* de juna talentita kosova poetino Donika Dabishevci. El la albana originalo ĝin tradukis Bardhyl Adam Selimi. La aŭtorino estas aprezata de kritikistoj kiel la plej potenca virina voĉo de la lastaj jardekoj. Temas pri erotikaj poemoj, en kiuj ŝi kantas pri la amo: la amo kiel viva celo, kiel travivaĵo, kiel stato, kiel sperto, kiel legitimigo de la vivo mem, de nia ekzisto. Ŝia virino estas soifa kaj malsata por la amo, virino, kiu allogas, estas decidema ricevi tion, kion ŝi volas, rabia, arde brulanta en la amoro, kiu post la plenumiĝo de sia dominanteco povas forlasi vin. Tial la sindoniĝo al la amora sovaĝa pasio laŭ la virino en ĉi tiuj poemoj estas neevitebla. Ĝi venas kvazaŭ la morto kaj neniel vi povas eskapi de ĝi. Do, ĝi venkas!
Per la libro Mi venos kvazaŭ la morto vi navigos tra la aspraj ondoj de la amo, de la pasio, de la ardiĝanta emo, tra la poemoj je alta artisma nivelo.

Bulteno, n-ro 3/2023

2024

04/01/2024 – Jiří Altior projekciis videojn el koncertoj, kiuj okazis dum la Jubileo de 90 jaroj de Esperanto en Svitavy en septembro 2023 *(kunvenejo)*

18/01/2024 – prelego de Tomáš Břicháček pri la historio kaj nuntempo de la praga Bulteno *(kunvenejo)*

26–28/01/2024 – festo „25 jaroj de E-mental'" en Velké Pavlovice

01/02/2024 – la unua parto de prelego de Margit Turková pri spiritismo *(kunvenejo)*

15/02/2024 – la dua parto de prelego de Margit Turková pri spiritismo *(kunvenejo)*

25/02/2024 – tradicia E-mentala aranĝo Bestĝardeno

02/03/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 1 en Brno

14/03/2024 – prelego de Margit Turková nomita „Omaĝe al nia Lingvo Amuzige – Amuzeme – Amuzcele" *(kunvenejo)*

15–17/03/2024 – E-mentala ekskurso al Graz

22/03/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 2 en Pardubice

28/03/2024 – prelego de Margit Turková nomita „2024 – la jaro de la ĉeĥa muziko"; festo de Verda ĵaudo kun verda biero

11/04/2024 – prelego de Tomáš Břicháček nomita „La lastaj 10 jaroj de nia klubo en retrospektivo" *(kunvenejo)*

13/04/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 3 en Ostrava

19–21/04/2024 – E-mentala aranĝo 19-a BIERo en Břeclav

25/04/2024 – prelego de Pavla Dvořáková pri esperantistoj-muzikistoj / muzika vespero *(kunvenejo)*

01–20/05/2024 – E-mental' partoprenis Virtualan kuron por Paraple

23/05/2024 – diskuto kun la verkisto Martin Petiška kaj publika lanĉo de Esperantaj tradukoj de du libroj de lia patro Eduard Petiška: *Malnovgrekaj mitoj kaj legendoj* kaj *Golemo kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago*

25/05/2024 – E-mental' partopenis Kuron por Paraple

06/06/2024 – prezentado de Vlasta Pištíková pri Kalabrio *(kunvenejo)*

08/06/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 4 en Česká Třebová

20/06/2024 – prelego de Margit Turková nomita „Marjorie Boulton humore" *(lasta aranĝo en la kunvenejo Ve Smečkách)*

24/06/2024 – translokiĝo el la klubejo Ve Smečkách al la nova klubejo en Revoluční 5 – volontuloj translokigis klubajn havaĵojn

13/07/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 5 en Šumperk

31/07/2024 – tradicia E-mentala aranĝo Helpu helpi

31/08/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 6 en Svitavy

12/09/2024 – prelego de Eŭheno Kovtoniuk pri UK-o en Aruŝa kaj ekspozicio de liaj fotoj *(unua kunveno en la nova kunvenejo en la strato Revoluční)*

21/09/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 7 en Benešov

26/09/2024 – prelego de Jiří Tomeček kaj Miroslava Tomečková pri UK-o en Aruŝa *(kunvenejo)*

05/10/2024 – E-mentala aranĝo Ĝuu EsperantoN 8 en Přerov

10/10/2024 – solena rememorigo de la forpasinta Stanislav Krajíček / prelego de Tomáš Břicháček pri klimata terminologio *(kunvenejo)*

11–13/10/2024 – E-mentala aranĝo Vinkelo en Velké Pavlovice

24/10/2024 – prelego de Petr Chrdle kaj Josef Kalčík pri la informado pri Esperanto *(kunvenejo)*

07/11/2024 – prelego de Tomáš Břicháček pri lokoj ligitaj kun la komencoj de Esperanto en Prago *(kunvenejo)*

21/11/2024 – prelego de Pavla Dvořáková „Surspure de doktoro Zamenhof – en la polaj banlokoj"; poste kuna kantado kun ukuleloj *(kunvenejo)*

30/11–01/12/2024 – E-mentala aranĝo Kristnasko 2024

05/12/2024 – prelego de Josef Kalčík pri tio, kiel la Ĉeĥa Esperanto-Asocio propagadas Esperanton *(kunvenejo)*

07–08/12/2024 – E-mentala aranĝo 10-a Granda lokŝumado en Bratislavo

12/12/2024 – Zamenhoftago – tradicia kunveno ĉe Esperanto-monumento en Vyšehrad kun tosto, torto, kantado kaj amikeca babilado

14/12/2024 – E-mentala aranĝo 9-a Antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio en Leipzig

19/12/2024 – Kristnaska vespero *(kunvenejo)*

La lastaj 10 jaroj de nia klubo en retrospektivo

La 11-an de aprilo 2024 okaze de la 10-a datreveno de la nuna estraro (kiu kun nemultaj ŝanĝoj funkcias ekde februaro 2014) Tomáš Břicháček resumis en sia prelego la lastajn 10 jarojn de nia klubo. La kunvenon partoprenis ankaŭ kvar eksterlandaj gegastoj.

Bulteno, n-ro 1/2024

Polyglot Gathering

Ekde la 15-a ĝis la 19-a de majo 2024 okazis en Prago aranĝo Polyglot Gathering. Partoprenis pli ol 750 homoj el sep dekoj da landoj.
PG estas la plej granda internacia evento por poliglotoj (plurlingvuloj) kaj lingvemuloj, organizata ĉiujare en majo. Ĝi estas plena de prelegoj, riĉaj kulturaj prezentoj kaj amuza socia programo.
Dum la aranĝo la partoprenantoj kundividas sian amon kaj plenumas sian pasion pri kulturoj kaj lingvoj, interŝanĝas konsilojn kaj spertojn, kaj, plej grave, uzas kaj ekzercas multajn lingvojn por diskuti, aŭskulti, lerni kaj amikumi. Polyglot Gathering taŭgas por lernantoj, instruistoj, ŝatantoj, komencantoj, profesiuloj, sciencistoj, edukistoj.
La ĉeforganizanto estas E@I, kies kunordiganto estas Peter Baláž el Slovakio.

Bulteno, n-ro 1/2024

E-mental' en Graz

Vlasta Pištíková

Dek membroj de la klubo E-mental' forveturis la 15-an de marto 2024 per trajno el Prago al Graz en Aŭstrio por travivi semajnfinon kun lokaj esperantistoj.
La evento estis planita jam kelke da monatoj kaj grazanoj dume diligente preparadis programon. Ĉar E-mentalanoj estis informitaj pri la planoj, ĉiuj tre ĝojatendis la kunvenon. Sed ĉiuj imagoj pri la renkontiĝo estis superigitaj. La programo estis perfekte preparita de la komenco ĝis la fino kaj partoprenantoj vere povis ĝui ĉiujn programerojn.
Jam alveno en la ĉefstacidomon en Graz estis eminenta. Lokuloj estis venantaj kun kluba flago, dum la grupo de E-mentalanoj iris de la dua flanko kun Esperanto-flago.
Jam tio ĝojigis ĉiujn kaj tuj posta rapida reciproka interkonatiĝado estis tre gaja.
Post komuna fotado sur perono estis E-mentalanoj portitaj per aŭtomobiloj al Esperanto-monumento kaj post plua fotado plue al loĝloko, kiun kiel unusolan aferon de la semajnfino E-mentalanoj mem prizorgis.
Post la loĝigo ĉiuj kunvenis en saloneto de nemalproksima restoracio por vespermanĝi kaj interkonatiĝi.
E-mentalanoj pere de simpla ludeto transdonis al unuopaj grazanoj donacetojn. Poste jam estis tempo por foriri al pensiono kaj iri dormi.
Sabate matene E-mentalanoj estis aŭte portitaj al klubejo, kiun grazanoj antaŭnelonge akiris dank' al urbestrino. Post la trarigardo de vere tre bela klubejo ĉiuj kune promenis ĝis la urbocentro, kie en surtegmenta kafejo estis mendita tablo. Post trarigardo de la urbo el la tegmento ĉiuj kafumis aŭ teumis, lokuloj parolis kun ĵurnalistoj.

De la kafejo oni iris al Kastela monto super la urbo, kie oni vidis Horloĝan turon, kastelon, vizitis muzeon, ĝuis rigardon al la urbo kaj dum la tuta tempo ricevadis multe da interesaj informoj de la lokuloj…
Post reveno el la monto oni vizitis urban turisman informejon, kie oni povas dank' al lokaj esperantistoj ankaŭ trovi broŝuron pri la urbo en Esperanto.
Ĉiuj ĝuis poste ripozon dum la tagmanĝo en proksima restoracio, kie estis mendita tablo. Post la manĝo estis iom da tempo, por ke E-mentalanoj havu eblon aĉeti iujn donacetojn por proksimuloj hejme kaj tuj poste estis promeno tra interesa artefarita insulo meze de la rivero.
Je la sepa horo oni vespermanĝis en restoracio kaj poste oni ludis bilardon. Kvankam preskaŭ ĉiuj E-mentalanoj ne scipovis ludi la ludon, ĉiuj plene ĝuis ĝin. Post la ludo ĉiuj lacegaj E-mentalanoj volonte revenis en la pensionon.
Matene estis E-mentalanoj portitaj per aŭtomobiloj al proksima vilaĝo Thal, kie oni unue vizitis interese rekonstruitan preĝejon kaj poste domon, kie naskiĝis Arnold Schwarzenegger kaj kie nuntempe estas muzeo pri li.
De la muzeo oni jam rapidis al restoracio por tagmanĝo, ĉar trajno de E-mentalanoj reen al Ĉeĥio veturis duonhoron post la tagmezo.
Adiaŭo kun ĉiuj grazanoj estis tre kortuŝa. E-mentalanoj invitis grazanojn al Prago kaj grazanoj promesis baldaŭ veni.
La tuta semajnfino estis vere bonega. Grazanoj sukcesis perfekte ĉion plani, ĉiam ili estis helpemaj, komune ili diskutis kaj pri seriozaj kaj pri malseriozaj temoj.
Nekredebla estis ilia sukceso ricevi subvencion de la urba registaro kaj dank' al tio E-mentalanoj havis ekzemple senpagan tagmanĝon kaj vespermanĝon.
Ĉiuj bedaŭris, ke la semajnfino estas nur tiom mallonga – volonte ĉiuj E-mentalanoj restus pli longe.

www.e-mental.cz

Diskuto kun Martin Petiška

La 23-an de majo vizitis nian klubon la verkisto Martin Petiška, filo de Eduard Petiška. La kunvenejo estis plenplena. Pavla Dvořáková preparis interesan kulturan programon pri ambaŭ verkistoj.
Sinjoro Petiška afable kaj alloge parolis. Poste okazis publika lanĉo de Esperantaj tradukoj de du libroj de Eduard Petiška: *Malnovgrekaj mitoj kaj legendoj* kaj *Golemo kaj aliaj judaj mitoj de la malnova Prago.*
[…]

Bulteno, n-ro 1/2024

La klubo translokiĝis

Post longaj jaroj la Esperantista klubo en Prago devis translokiĝi al alia adreso, ĉar la posedanto de la klubejo havas aliajn planojn por la spaco. Lunde la 24-an de junio 2024 renkontiĝis 8 volontuloj, kiuj malplenigis la ŝrankojn en la malnova klubejo, pakis ĉion en kestojn kaj sakojn, transportis ilin al la nova klubejo kaj reordigis ĉion en la ŝrankojn en la nova klubejo.

[…]

Od září 2024 se pražský klub schází v prostorné klubovně v Revoluční ulici č. 5 v budově někdejší pojišťovny Viktoria.
Klub toto místo již v minulosti poznal. V kronice Jiřího Patery se můžeme dočíst záznam z roku 2001: „*2001/03/19 jarkunveno de EKP okazis en ejo en Revoluční strato. Estis reelektita la malnova komitato. La ejo en Revoluční estis bela kaj vasta, en la centro de la urbo. Sed estis tie granda strat-bruo, tial ekde septembro la klubo kunvenis en alia kunvenejo, en str. Ve Smečkách n-ro 25.*“ Také v rozhovoru s Josefem Trojanem v Bultenu 3/2014 se dočteme: „*La tempo pasis kaj la klubo transloĝiĝis multfoje. Ni estis en la strato Revoluční, en Smíchov, en Malnova Urbo... Ve Smečkách oni ankris en la naŭdekaj jaroj.*“
K přestěhování klubových věcí došlo ještě před prázdninami, 24. června. První schůzka se pak uskutečnila 12. září, kdy zde přednášel a vystavoval fotografie Jevhen Kovtonjuk.

Bulteno, n-ro 2/2024

Eŭheno Kovtoniuk prelegis kaj ekspoziciis fotojn

La 12-an de septembro, kiam ni unuafoje kunvenis en la nova klubejo en la strato Revoluční, ni havis tre interesan programon. Eŭheno Kovtoniuk parolis pri siaj travivaĵoj el la Universala kongreso en Aruŝo kaj ekspoziciis siajn fotojn.
Eŭheno estas mondfama talenta fotisto ofte vojaĝanta tra la mondo havante diverstemajn personajn fotoekspoziciojn en diversaj urboj kaj landoj – ekzemple en Nov-Jorko, Londono, Ĝenevo k. a. Krom tio li estas meritulo de ukraina Esperanto-movado.
Ni tre ĝojis, ke li iĝis nova membro de nia klubo.

Bulteno, n-ro 2/2024

Prezidento Pavel ĉe Esperantaj-brikoj

Ĉi-jare kiel kutime okazis la E-mentala aranĝo HELPU HELPI, dum kiu ementalanoj aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas al handikapuloj. Estis kolektita mono por 40 brikoj. La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj.
Bonŝance ekestis foto kun la ĉeĥa prezidento Petr Pavel, kiu ankaŭ partoprenis la projekton Briko. En la foto klare videblas la Esperantaj brikoj.

Bulteno, n-ro 2/2024

Forpasis Stanislav Krajíček

Pavla Dvořáková

La 29-an de septembro 2024 subite kaj neatendite forpasis en aĝo de 68 jaroj praga pentristo kaj esperantisto Stanislav Krajíček. En Esperantujo li konatas sub la arta alinomo PANO (ĉar lia familia nomo signifas en la ĉeĥa lingvo „pantranĉaĵeto“). Li estas aŭtoro de ĉirkaŭ 1200 verkoj kaj sendube apartenas al rimarkindaj vidartistoj, meritanta diskonigon de sia verkaro. Li rememorindas ne nur kiel kreema, sed precipe bonkora, amikema kaj afabla homo.
Li naskiĝis la 29-an de julio 1956 en orienta Moravio en la komunumo Klečůvka (regiono Zlín). Li kreskis en granda familio kun 7 gefratoj.
En la 1980-aj jaroj li eklernis Esperanton en la klubo en Zlín. En 1990 li transloĝiĝis al la ĉefurbo Prago, kie li pasigis la reston de sia vivo.
Inklinon kaj talenton por arto kaj pentrado li havis jam ekde infanaĝo. Pro praktikaj kialoj li origine lernis profesion farbisto-lakisto.
En 1992 li ekstudis desegnadon ĉe la akademia pentristo Zdeněk Šorf. Sekve tutvive li plu memstudis kaj kleriĝadis pri arto kaj pentroartaj teknikoj kaj memstare evoluigis sian originalan stilon, kiu havis en diversaj vivperiodoj diferencajn aspektojn. La artan verkadon instigis precipe lia laboro de kulisopentristo en la Filma Artakademio (ekde 1995).
Liaj bildoj kaj reliefoj eliras ne nur el lia subjektiva perceptado, sed ankaŭ el tradicia ĉeĥa pentroarto kun akcento pri la aktuala realo.
Li havis viglan fantazion kaj malfermitecon por eksperimentado pri koloroj kaj pri uzataj materialoj (latekso, akrilo, oleo, ligno aŭ tekstilo). Plejparto de liaj teknikoj estas originala kaj mem elpensita.
En pluraj siaj verkoj li esprimis sian intereson pri mitoj, misteroj kaj spiritaj aspektoj de la vivo.
Stanislav Krajíček estis prezentita dum diversaj komunaj artekspozicioj, precipe en Prago, Centra Bohemio kaj Regiono Zlín, kaj havis tridekon da memstaraj ekspozicioj ne nur en Prago, sed ankaŭ en la muzeoj Beroun kaj Roztoky, en Veltrusy, Zlín kaj aliaj urboj de Ĉeĥio, resume entute en 60 diversaj lokoj.
Lia artkatalogo entenas 977 verkojn, krom tio li kreis ĉ. 300 pliajn. Temas precipe pri desegnaĵoj kaj pentraĵoj, sed ankaŭ pri plastikaĵoj, reliefoj kaj betlehemoj. Liaj verkoj troveblas en privataj kolektoj en la tuta Ĉeĥa respubliko kaj precipe dank al Esperanto en multaj eŭropaj landoj, sed ankaŭ en Urba galerio Beroun kaj en Valaĥia sendependa nacia galerio.
En Esperantujo en 1998 li estis unu el la kunfondintoj kaj aktivaj membroj en la praga klubo E-mental’, kiu apartenas sendube al la plej agemaj eĉ internaciskale. Li partoprenis ofte la klubajn aranĝojn kaj ekskursojn (ne nur enlande, sed i.a. en Slovakio kaj Italio).
En la Esperanto-Muzeo en Svitavy en decembro 2011 li prelegis pri sia persona pilgrimado al Santiago-de-Kompostelo kaj en 2013/2014 prezentis tie siajn verkojn dum la ekspozicio Esperanto kaj muzoj.
En 2014 li grave meritis pri renovigo de la Esperanto-monumento antaŭ la Kongresa Centro en Prago (la okazloko de la 81-a UKo en 1996).
Dum la menciita kongreso li ankaŭ ekspoziciis siajn pentraĵojn. Sekve de tio okazis dank al kunlaboro kun esperantistoj el la klubo Bona Stelo ankaŭ lia ekspozicio en Francio (Romans sur Isere apud Liono).
Stanislav Krajíček havis Esperantan familion. Lia edzino Květa Krajíčková (fraŭlinnome Hubnová) en la 1990-aj jaroj estis prezidantino de Esperantista Klubo en Prago kaj agis en la estraro de ĈEA. La filino Zuzana ankaŭ parolas Esperanton.
Stanislav (nomata Stáník) estis tre ŝatata de siaj geamikoj, li estis ekvilibra, afabla, bonhumora kaj kun fajna humursenso, helpema kaj komprenema, malgraŭ siaj artaj atingoj modesta homo.
Li neniam ĉesis lerni kaj serĉi novajn vojojn, ne nur pri la arto. En siaj verkoj li disradiis amon

al la vivo, emon al harmonio en la interhomaj rilatoj, esperon kaj kredon pri la bono en la homo kaj pri la pli supera senco de niaj vivoj.
Lia neatendita kaj tro frua forpaso estas granda perdo kaj por liaj proksimuloj kaj geamikoj, kaj por Esperantujo kaj Esperanta kulturo.
La lasta adiaŭo kun Stanislav Krajíček okazis marde la 8-an de oktobro 2024 je 12:50 en la Nova ceremonia salono en la tombejo Olšany en Prago 3. La klubo E-mental' kaj ĈEA-membroj kaj estraranoj prizorgis esperantlingvan florornamon.

Bulteno, n-ro 2/2024

Grazanoj en Prago

Vlasta Pištíková

Vendrede la 6-an de septembro 2024 venis al Prago 5 esperantistoj el Graz, por ke ili travivu semajnfinon kun esperantistoj el la klubo E-mental'. E-mentalanoj vizitis ilin jam printempe ĉi jare kaj do ili kompreneble ankaŭ invitis la grazanojn al Prago.
La grazanoj venis al Prago per pli frua trajno, ol ili anoncis, do komence ŝajnis, ke estos fuŝita planita bonvenigo. Sed la bonvenigo estis replanita kaj grazanoj estis bonvenigitaj en stacidomo du horojn post ilia alveturo. E-mentalanoj venis tra ĉefa halo de la stacidomo kun flagoj kaj veninte al la Grazanoj, kiuj atendis sur interkonsentita loko, E-mentalanoj kantis bonvenigan kanton.
Laŭ ĉeĥa kutimo oni proponis al la grazanoj panon kun salo. Poste jam ĉikaŭbrakumoj kaj kisoj. Kaj kompreneble ankaŭ tostado kun ŝaumvino.
De la stacidomo ĉiuj kune iris al klubejo de Praga klubo, kie estis preparita modesta vespermanĝo, post kiu estis programo kreita de E-mentalanoj – prelegetoj, ludo, muzikado, kantado…
Post la programo foriris gastoj al loĝejoj de kelkaj klubanoj, kiuj proponis por ili tranoktadon.
Matene jam je la sepa horo kunvenis la gastoj kaj kelkaj E-mentalanoj en centro de la urbo por kune promeni tra pragaj stratoj, kiuj matene ankoraŭ ne estas plenaj de turistoj. En Malnovurba placo estis mallonga paŭzo por formanĝi hejman kukon kun iom da kafo.
Poste promeno al Karola Ponto, kiu estis bele lumigita de matena suno.
Post la matena promeno la grupeto veturis al Vyšehrad, kie estis je la naŭa kunveno kun pluaj klubanoj.
Post fotado ĉe Esperanto-ŝtono ĉiuj iris al kastelo Vyšehrad por vidi gravajn lokojn de ĉeĥa historio.
Trarigardinte la ĉirkaŭaĵon de la kastelo ĉiuj malsupreniris al ĉerivera urboparto, kie estis en restoracio V Podskalí menditaj lokoj por tagmanĝi.
Neatendite rapidaj servoj en la restoracio permesis mallongan viziton de proksima kafejo AdAstra.
Post la ripozo ĉe kafo ĉiuj denove ekis al la urbocentro por vidi muron kun karitataj brikoj, kie antaŭnelonge kontribuis ankaŭ E-mentalanoj.
De la muro oni promenis tra stratoj ĉe Malnovurba placo kaj Juda urbo.
Poste jam ĉiujn atendis vespermanĝo en restoracio U Skřetů, kie oni povas mendi manĝaĵojn de menuo en Esperanto.
Post iom da postvespermanĝa ripozo ĉiuj ekis al ludejo por ludi bowling. Kaj tio estis lasta programero de la tago.
Dimanĉe matene oni kunvenis proksime de Praga kastelo. Sidante en parko kaj aŭskultante pri historio de Prago ĉiuj lunĉis kukon kun kafo.
Ĉiuj poste ĝuis trarigardon de preskaŭ senhomaj stratoj de Nový svět.

De la trankvilaj stratoj oni transiris al Praga kastelo, kie jam estis pli vigle.
Poste jam tagmanĝo en la restoracio, kiu estas fama pro la plej bona rostita porka genuo en Prago. La tagmanĝo estis planita kiel lasta programero de la vizito de grazanoj, sed evidentiĝis, ke ili ne havas biletojn por la trajno, kiun ili antaŭe anoncis, sed je du horoj malpli frue. Do estis decidite viziti ankoraŭ Monaĥejon Břevnov, kie oni promenis en monaĥeja ĝardeno kaj poste oni gustumis lokan monaĥejan bieron.
Poste jam venis tempo por iri al stacidomo, lastaj ĉirkaŭbrakumoj, lastaj kisoj, lastaj mansalutoj. Espereble grazanoj denove venos!

Bulteno, n-ro 2/2024

Esperanto en la Eŭropa tago de lingvoj

La 26-an de septembro 2024 kadre de la Eŭropa Tago de Lingvoj okazis en Prago kaj Brno du aranĝoj kun partopreno de esperantistoj.
La ĈEA-reprezentantoj reprezentis Esperanton ĉe la tiel nomata Speak-dating. Ĵaŭde la 26an Karola Universitato invitis reprezentantojn de preskaŭ 30 eŭropaj lingvoj al la Kampuso en la strato Hybernská. Ĉiu havis sian propran tablon, kie interesatoj el la publiko povis sidi por kvin minutoj kaj provis simplajn frazojn en la koncerna lingvo.
La starto je la tria horo estis iomete malrapida, sed ekde la kvara horo la nombro de interesiĝantoj signife kreskis kaj pluraj atendis en mallonga vico por Esperanto. Post enkonduka prezento en Esperanto kaj kelkaj demandoj estis loko por demandoj. Verŝajne la plej ofta estis: „Kie oni povas paroli ĝin?“, do estis menciitaj diversaj esperantistaj aranĝoj kaj precipe Universala Kongreso de Esperanto en Brno venontjare. Gvidilo pri Brno en Esperanto kaj Esperanto-broŝuro en via poŝo estas libere disponeblaj por interesatoj.
En Brno membroj de la Brno-klubo prezentiĝis al Esperanto-interesatojn jam lunde la 23-an de septembro ĉe Moravské náměstí (Moravia placo).

https://www.esperanto.cz

Denove surspure de doktoro Zamenhof

La 7-an de novembro Pavla Dvořáková invitis nin por daŭrigo de la esplorvojaĝo tra la tempo al la lokoj ligitaj kun la vivo de doktoro Zamenhof (serio „Surspure de doktoro Zamenhof“). Ĉi-foje ni ekskursis al du ĉarmaj konataj banlokoj situantaj en sudo de Pollando – Duszniki-Zdrój kaj Szczawno-Zdrój –, kie Zamenhof feriis kaj kuracis sin antaŭ aŭ post la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Post la prelego sekvis kuna kantado de Esperantaj kantoj kun ukuleloj.

Bulteno, n-ro 3/2024

Historio de la Esperanto-fako de la eldonejo KAVA-PECH

Petr Chrdle

Kiel videblas de la kompleta nomo de la mallongigo KAVA-PECH *Kongresová A Vzdělávací Agentura PEtra CHrdleho*, ĝia celo origine ne estis eldonado de libroj. La agentejon mi fondis en la jaro 1991, sed jam en la jaro 1992 mi eldonis la unuan libron. Ne pro emo fariĝi eldonisto,

sed pro neceso mem eldonadi la prelegkolektojn el de mi organizitaj fakaj eventoj. Ili estis plejparte en la ĉeĥa kaj germana, nur pli poste, kiam mi sentis min ekonomie sufiĉe forta por riski malprofiton, mi komencis agadi ankaŭ por esperantistoj. La unuaj Esperanto-aranĝoj estis la kolokvo por Akademio de Espertanto kun eldonita prelegkolekto *La stato kaj estonteco de Esperanto* kaj la kongreso de SAT en Strážnice kun ĝia antaŭkongreso en Prago paralele kun la AdE-kolokvo.
Sed la eldonado de libroj fariĝis hobio por ni (mi kaj mia edzino Stanjo[14]), do ni komencis eldonadi ankaŭ aliajn librojn, ne nur prelegkolektojn, inkluzive de tiuj en Esperanto. Ĝis la jaro 2024 KAVA-PECH eldonis 262 librojn, el ili 108 en Esperanto. Do tiuj 108 libroj kreas la Esperanto-fakon de la eldonejo. Klare, ne ĉiuj estas ankoraŭ surstoke.
En produktado de ĉeĥaj kaj Esperantaj libroj ne estas granda diferenco. Male estas tre granda diferenco en iliaj distribuoj. Por la ĉeĥaj mi havas ekskludan distribuanton KOSMAS, do tio postulas de mi preskaŭ neniun administran pezon. Ĉiumonate laŭ la anonco pri nombro de venditaj libroj mi sendas al Kosmas fakturon, librotenado estas simpla, same kiel la impostdeklaroj (kvarfoje jare pri AVI[15] kaj unufoje jare pri gajno/malgajno).
Tute alia estas burokrataĵoj kunigitaj kun la distribuo de la libroj en Esperanto, plejparte eksterlanden. Eĉ se en ridinde malgrandaj volumoj, ĝi devas plenumi ĉiujn trajtojn de la internacia komerco: apartan evidencon de la vendoj ekster Ĉeĥion, kaj al EU-landoj, se la partnero estas ankaŭ AVI-paganto (ekzemple UEA, germana libroservo, …) kaj ĉiumonate deklari evidencan devon (záznamní povinnost); kaj al eksterEU-landoj, kiuj devas esti dogane pritraktataj kaj aparte signitaj en la impostdeklaro, plenumo de jure devigaj statistikaĵoj (sub altaj punminacoj), ktp. Krome, ĉiu korespondado kun la klientoj okazas en Esperanto. Kiun dronoplenan vojon mi devis trairi, antaŭ ol la financofico komencis akcepti la dokumentojn en Esperanto, mi priskribis en la verko *Mia vivo kun Esperanto*, ĉeĥa versio *Život s esperantem*.
Tion ĉion mi havis en mia cerbo, kiam mi batalis kontraŭ morto dum du sinsekvaj danĝeraj malsanoj post kovimo kaj ĉe la notario, kiam mi faris testamenton. Mia plej aĝa filino, kiu heredos mian firmaon, certe ĝin likvidos, sed antaŭ tio ŝi devos plenumi ĉiujn restantajn kontraktojn kaj devontigojn. Tio certe ne estos problemo rilate al la ĉeĥaj libroj, sed terure komplika por ŝi, nekonanto de komercaj leĝoj, rilate al la Esperantaj, des pli, ĉar ŝi ne scipovas Esperanton.
Tial mi decidis laŭeble baldaŭ liberiĝi de la Esperanto-fako, tamen ne volis likvidi la restantajn librojn en Esperanto. Mi do strebis trovi iun, kiu transprenus ilin, sed ne trovis. Sed ekbrilis eĉ pli bona solvo: François Bolduc el kanada Montrealo, kiu ĝuste en tiu tempo planis fondi eldonejon por eldonadi Esperanto-librojn, ofertis al mi, ke li transprenos mian eldonejon kaj daŭrigos ĝian agadon. Ni faris kontrakton kaj lasis ĝin kontroli ĉe juristoj, por ke ĝi kontraŭu nek la ĉeĥan, nek la kanadan juron. Rilate tion mi volas publike danki al Tomáš Břicháček, kiu dume estis mia jura konsilanto. Kaj tiel okazis. Li ankaŭ aĉetis kontraŭ forte rabatitaj prezoj profunde sub la produktokostoj (klare, ĉar plejparton li ne sukcesos disvendi) la reston de la stoko de la libroj en Esperanto. Parton mi sendis al li en Montrealon, parton transprenis persone lia kunlaborantino el Budapeŝto Stela Besenyei-Merger.
Sed mi volis, ke ankaŭ ĉeĥaj esperantistoj havu eblon plu aĉetadi la librojn eldonitajn en Ĉeĥio. Do antaŭ vendo de la restantaj libroj al François mi interkonsentis kun ĈEA, ke ankaŭ ĝi ricevu rabatite sufiĉan kvanton da libroj, kiujn ĝi distribuos pere de la libroservo en Esperanto-muzeo. Ilin eblas jam nun aĉeti persone en Svitavy aŭ mendi pere de Marie Čumová, Marie.Cumova@seznam.cz.

[14] Stanjo = Stanislava Chrdlová (1954–2000) estis ne nur mia edzino, sed ankaŭ la plej proksima kunlaborantino ene de KAVA-PECH kaj kunaŭtorino de la lernolibro Esperantem za tři měsíce, ekde la kvara eldono plilarĝigita al *Esperanto od A do Z*.
[15] AVI = Aldonvalora imposto (daň z přidané hodnoty)

Provizore, ĝis la nova eldonejo *Les éditions KAVA-PECH* havos propran retejon, la mendojn de eksterlande plu kolektos mia retejo https//kava-pech.cz/esperanto kaj mi plusendos ilin al Montrealo kaj Budepeŝto. Sed ĉeĥajn esperantistojn mi petas mendadi la librojn en Esperanto rekte ĉe ĈEA.
Fine mi volas ĝustigi iujn malverajn famojn pri mi, kiuj venis al miaj oreloj:
1e, mi **ne** kabeiĝas[16], male mi nun havos pro malpli da burokrataĵoj espereble pli da tempo por esperantumi: vizitadi la Esperanto-aranĝojn, verki, …
2e, KAVA-PECH **ne** bankrotis kaj ĝi plu ekzistos, nur ne plu agos internacie pro pli supre menciitaj kialoj,
3e, mi **ne** estas mortanta (almenaŭ mi kredas!) kaj danke al Dio kaj al miaj kuracistoj mi jam denove fartas relative bone. Jes, mi devas glutadi amason da medikamentoj kaj regule subiĝi al diversaj sankontroloj, sed sciante, ke kun malnova aŭto oni devas ofte vizitadi aŭtoriparejon, mi komprenas, ke kun maljuna korpo mi devas vizitadi simile la korporiparejojn. Sed tamen mi povas plu ĝui la vivon kaj Esperanton, eĉ se kun iuj limigoj.

Bulteno, n-ro 3/2024

[16] Kabeiĝi: subite de fervora esperantisteco komplete forlasi Esperanton. Laŭ fama fervora Esperanto-verkisto, tradukanto, AdE-vicprezidanto kaj movadano KABE (Kazimierz Bein, 1872–1959, kiu en la jaro 1911 subite sen ajna klarigo komplete malaperis el la movado).

2025

16/01/2025 – diskuto pri la propagado de Esperanto gvidita de Josef Kalčík *(kunvenejo)*

22/02/2025 – tradicia E-mentala aranĝo Bestĝardeno

13/03/2025 – prelego de Pavla Dvořáková pri utilaj senpagaj interretaj helpiloj por verkado kaj tradukado; poste muzika programo

14–16/03/2025 – E-mentala ekskurso al Berlino

27/03/2025 – ĝenerala kunveno; elektita nova estraro: Tomáš Břicháček (prezidanto), Jiří Mišurec (vicprezidanto kaj kasisto), Vlasta Pištíková kaj Petr Javorik *(kunvenejo)*

28– 30/03/2025 – E-mentala aranĝo 20-a BIERo en Kroměříž

22/05/2025 – prelego de Tomáš Břicháček pri la genealogio *(kunvenejo)*

19/06/2025 – antaŭferia festo; prezentado de Vlasta Pištíková pri ŝiaj hobioj *(kunvenejo)*

30/06/2025 – aperis Bulteno n-ro 1/2025

Zápis ze zasedání členské schůze 27. března 2025

Leonarda Chaloupková, Vlasta Stará

Dne 27. března 2025 od 17 hod. se konalo v klubovně v ulici Revoluční 5, Praha 1, zasedání členské schůze Klubu esperantistů v Praze, pobočného spolku Českého esperantského svazu, z. s.

Účast

Dle stanov Českého esperantského svazu, z.s. platí, že členská schůze klubu (včetně klubu, který je pobočným spolkem) je schopna usnášet se při účasti alespoň 5 členů s hlasovacím právem. Tato podmínka byla splněna. Účastnilo se 13 členů s hlasovacím právem.

Volba zapisovatele a ověřovatele

Členská schůze jednomyslně (13 hlasy) zvolila jako zapisovatelku Leonardu Chaloupkovou a jako ověřovatelku Vlastu Starou.

Zpráva předsedy

Předseda klubu Tomáš Břicháček přednesl zprávu o fungování klubu v období od posledních voleb výboru (31. 3. 2022). Členská schůze vzala zprávu na vědomí.

Zpráva místopředsedy a pokladníka

Místopředseda a pokladník klubu Jiří Mišurec přednesl zprávu o členské základně a stavu financí. Členská schůze vzala zprávu na vědomí.

Volba předsedy a dalších členů výboru

Poté proběhla volba předsedy a ostatních členů výboru.
Členská schůze zvolila za předsedu Tomáše Břicháčka (12 hlasů pro, 0 hlasů proti, 1 se zdržel).
Za ostatní členy výboru byli zvoleni Jiří Mišurec, Vlasta Pištíková a Petr Javorik (10 hlasů pro, 0 hlasů proti, 3 se zdrželi).

Volná diskuse

1) Josef Kalčík – poděkování předchozímu výboru; článek v BULTENO o svobodě slova; jako člen výboru ČES – připravovat atraktivní obsah schůzek; informovat o činnosti výboru ČES; potřeba vytvořit inform. letáček pro čes. publikum
2) Vlasta Pištíková navrhuje svoje téma na příští schůzku E-klubu.
3) Petr Chrdle – pozvánka do Svitav na 30. a 31. 5. // 30. 5. muzejní noc, 31. 5. vernisáž E-výstavy, E-muzea ve světě; křest knihy P. Chrdleho o BERTĚ SUTTNER
4) Jiří Tomeček – poděkování předchozímu výboru; pozvánka na 13. 4. – marcipánové Velikonoce v E muzeu Svitavy

Bulteno, n-ro 1/2025

Parolo de la prezidanto

Tomáš Břicháček

Estimataj samideaninoj kaj samideanoj! Karaj geamikoj!
Mi volus elkore bonvenigi vin en la ĝenerala kunveno de nia klubo. Ĝi okazas preskaŭ precize tri jarojn post la pasinta. La 31-an de marto 2022 la klubo elektis tiun ĉi komitaton, en kiu

laboris Jiří Mišurec kiel vicprezidanto kaj kasisto, Vlasta Pištíková – organizantino de sociaj aranĝoj –, Petr Javorík – nia informadikisto kaj teknikisto – kaj mi Tomáš Břicháček kiel prezidanto.
Jiří Mišurec, Vlasta kaj mi servas jam 11 jarojn en niaj funkcioj. Kaj Petr Javorík la lastajn tri jarojn.
La ĝenerala kunveno estas ĉiam ŝanco retrorigardi kaj analizi niajn aktivecojn kaj elstarajn eventojn de la lasta periodo. Entute oni povas diri, ke ĉi tiu periodo estis tre sukcesa por la klubo. Post la koronvirusa pandemio ni reviviĝis, ni organizis grandegan nombron da eventoj kaj nia membraro kreskis.
Laŭ miaj notoj okazis 34 prelegoj kaj prezentoj, 7 seminarioj kaj diskutoj kaj pli ol dek sociaj amuzaj aranĝoj. Oni publikigis 9 numerojn de la Bulteno. En nia jutuba kanalo aperis granda nombro da videoj – prelegoj, rakontoj, poemoj, kantoj kaj ankaŭ kurso por komencantoj.
Kiam ni rigardas malantaŭen, ŝajnas, ke ĉiu el la tri pasintaj jaroj havis sian grandan temon:
En la jaro 2022 tio estis la 120-a datreveno de la fondiĝo de nia klubo. Ni preparis nin longe por ĝi. Kaj en novembro de tiu jaro ni organizis grandan feston – kun prelegoj, promenoj, filmoj, kantado ktp. Partoprenis ĝin kvar dekoj da samideanoj de kvin landoj.
La jaro 2023 alportis freŝan venton kun la alveno de Jiří Altior, viziulo kaj multlertulo. Komencis nia fruktodona kunlaboro kun lia Instituto de renesanco de kultura heredaĵo. El ĉi tiu kunlaboro ekestis vico da kulturaj eventoj kaj aliaj entreprenoj. Inter alie ni ankaŭ tradukis kelkajn kantojn.
En la jaro 2024 nia klubo devis translokiĝi al alia adreso – el la strato Ve Smečkách al ĉi tiu loko – kiu parenteze estas proksime de la vendejo de nia fama granda prezidanto Jaroslav Šustr. La translokiĝo estis komplika, sed ni sukcesis. Ni akiris pli komfortan lokon ĉi tie por niaj kunvenoj. Estas eble pli da bruo, sed multe pli da spaco.
Kaj ĉijare nia granda temo estas la universala kongreso en Brno. Multaj en ni ĉeestas ĉe la organizado.
Lastatempe en la klubo aliĝas multaj novaj membroj. Kun ili venas nova forto, nova energio kaj nova entuziasmo.
Fine mi volus esprimi dankon al miaj gekolegoj el la komitato: Jiří, Vlasta kaj Petr, kiu diligente laboris por la klubo dum ĉiuj tiuj jaroj. Mi ankaŭ dankas al ĉiuj klubanoj kaj favorantoj, kiuj aktive kontribuis al nia funkciado kun siaj programeroj aŭ tekstoj al nia Bulteno – la plej aktivaj estis sinjorino Margit Turková, Petr Chrdle kaj Pavla Dvořáková. Oni povas diri, ke ĉiu prelego, seminario, amuza socia aranĝo aŭ artikolo por la Bulteno estas valora kontribuaĵo por la funkciado de la klubo kaj por la Esperanta vivo en Prago.
Mi dankas pro via atento kaj antaŭĝojas nian venontan kunlaboron en la venontaj jaroj.

Bulteno, n-ro 1/2025

E-mental' en Berlino

Vlasta Pištíková

Dum la semajnfino 14. – 16. 3. 2025 membroj de la klubo E-mental' vizitis germanan ĉefurbon Berlin.
Ilia plano estis ekkoni urbon kaj precipe renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Kvankam la planado de la ekskurso estis iom malfacila, fine la semajnfino estis por ĉiuj partoprenantoj tre bela, interesa kaj ĝojiga.
Al Berlino la grupo venis per rekta buso el Prago. Jam en la busstacidomo atendis ilin unu esperantistino, kiu akompanis ĉiujn al la hostelo, kie E-mentalanoj havis menditan loĝigon. La hostelo estis bone atingebla per urba trafiko kaj oni sufiĉe rapide povis veni tien.

Post rapida enloĝigado ĉiuj kune iris al nemalproksima restoracio por vespermanĝi kune kun pluaj esperantistoj. La restoracio estis en la stilo de Orienta Germanio kaj ĉiuj dekoraciaĵoj estis en la stilo de tiu tempo.
Same la manĝajoj kaj bedaŭrinde ankaŭ la tempo, dum kiu oni devis atendi, ĝis ĉiuj estos priservitaj. Sed babilante kun la lokuloj ne estis la atendado tiom neeltenebla, do kiam ĉiuj finfine ricevis sufiĉe bongustan manĝaĵon, ĉiuj kontentis.
Sabate post matenmanĝo, kiun E-mentalanoj preparis en hostela kuirejeto,
ĉiuj ekis al la centro de la urbo por kunveni kun lokuloj, kiuj promesis duhoran ĉiĉeronadon tra interesaj lokoj. Kvankam estis pluvema kaj ne tro varma vetero, ĉiuj ĝuis kaj la promenon kaj rakontadon.
Tagmeze, kiam la vetero pliboniĝis kaj eĉ aperis suno, estis kunveno kun pluaj esperantistoj en Esperanto-klubejo kaj de tie oni iris al proksima monteto, kie oni faris komunan foton, tostis je german-ĉeĥa amikeco kaj precipe oni tie anstataŭ tagmanĝo piknikis.
Post plua promenado ĉiuj ĝojis, kiam oni povis sidiĝi en kafejo en la centro de la urbo kaj iom ripozi. Poste oni vizitis restaĵojn de la berlina muro
kaj ĉiuj jam ĝojatendis vespermanĝon en barata restoracio.
Post la vespermanĝo nur kelkaj E-mentalanoj estis sufiĉe fortaj por reveni al la hostelo perpiede, kiu estis sufiĉe for de la restoracio. Aliaj uzis prefere urban trafikon.
Post dimanĉa samstila matenmanĝo ĉiuj E-mentalanoj estis gvidataj de la hostelo al East Side Gallery por vidi pluajn restaĵojn de la berlina muro, kiuj en tiu ĉi loko estas pentritaj de diversaj artistoj.
De la muro parto de la grupo ekis perpiede al la centro de Berlino kaj parto uzis urban trafikon por atingi Alexanderplatz. Tie la pigruloj atendis pli diligentajn E-mentalanojn en kafejo kaj poste ĉiuj kune plu promenis tra la centro.
Tagmanĝon meritis ĉiuj kaj do oni kune manĝis en antaŭmendita meksikia restoracio.
Poste jam forveturo al ĉefstacidomo, kie E-mentalanoj adiaŭiĝis kun la lokuloj, kiuj akompanis ilin. Trajno venis ĝustatempe kaj E-mentalanoj envagoniĝis. Dum la vojaĝo reen al Prago ĉiuj parolis pri la travivita semajnfino, pri la vidinda urbo kaj precipe pri belaj momentoj kun novaj amikoj. Ili ĉiuj nun estas atendataj en Prago por kune travivi pluajn komunajn momentojn!

www.e-mental.cz